# HENRI MULLER

# JARO 2000

## REVOLUCIO SEN PERDANTOJ

Esperantigis :
Abundana Frakcio de SAT

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laùte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1984 * 30 FF

SAT
broŝurservo

# HENRI MULLER

# JARO 2000

## REVOLUCIO SEN PERDANTOJ

Esperantigis :
Abundana Frakcio de SAT

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laùte!" * F 47340 Laroque Timbaut

"Kial igi la vivon neeltenebla, celante la fabrikadon de malgravaj produktoj? Se la uzado de la produktoj ĉesas esti urĝa, ĉu ni povas serioze ordoni al la homoj forlasi siajn hejmojn por produkti tiajn aĵojn kun maksimuma efikeco ?"

John GALBRAITH
("L'ère de l'opulence", p.268)

"Certe, oni sentas maltrankvilon kaj ankaŭ specon de incitado, konstatante, ke ni misuzas ĉion grandvaloran, kion alportas al ni la scienca progreso. Estas netolereble esti en nehavo meze de riĉaĵoj, kiujn oni ne povas uzi. Anstataŭ ol nin helpi, niaj metodoj, kutimoj, institucioj traembarasas kaj paralizas nin."

Gaston BERGER
("Prospective", n°5, p.125)

"Ĉiuj kondiĉoj estas plenumitaj, por ke la homo, dank'al la eltrovoj de la tekniko, povu venki la obstaklojn, kiuj dum jarcentoj malhelpis al li vivi alimaniere ol en la timo de la morgaŭo.
"Nur imagemuloj povas kontribui al konstruado de flekseblaj strukturoj hodiaŭ dezirindaj."

Louis ARMAND
kaj Michel DRANCOURT
("Plaidoyer pour l'Avenir",
p.153 kaj 223)

# K O R E K T E N D O J

## al "Jaro 2000"

| Paĝo | linio | estas | devas esti |
|---|---|---|---|
| 15 | 22 | plenumitaj | plenskribitaj |
| 20 | - 17 | dela | de la |
| 23 | - 5 | al vivkondiĉoj | de vivkondiĉoj |
| 27 | 4 | "trafŝtopadojn" | anonctabulojn |
| 38 | 23 | neaŭtaŭvidite | neantaŭvidite |
| 66 | - 3 | por tedegaj | per tedegaj |
| 75 | - 13 | protio | pro tio |
| 90 | 5 | speciala ŝatataj | speciale ŝatataj |
| 103 | 16 | eminentaj | eminentulaj |
| 130 | 14 | vera lastan rangon | vere lastan rangon |
| 144 | 20 | sun banka | sub banka |
| 162 | - 10 | sufiĉas povperdon | sufiĉan povperdon |

## *AVERTO*

*La libro de Edward Bellamy : Looking Backward*, eldonita en Usono, 1888, havis grandegan sukceson en la tuta mondo. Miliono da ekzempleroj estis vendita en la nuraj anglalingvaj landoj.*

*La tezo prezentita de Bellamy inspiris, poste, multajn skolojn serĉantajn originalajn solvojn.* ***JARO 2000*** *prezentiĝas, entute, kiel ia rejunigo de la verko de Bellamy, konsidere al la progresoj elfaritaj de post la lasta jarcento pri la ekonomia esplorado kaj la novaj sociaj kondiĉoj de nia epoko.*

* publikigita en esperanto kun la titolo : **Rigardante malantaŭen.**

## ĈAPITRO I
### Reveno el kosmo

Alteco : miliono da futoj ! Ĉirkaŭ mi, ŝajne preterlasita de la tempo, universo sen dimensio, mirige stranga, ankoraŭ ne rigardita de homo. Ne, neniam, io povos forviŝi el la memoro tiajn ekzaltajn momentojn !

Mi sentis min strange kotoneca, kvazaŭ mi vekiĝus el peza dormo, kvazaŭ la nepezeco, en kiu mi estis mergita, fine venkis miajn refleksojn, la kontrolon de mia penso.

Kiom longe mi restis duondorma ? Ordinare, la alvokoj de la stacioj ne lasis al mi multajn paŭzojn. Senĉese mi devis noti mezuron, komuniki miajn impresojn, doni klarigojn pri miaj farto kaj sinteno.

Kiam mia aparato efektivigis la kvindekan el siaj rondiroj, silento subite ekestis, plena silento, nekutima! Trafis min speco de rigideco, kontraŭ kiu estis vane lukti.

Kiam mi malfermis la okulojn, la horloĝo de la aparato montris la trian, sed ĝi ne plu funkciis. Supozante, ke mia dormo daŭris pli ol dudek kvar horojn, mi pensis, ke mi efektivigis dudekon da pluaj rondiroj.

Ĉi-foje mia mireginda periplo estis ekfiniĝanta. Evidente la aparato malpli rapidis. La sunleviĝoj, kiuj preskaŭ ĉiuhore ŝprucis sur mia horizonto, ŝajnis efektive ĉiufoje pli daŭri. La varmindikilo estos baldaŭ altiĝanta malrapide. Post la decidiga diagrampunkto, la malferlantaj operacioj estos ekfunkciantaj tiam sen mia interveno, dum la kapsulo signalos sian pozicion al la observantoj komisiitaj ricevi ĝin.

Tiu momento ŝajnis proksima. Rigardante la ciferplaton indikantan la temperaturon de la ogivo, mi sentis tamen malprecizan angoron. Mi kontrolis miajn rimenojn. Mia edzino kaj mia filino estos feliĉaj revidi min sana kaj savita. Mi retravivis tiun intiman vesperon, la lastan trapasitan hejme, kaj mian emocion antaŭ la granda foriro al tiu nekredebla universo, el kiu mi estos fortirita post kelkaj momentoj.

Mi apenaŭ konsciis pri la skuo. Ekde la unuaj postaj onoj de sekundo mi jam senkonsciiĝis.

*

La unua vizaĝo, kiu aperis al mi, estis tiu de juna virino. Ŝi rapide alproksimiĝis :

"Li malfermas la okulojn", mi aŭdis ŝin flustri.

- Kiu vi estas ? Kie mi estas ? mi demandis.
- Mi nomiĝas Katarina, ŝi diris. Vi estas miahejme.
- Kiel mi venis tien ĉi ?
- Ni parolos pri tio, kiam vi estos iom pli forta. Vi estas ĉe amikoj kaj en bonaj manoj. Kiel vi fartas?
- Mi sentas min iom strange, mi respondis. Sed mi kredas, ke mi fartas bone. Bonvolu sciigi al mi, laŭ kia hazardo mi fariĝis via gasto ? Kio okazis al mi? Kiel mi venis tien ĉi ? Mi scias, ke mi endormiĝis en mia hejmo.
- Ni havos la tutan tempon paroli pri tio, respondis Katarina kun trankviliga rideto. Pli bone estas eviti ĉian maltrankviligan interparoladon ĝis vi denove estos vi mem. Cetere, klarigi vian alvenon ĉi tien, tio ne estas tiel simpla kiel vi opinias. Streĉu vian memoron kaj diru al mi, kiam vi endormiĝis en via propra domo ?
- Kiam?... Kiam?... sed hieraŭ vespere, ja, ĉirkaŭ noktomezo.
- Ĉu vi memoras la daton ?
- Sed, hieraŭ vespere, ĉu mi ne jam diris tion al vi ?... Escepte se mi dormis dum tuta tago ! Sed tio ne estas ebla kaj, tamen, mi sentas impreson, ke mi dormegis ! Mi endormiĝis dimanĉon, certe, en dimanĉo la unua de la monato, mi rediris laŭtigante la tonon.
- Pardonu, la unuan de kiu monato ?
- Ja de tiu ĉi monato, ĉar mi ne imagas, ke mi dormis ĝis la monato junio.
- Ni estas en septembro.
- Septembro ! Ĉu vi diros al mi, ke mi dormis de marto ĝis septembro ?
- Ni vidos, denove parolis Katarina. Vi diras, ke vi endormiĝis la unuan de marto...
- Jes.
- Restas al vi memori de kiu jaro.

Mi, malspritigite, rigardis ŝin kaj dum momentoj ne kapablis laŭte paroli.

- De kiu jaro ? mi rediris duonlaŭte.
- Jes, de kiu jaro ? Poste vi kalkulu dum kiom da tempo vi dormis.
- Estis en 1960, mi respondis.

Katarina insistis, por ke mi trinku iom da kuracilo, kaj palpis al mi la pulson.
- Via aspekto, ŝi diris, estas tiu de klerulo. Vi do rimarkis mem, ke nenia evento, en tiu ĉi mondo, estas pli mirinda ol alia. Mi antaŭvidas, ke vi estos iom sufokita per tio, kion mi diros al vi, sed mi konvinkiĝas, ke vi ne lasos konfuzi neoportune la serenecon de via spirito. Vi aspektas kiel apenaŭ kvardekjarulo kaj la stato de via korpo ne estas malsama ol kiam oni vekiĝas el dormo iom longa, kaj tamen ni estas hodiaŭ la 10an de septembro de la jaro 2000a kaj vi dormis ĝuste dum kvardek jaroj, ses monatoj kaj dek tagoj.
- Kion vi celas diri ? Tio estas ŝerco, ĉu ne ?

Ŝi donis al mi ĵurnalon, ĝi enhavis jenan titolon:

*MARTIN EDDERS, LA KOSMOVETURANTO PERDITA EN 1960, RETROVITA EN 2000. KVARDEKJARA LETARGIA DORMO EN SPACA APARATO.*

- Vi prononcis hieraŭ viajn unuajn parolojn kaj pri via vekiĝo oni jam iom bruis. Ni fariĝos famaj, ŝi diris kun unco da malico.( Tamen mi divenis, ke ŝi estis maltrankvila, hezitanta pri miaj reagoj. Iom post iom, konfuzaj bildoj ŝprucis kvazaŭ el nebulo).
- Kio do okazis ? Ĉu mi dormis tiel longtempe ?
- Via kazo, mi povas certigi tion al vi, pasiigis la klerulojn de la tuta mondo. Sed jen mia patro, doktoro Harvey.

La homo, kiu ĵus eniris, momente konsideris min.

Konsternite, mi pasigis la manon laŭlonge de mia vizaĝo.
- Sed, mi subite diris, miaj trajtoj tamen ne ŝanĝiĝis kaj certe mi ne havas la mentonon de iu, kiu ne razis sin de antaŭ kvardek jaroj !

La doktoro ridetis :
- Estas la sama rimarko, rapide li diris, kiu igis min dubi komence pri via eksterordinara historio, kaj iuj eĉ supozis pri nura trompo. Hodiaŭ, niaj unuaj ekzamenoj instigis nin kredi, ke vi, nescie, transiris regionon de specialaj radioj, kiujn niaj kleruloj jam

malkovris kaj kies efiko ĝuste estus haltigi la biologiajn funkciojn, malakceli ĝisekstreme la maljuniĝon de la ĉeloj. Pro tiu kialo ni konfidis vin al niaj laboratorioj. Ni konis ĝis tiu ĉi tago nur la kriogenion por moderigi la vivon de la ĉeloj. Kaj ni nin demandas hodiaŭ, ĉu el via periplo vi ne alportis la formulon de doktoro Faŭsto ! Jen tial ni tre zorgas pri via "readaptiĝo". Certe, vi konstatos, dum ioma tempo, kelkajn perturbojn de via memoro.

Pensoj kirliĝis en mia cerbo. Kapturniĝo trafis min kaj mi vidis la doktoron ekkuranta al mi. Iom poste mi denove parolis :

- Estas terurege, mia edzino, mia infano ! Mi ne povas memori pri ilia vizaĝo !

- Jes, diris Katarina kun trankviliga voĉo, ĉio tio estas pasinteco, fora pasinteco. Provu esti trankvila. Zorgu vian vivon. Sed mi timas, ke la venontaj tagoj rezervos al vi surprizojn, ŝi aldonis enigme.

*

Dum la sekvantaj tagoj mi vidis repuŝi scivolulojn kaj ĵurnalistojn, kiuj senĉese alvenis al la vilao de doktoro Harvey. Mi restis malvigla, sentante neniun deziron rekonatiĝi kun la ekstera mondo. Katarina kompaniis al mi, provante prepari min al proksimaj renkontiĝoj.

Semajno forpasis. Poste, tiun matenon, mi diris al Katarina :

- Mi volas eliri el tiu ĉi domo, min miksi kun la hom-amaso, provi rehavi normalan vivon.

- Jen, ŝi diris, deziro, kiun mi atendis kun granda senpacienco. Ni tuj plenumu ĝin senprokraste.

## ĈAPITRO II
### La urbo, la strato.

Surprizis min unue la relativa silento, kiu ŝvebis super la urbo je horo, kiam la bruego de la veturado kaj la histerio de la urĝantaj piedirantoj estis al mi kutimaj. Nu, en tiu mezo de tago la cirkulado estis eta. Atentante, mi tiam vidis, ke la veturiloj ne multe bruas. Ĉiu el ili transportis ĉirkaŭ dudekon da personoj. Aliaj veturiloj, kun ĉi-foje tri sidlokoj kaj kies formo rememorigis pri niaj malnovaj "Isetta"-j, ŝajne estis kondukataj senĉese de ne sama ŝoforo. Ili haltis je signo de pasanto kaj iu aŭ alia vojaĝanto eliris el ĝi iom pli malproksime. Fine mi notis la ekziston de grandaj aŭtoparkadejoj ĉe la limoj de regiono tra kiu, evidente, la cirkulado estis rezervita al tiuj specoj de kolektivaj taksioj.

- Estas niaj elektraj taksioj ŝoforataj de ni mem, diris al mi Katarina. En la pasinteco viaj urboj estis saturitaj per la aŭtocirkulado, sed la plej multaj el viaj veturiloj ofte estis okupataj de nur unu persono. Tio estigis pro la strata obstrukco nekredeblan malŝparadon de rimedoj, malŝparadon, kiun ni lernis venki.

Plie, ŝi aldiris, la nombro da akcidentoj senĉese multiĝis kun la denseco de la strata trafiko. Por redukti ties oftecon, necesus tiam elekti aranĝojn neaprobitajn de multaj profesiuloj pri aŭtomobiloj, ĉar tiaj aranĝoj kaŭzus al ili gravajn perdojn de enspezoj.

- Kio do intertempe okazis tiel mirakle, mi demandis, por ke niaj malfacilaĵoj estu solvitaj tiamaniere ?

- Nu, respondis Katarina, ni simple ŝanĝis niajn monajn instituciojn, kaj hodiaŭ ĉiu opinias tute kompreneble uzi la aŭtotrajnojn, aŭtobusojn, enlandajn aerliniojn, telferojn aŭ helikopterojn ĉiufoje, laŭ okazo aŭ deziro. Ĉiuj tiuj transportrimedoj ne kostas pli ol la familiaj vojaĝoj per privataj veturiloj. Ni ŝparas tiel multajn laciĝojn. Kaj plie, ŝi aldonis, ĉiuj kontrolaj kaj prizorgaj operacioj pri la sekureco de la veturado estas senpagaj.

- Ĉu mi konkludu, mi ekkriis, ĉar tiuj senkostecoj

ŝajnis al mi tute strangaj, ke vi socialigis la uzadon kaj prizorgadon de la personaj transportrimedoj ?
- Ne estas ekzakte tio, diris Katarina. Vi komprenos la gravan kaj neanstataŭigeblan rolon de privata iniciativo en niaj novaj institucioj, kaj vi miros pro la etaj personaroj de nia burokrataro, kaj pro la granda libero ĝuata de ĉiu civitano. Fakte ni estas pli komunumanoj ol socialistoj. Sed, ŝi vive aldonis, ni prokrastu tiujn demandojn. Ni havos okazon reparoli pri tio laŭvice, kiam vi malkovros la diversajn aspektojn de nia vivo. Nur malfermu la okulojn por, komence, konstati tion, kio estas. Poste ? Nu, ŝi gaje diris, miaj amikoj kaj mi estas je via dispono por respondi al viaj kial kaj kiel.
- Kio agrable surprizas min, tio estas la zorgemo de la virinoj por sin vesti kaj sin ornami. Ĉu ni imagu, ke ili ĉiuj eliras el salono de beligado ?
- Nu, vi ne estas for de la vero, diris Katarina ridante tutkore. La spektaklo de la malbeleco kaj kripleco estas gajiga nek por tiuj, kiuj kutime vivas apud ĝi, nek por tiuj, kiuj preterpasas ĝin hazarde. Iam, la estetika kirurgio, la masaĝoj kaj la flegadoj de la vizaĝo estis tro altprezaj por multaj buĝetoj, kaj la peniga vivo de multe da virinoj devigis preskaŭ ĉiujn frue forlasi ĉian koketemon.

Hodiaŭ, ni pli ol dekobligis la kapablon de la salonoj de higieno kaj beligado, ebligis por ĉiu la ĝuon de ripozkuracado, kaj disponigis al la virinoj relative multajn estetikajn kirurgojn.

Ni konservis la diversecon de la vestado. Tio bone rilatas sendube al ia malmodereco en la provizado de la montrofenestro, sed la plezuro de la diverseco kaj la deziro de la virinoj krei al si personecon, estis konsideritaj kiel bezonoj ege homaj, al kiuj indas konsekvence dediĉi iom pli da okupoj kaj rimedoj. Tamen la modo ne ĉiujare ŝanĝiĝas, kiel antaŭe, kiam la teksindustriistoj klopodis nur por instigi al elspezado.

Kompense, la viroj perfekte adaptiĝis al la samaspekteco de kelkaj tualetaĵoj. Ĉiuj subvestoj estas fabrikataj laŭ samaj maniero kaj bona kvalito.. Tio ebligas al ni fabriki grandegajn seriojn preskaŭ tute aŭtomatigitajn kaj redukti konsekvence la laborokupojn en tiu fako.
- Kion vi faras do kun viaj senlaboruloj ? mi demandis.

- Ne maltrankviliĝu pri tio, Sinjoro Edders. Ni havas okupojn por la tuta disponebla kaj nekripla laboristaro. Nia tabelo de oficoj provizoraj kaj anstataŭaj estas multe pli granda ol dum via epoko, kiam estis proponataj nur la oficoj kapablaj rentodoni al kapitalo. Iu homo, tiam, povis vivi nur se alia homo trovis sian intereson en lia vivo. Hodiaŭ, ĉio utila, kaj teknike realigebla, enviciĝas en la listo de la taskoj plenumotaj. Tamen, estas nia ĉefa zorgo antaŭ ĉio utiligi la teknikan progreson por havigi al ni libertempon, sed libertempon kulturan, edukan.

- Tiu tuta parolado, mi diris, estas por mi tre stranga. Mi ja divenas, ke profundaj ŝanĝoj aliigis niajn ekonomiajn instituciojn, tial ke estas eblaj nun realigadoj, kiuj estis iam finance neentrepreneblaj. Mi avidegas ekscii, pro kio niaj institucioj modifiĝis.

- Silentu ! diris Katarina. Ĉiu morgaŭ havas sian zorgon. Ni estas invititaj al la morgaŭa kunsido de la Eminentula Komitato. Vi tie lernos pri la funkciado de niaj institucioj pli ol en du monatoj de niaj personaj enketoj.

Ni pasigis kvietan vesperon. Tiu tago havigis al mi mil sentojn novajn kaj kontraŭajn, sed mian timon anstataŭis akra scivolemo, kiun mi senpacience deziris kontentigi. La nokto estis tro longa laŭ mia plaĉo kaj, kiam alvenis la tagiĝo, mi estis feliĉa pro la perspektivo plue ekscii.

## ĈAPITRO III

La eminentula konsilantaro. La atribuado de la rentoj. La kartoj de senpageco. La stimuliloj. La etigo de la nombro de malkonsentaĵoj. La maljunaj subestroj.

La komitato kunsidis en konstruaĵo funde de granda parko. Ĉiu urbo, precizigis al mi Katarina, nepre deziris izoli de la eksteraj bruoj tiun gravan lokon por pripensado kaj decidoj, kiuj plejparte respondecas pri la vivkondiĉoj de miloj da individuoj.

Ekde la naŭa, la eminentuloj alvenis kun siaj teknikaj konsilistoj kaj sia personaro. La kunsidoj de la komitato okazas la unuan kaj trian mardojn ĉiumonate.

- Estas miniature vera Parlamento, murmuretis mi ĉe la orelo de Katarina.

- Pli ĝuste ministraro, ŝi diris, kaj resume ŝi indikis la kvaliton de la personoj, kiuj sidiĝis ĉe la diversaj tabloj.

Estis la prezidanto de la tribunalo, la notario, la direktoro de la elementa lernejo, delegito de la ordeno de la kuracistoj, fakultatestro, civitana legiestro, sociala asistantino, ekleziulo, reprezentanto de la sindikato de konsumantoj, kelkaj entreprenistoj, prezidantoj aŭ vicprezidantoj de sindikataj ĉambroj, kaj la urbestro, kompreneble. Tiuj kutime deĵoris. Laŭ la tagordo, okazis, ke oni kunvokis al tiuj kunsidoj la konserviston de Arbaradministrejo, la inĝenieron de ŝosekonstruado, la agronomiajn instancojn aŭ la direktorojn de gravaj publikaj instancoj.

- Gesinjoroj, ekparolis la prezidanto, la tagordo prezentita enhavas unue la ekzamenon de la projekto de etendiĝo de nia agronomia stacio, kiu postulas kvindek postenojn, jen estas ties listo, tio ĉi por kvarmonata periodo. Mi deziras koni la nunajn disponeblojn de la oficoj en jenaj fakoj.

Kaj li tutcitis ilin, ĉiu notis koncerne sin.

Tiam ekparolis la direktoro de la laborfako :

- Mia kara prezidanto, ni uzas nun en la provizoraj

oficoj, por kiuj ni havas, vi scias tion, grandajn bezonrimedojn, personaron el 225 homoj. Post kontrolmarkado de la disponeblaj fakuloj mi kredas, ke mankus al ni kelkaj elektristoj. Sed eble mia kolego de la mekanikaj industrioj konsentos ellasi kelkajn el siaj specialistoj?
- Sendube, respondis tiu ĉi, sed mi atentigas, ke la antaŭvidita liverado por la junuldomo suferos 15 tagojn da malfruo. Kion opinias la komitato pri tio ? Aliparte mi rimarkigas, ke konvenas proponi monpremion al tiuj translokotoj, kies oficaj vojaĝoj pli daŭros.

Post voĉdonado per levita mano la komitato jese respondis, kaj la prezidanto daŭrigis per la dua demando:
- Lastan monaton ni atentis pri la nesufiĉo de aerlinioj inter la ĉefurbo de la regiono kaj la marbordo. Nepre necesas malpliigi la veturadon sur la ŝtata vojo 24 dum la epoko de la jaraj festoj, kiuj okazas ĉe tiu marbordo kaj kiujn tre frekventas niaj samcivitanoj. Cetere ni ĉiuj estas favoraj al la sistema transporto per aviadiloj de la loĝantaro, kiu deziras viziti ilin. Mi proponas tamen fiksi prezon por tiu transporto, ĉar ankoraŭ ne reale eblas, pro la nombro relative malgranda da aparatoj disponeblaj por tio, servi senpage ĉiujn petojn. Tiu prezo respondos proksimume por ĉiu persono aŭ familio al la elspezo de la sama vojaĝo per aŭtoveturado, kun tamen eta rabato instiganta la vojaĝantojn preferi la aviadilon. Tiel iros al tiuj festoj nur tiuj, kiuj ĝis nun havis por tio monrimedon. Venontan jaron, se ni akiros kelkajn pliajn aerveturilojn, ni malpliigos tiun prezon profite al nova klientaro.

La tria demando estis la plej grava.
- Ni alvenas, flustris Katarina, al la revizio de la rentoj, premioj kaj monkompensoj.

La prezidanto ĵus malfermis dokumentujon kun ruĝa koverto.
- Estas prezentitaj al ni, li anoncis al la komitato subite silenta, petoj pri kartoj de senpageco por S-ro Honeger kaj por S-ino Peyrier. S-ro Honeger eniras en la kategorion de la maljunuloj, kiuj vivas solaj. Li ĵus fariĝis 75-jara kaj ĝis hodiaŭ li konstante enspezis etan renton. Mi memorigas al vi, ke, ĉe nia lasta kunveno, ni decidis, konsiderinte la malgrandajn bezonojn de tiu kategorio de konsumantoj, atribui al ili karton de ĝenerala senpageco, celante plisimpligi la operaciojn de estigo, disdonado kaj kontrolmarkado

de kreditslipoj. Ni opiniis, ke tiu faro ne riskos pliigi nenormale la tutan konsumadon. La ricevitaj informoj koncerne S-ron Honeger estas bonaj. Ni estas certaj, ke li ne troprofitos el tiu konsentita oportuneco. Cetere, se li trouzus ĝin, ni relokus lin en la normalan sistemon.

Tiel ni ŝparas tridekon da horoj jare, tridek horojn enskribotajn en nian konton "libertempo". Tiun ĉi monaton, kiel vi povas tion konstati, la diagramo de nia "enspezo" de libertempo indikas plialtiĝon de 9000 horoj, dank'al la sugesto de nia amiko Fournier, ebliganta duobligi la enmagazenigan kapablon de niaj 500 aŭtomataj distribuiloj, kies provizado de nun okazas meznombre nur ĉiun kvaran tagon.

S-ino Peyrier estas vidvino kaj ŝiaj bezonoj estas senluksaj. Sed ŝia rento estas tiel alta, ke ŝi neniam elspezis la tutan krediton de ŝia kreditslipo. Mi kredas do neutila daŭrigi ŝian enskribon sur la monata etato kaj se vi konsentos, ni atribuos ankaŭ al ŝi la karton de ĝenerala senpageco.

La prezidanto priparolis ankaŭ plurajn similajn aferojn. Li poste daŭrigis pri la kartoj de provizora senpageco.

Mi demandis duonlaŭte : Kio estas tio ?

- Temas, respondis Katarina, rekompenci la individuajn meritojn kaj pro tio la profitanto de tiu speco de karto rajtas havigi al si ion ajn en la limo de la sumo skribita sur lia karto. Tamen tiu karto validas nur dum periodo de unu ĝis ok tagoj. Tiel, karto de senpageco ĝis sumo de 500 frankoj ebligas al la profitanto akiri tiom da objektoj, kies maksimuma prezo estas 500 frankoj, tiom kiom da fojoj li prezentiĝas al la magazeno dum la valideco de sia karto.

Tiel ni povas mezuri niajn rekompencojn kaj instigi la fervoron al laboro inter la personaro de la entreprenejoj. Estas speco de loterio pri indeco, kies gajnanto elektus mem sian loton. Ĉiu urbo havas siajn normojn por atribuado de siaj "lotoj". Partoprenas al tiu originala loterio ĉiuj, kiuj distingiĝas per iu ajn rimarkinda socia ago. Mi forgesis diri al vi : la kunsidoj de la komitato nature estas publikigitaj per lokaj radiodissendado kaj televidado.

Mi diris :

- Antaŭ momento mi aŭdis la prezidanton paroli pri "magazenoj de donacoj". Kion tio signifas ?

Katarina denove kliniĝis al mi :
- En tiuj kolektivaj magazenoj oni ekspozicias valorajn aĵojn por kolektoj, rarajn objektojn, kiuj, se vendataj, atingus nekredeblajn prezojn. Tial oni preferas rezervi ilin por, okaze de solenaj distribuadoj, rekompenci eksterordinarajn servojn.

La prezidanto finis pri la senpagecaj kartoj. Poste venis la petoj pri plialtigo de la rento, la revizio de la rentindicoj kaj difino de la rento por la novaj loĝantoj en la komunumo.

- Kion montras la indico de la provizumado kaj tiu de la prezoj ? li demandis.

La loka komisaro pri la prezoj respondis. La prezindicoj iom malaltiĝis jam de unu semajno. Oni anoncis aliparte neniun antaŭviditan rompon en la stokoj dum la venontaj monatoj. Koncerne la sekurecan stokon pri la baza provizumado, ties kvanto plialtiĝis.

- Nia situacio, Sinjoroj, konkludis la prezidanto, ŝajnas al mi el la plej sanaj kaj ni devas gratuli ĉiun pro ties kunlaborado.

Poste li vizis la prezentitajn petojn. Tiuj ĉi konsistis el formularoj tre mallongaj, plenumitaj de la interesatoj mem, kiuj indikis la sumon de sia malnova rento kaj ankaŭ la oficon akceptitan de ili en la limoj de la komunumo. La deklaritaĵoj portis la vizon de la lasta paganta kaso kaj tiun de la nova labordonanto.

Ĝenerale la indicajn reviziojn rilate la pligrandiĝon de la familiaj ŝarĝoj oni aŭtomate konsentis : novaj naskiĝoj, kreskado de la infanoj, la familiaj kvocientoj estigitaj ne nur laŭ la nombro de la infanoj sed rilate ilian aĝon kaj lernejgradon. La indicajn reviziojn por sia personaro ĝenerale proponis la entreprenestroj.

Je la fermo de la kunsido ni foriris.

- Mi min demandas, mi diris, kiel la mastroj, la komercistoj, tiuj, kiuj estis en la pasinteco tiel ĵaluzaj pri sia sendependeco, konsentas hodiaŭ dependi de eminentuloj por scii pri la sumo de sia rento, esti sub la arbitro de iuj, kiuj, pro ia aŭ alia kialo, povus ja facile modifi ilian indicon ?

- Ankaŭ ni kredis, ke tiu obstaklo estos malfacile transpasebla, sed ĝi estis fine venkita, dank'al iuj trafaj antaŭzorgoj.

Sendube estis profunde maljuste, ke parto de la loĝantaro, nombre la plej grava, dependis en via epoko

de la arbitro de labordonanto por havi la rajton pluvivi, dum eta nombro favordonis al si permeson fiksi siamaniere kaj siaplaĉe la sumon de sia rento, ne donante pri tio pravajn motivojn.

Sed, verdire, tiu situacio jam grave evoluis dum la jaroj, kiuj antaŭis la grandan transformiĝon. Je tiu epoko, efektive, la industria kaj komerca giganteco aliigis rapide la malnovajn mastrojn en direktorojn aŭ en administrantojn salajratajn. La agrikulturaj kooperativoj same organiziĝis laŭ grandegaj entreprenoj similaj al anonimaj societoj kaj la plej granda parto de la sendependaj metiistoj fariĝis oficistoj je la servo de administrantaroj. Eĉ la familiaj entreprenoj estis ofte devigataj unuiĝi kun pli gravaj entreprenoj, starigi societon, se ili deziris konservi sian vendkapablon.

La novaj institucioj, kiujn ni volis realigi, respondis tro al tiu bezono de sekureco, por ke ĉiu ne vidu en tio konkretan avantaĝon por si mem.

Al la ekonomie gravaj uloj ni povis diri : "Ĝis tiu tago, vi taksis mem la sumon de viaj konsumrajtoj. Nu! de nun estos same. Jen por vi slipo de speciala kredito. Skribu sur ĝi la sumon, kiun vi deziras. Aŭ ankoraŭ : jen karto de ĝenerala senpageco. Ne trouzu ĝin. Se viaj konsumelspezoj estis ĝis nun praktike nelimigitaj, devas esti same per tiu nova sistemo. Ĉefas nur, ke ĉies parto ne estu etigita rilate al tio, kio ĝi estis antaŭe."

Fine, al tiuj, kiuj montris hezitemon por publike konigi la ekzaktan sumon de sia rento, ni diris : Multe pli da personoj ol vi kredas jam scias pri via rento : via eksperto-kontisto, via impostisto kaj lia personaro, viaj kolegoj, viaj liverantoj, via bankisto kaj la kontistoj, via notario kaj liaj skribistoj, kaj aliaj personoj inter viaj parencoj.

Tamen, por kvietigi vian timon, ni liveros al vi ne unuunuran kreditslipon sed krediton dispartigitan en pluraj slipoj. Tiel neniu, krom la pagordonisto, konos vian nunan renton.

Tiuj mil etaj detaloj, ekzamenite en ĉiu persona kazo, ebligis al ni fine transpasi ĉiujn obstaklojn kaj ricevi ĝeneralan aprobon. Hodiaŭ vi ne trovus iun, kiu interŝanĝus sian situacion kontraŭ tiun, kiu estis la ordinara loto de via generacio.

Distribuadoj de esceptaj rentoj ankoraŭ okazas dum

iuj epokoj kaj cirkonstancoj : libertempaj foriroj, naskiĝoj, geedziĝoj, festoj kaj datrevenoj, familiaj festenoj, devigaj vojaĝoj, akcidentoj, plagoj, rabadoj, translokiĝoj, reenlernejiĝoj, ekzamenaj kaj konkursaj sukcesoj, rekompencoj por civitismaj agoj, jarfinaj gratifikoj, por agnostikaj sugestoj, por utilaj inventoj. Pri nia rekompencaro celanta la konkuran laborfervoron mi jam parolis al vi kelkajn vortojn. Ĝi ŝajnos al vi pli granda ol tiu iam uzata de viaj entreprenoj. Krom premioj, promocioj, plialtigo de la rentindico, medaloj, kalikoj kaj rubandoj, honoraj titoloj, favordono de senlabora aŭ de estreca ofico, socia promocio, ni povas konsenti al tiuj, kiuj taŭge montras sian civitan spiriton, senpagajn vojaĝojn, krozadojn, librojn, lotegon (vilao, tualeto, juvelaro, arta objekto ktp), ekspozicion de iliaj laboraĵoj, oficialan ceremonion por honori ilin, solenan akcepton, artikolon en la gazetaro, rubando de la civita legio kun ĉiuj ties gradoj, plimallongigon de la labortago, esceptan forpermeson, plifruigon de la emeritaĝo, sidlokojn en spektaklejo ĉe la vico de seĝoj por eminentuloj, bonan festenon, pli bonan loĝejon, atribuon de raraĵo aŭ fine karton de senpageco provizoran aŭ daŭran, ĝeneralan aŭ limigitan.
Ni havas ankaŭ niajn reĝojn kaj reĝinojn unutagajn, kiuj, dum sia efemera reĝado, vidas ĉiujn siajn dezirojn plenumitaj.
Kiel vi konstatis, la kunsidoj de la eminentula komitato estas publikaj kaj tiuj de grandaj urboj estas televidigitaj per regiona teledissendilo de eta trafdistanco rezervita por informado al la konsumantoj. Nun tiuj ĉi estas pli bone informitaj ol iam pri la debatoj de siaj magistratanoj. Ĉar la demandoj pri interesoj ligitaj al la rajtoj de la privata proprieto estis forviŝitaj, neniu sekreto nun ĉirkaŭŝvebas dum la interkonsiliĝoj de niaj asembleoj. Ni realigis laŭvorte veran rektan demokration, tial ke la direktantoj konstante agas kun la partopreno, la kunlaborado de la publiko, konsumantoj kaj uzantoj, kaj sub ties kontrolo.
Tre larĝa malcentralizado de decidpovo estas la regulo. La transdono de respondeco atingas plej ofte la nivelon de entreprenestro, kiu havas aŭtoritaton al la de li administrata personaro. La entreprenestro decidas kutime je sia ŝtupo pri la plejmulto el la

diskutendaj okazaĵoj. Ĉe la supera ŝtupo oni trovas la profesiajn ĉambrojn, kie ĉiu mastro konsiliĝas kun siaj kolegoj kaj tiu komuna praktikado ŝparas multe da mispaŝoj.
Kiam okazas, ke tiuj ĉambroj opinias sin nekompetentaj, la malkonsentoj estas transsenditaj al la interprofesiaj komisionoj kaj nur en lasta apelacio al la specialigitaj komisionoj ĉe la eminentulaj komitatoj. Tiu dispartigita malcentralizado grave helpas la transsendon de la dokumentoj, el kiuj multaj ne eliras el la kadro de la entrepreno aŭ de la komuno.
La plej larĝa iniciativo estas lasita al la respondeculoj je ĉiuj gradoj por solvi mem, ne sin turnante al superulo, ĉiufoje kiam afero ŝajnas negrava kaj kiam la decido ne grave implikas la sorton de la interesata entrepreno aŭ administracio. Pri tio, ni adoptis la usonan sistemon nomitan "proceduro" por difini la zonojn de transdono de aŭtoritateco. Aliparte nia sistemo jam ebligis forigi proksimume naŭ dekonojn de la demandoj iam debatitaj antaŭ la tribunaloj kaj pri kiuj ĉefe zorgis viaj administracioj. Mi volas mencii la demandojn rilate al monaj transdonoj, interŝanĝoj, same kiel la multegajn malkonsentojn rilate la proprietajn rajtojn. Iam, maljuna laboristo estis konsiderata kiel malmulte profitdona, kaj se, pro hazarda kialo, li perdis sian oficon, li devis atendi foje longtempe antaŭ ol retrovi alian, kaj multaj submastroj devis kontentiĝi plej ofte per malpli pagataj oficoj, en kiuj la plej multaj vidis sin uzataj ekster komuna saĝo.
Hodiaŭ, ĉiuj, kiuj havas socian utilon, kiel ajn etan, estas invitataj okupiĝi laŭ sia plej bona efikeco. Maljunaj subestroj, emeritoj, personoj ankoraŭ laborkapablaj, kiuj deziras plilongigi sian aktivan karieron, tiel figuras kiel teknikaj konsilantoj en la sino de la komisionoj starigitaj de la eminentulaj komitatoj. Kaj tiuj, kiujn vi iam vicigis inter la senvaloruloj, nepre sentas realan moralan revigliĝon, sciante sin ankoraŭ utilaj al aliulo.

## ĈAPITRO IV
### Inĝenieroj kaj financistoj

Ni jam faris kelkajn paŝojn, kiam iu alparolis Katarinan. Estis viro sesdekjara, belaspekta, kun delikata vizaĝo esprimanta grandan inteligentecon. Katarina ŝajne estis tre feliĉa pro tiu renkonto :

- Mi prezentas al vi nian amikon S-ro Chester, ŝi diris al mi. Li estas intima amiko de mia patro. Kune ili batalis por triumfigi la ideojn, kiuj estis ĉe la origino de niaj realigadoj.

- Sinjoro Edders, ĉu ne ? diris la kunulo de Katarina. Kiu ne rekonus vin ? Dum la tuta semajno en la ĵurnaloj senĉese temis pri vi. Mi nomiĝas Chester, William Chester kaj mi estas inĝeniero.

- Nu, mi diris, ni do konatiĝis, sed meze de vi mi eble figuras iomete kiel Marsano, aŭ prefere kiel antaŭhistoria homo !

- Jes, ni ĉiuj konjektas pri via miro retrovi, post kvardek jaroj, vivkondiĉojn tiel absolute malsamajn al tiuj, kiujn vi konis. Ne kredu tamen, li aldiris, ke tiu aliiĝo efektiviĝis sen malfaciloj. Ni atingis tiun deziratan rezultaton nur "senpasie", t.e. sen interrompi, iumomente, la produktadon kaj distribuadon de la utilaj produktaĵoj kaj servoj kaj tio realiĝis nur dank'al antaŭa reĝustigo, laŭ skizo, de la diversaj fazoj de la operacio.

- Laŭ via diro, ĉu oni kredu, ke la korporacio de la inĝenieroj aktive partoprenis en tiu realigado ?

- Mi estas feliĉa, li diris, ke vi havis tiun ideon, ĉar la kunhelpo de ni, inĝenieroj, estis vere decidiga.

- Ĉiuepoke, la inĝenieroj aktivis por venki la utopiojn kaj jen ili malkovris iom post iom la plej pereigan, kiu baras la homan progreson, la plej obstinegan el ĉiuj, kiujn ili kontraŭbatalis ! Ĉu la financistoj ja ne pretendis ordigi plej bone la produktadon, por la ĝenerala intereso, uzante malnovajn monajn ilojn, kies senefikeco, rilate la entutan nocion de la Homo, ne plu estis pruvota, tiom ĝi evidentiĝis ?

Ĉu ili ne asertis ankaŭ la ĉefbonegecon de sia sistemo, aranĝita por daŭri jarcentojn, tiel rimarkigante la senutilon klopodi por substituoj, studadi novajn formulojn ? Nenio estas pli danĝera, oni aŭdis ripeti ĉiuokaze, ol repridiskuti ĉion kaj konfuzegi ĉion, kiam oni ne scias, kion oni metos anstataŭ la ŝanĝotaĵo, kaj la iniciatantoj de grandaj projektoj estis malhelpataj per la mokema kaj malamika skeptikeco de la konservativuloj same kiel de la sindeteno de la sociaj respondeculoj, kiuj tute ne deziris, pro praktikaj kialoj, sin riski al aventuro.
Sed la inĝeniero tiam ekincitiĝis pro tiu mona malcerteco, pro la kondiĉoj metitaj al la kredito, pro la vetooj kaj la tabuoj, kiuj ne ĉesis paralizi liajn iniciativojn, pro la minaco, kiu pezis sur la maljunaj subestroj, kulpaj nur ĉar ili perdis sian profitdonan kapablon. Li ribelis antaŭ la evidenta intenco de la financisto asocii lin kontraŭvole, kontraŭ lia bona konscienco, al tiu prostituado de la teknikaj kaj scienca progreso pli kaj pli orientata, inverse al la humana progreso, je la servo de la profito kaj kapitalo.
Duone neŭtraligite pro sia nekompetenteco pri ekonomiaj sciencoj en la konflikto, kiu kontraŭigis lin al la financisto, la inĝeniero, se li bonvolus konsenti la penon informiĝi, povus, en proksima morgaŭo, konkeri la ĉefecon koncerne la utiligadon kaj la kontroladon de la oficaro, kaj certigi al si la superregon dela produktado por adapti ĝian celecon al la nuraj homaj bezonoj.
Kutimante al la teknikaj traserĉoj, skizoj, provoj, malamiko de l' proksimumeco kaj de falsaj elokventecoj, en rekta kontakto kun la konkretaj realaĵoj, kun la materio kaj la homoj, kulturante ĝis alta ŝtupo la emon al analizo kaj sintezo, li ja devis sin montri kapabla malgravigi la senpovon de la profesiaj "mandarenoj" forĝi novajn solvojn al la siatempaj problemoj. La inĝeniero devis efektive sin persvadi, ke tute ne maleblis imagi rimedon por havigi al ĉiu ties parton de enspezo, alian ol tiun, kiu konsistis konfidi al financistoj la mastrumadon de stoko da aĉetrimedoj, kun misio cirkuligi ĝin de mano al mano. Pagi la homojn ne laŭ tio, kion ili vendis, sed laŭ tio, kion ili faris, ankaŭ konsenti enspezojn laŭ la bezonoj, ekster ĉiu kontregistrado de la labortempo, probable

estis tio unu el la plej bonaj rimedoj por forviŝi la financistojn el la ekonomia scenejo.

Tamen, ĉar ni notis, ke la produktado, je la jam atingita nivelo, jam kontentigis la konsumadon de tiuj lastaj, dum ili partoprenis ĝin nek materie nek teknike, ni povis esprimi la hipotezon, ke estos same, se morgaŭ iliaj oficoj estos tute forigitaj. Redungite en nemalutilaj oficoj aŭ ĝuante feliĉan emeritecon en malpli aĉaj ludoj, ĉu tiuj, kiuj estis iam devigataj uzi ĉiujn rimedojn por bremsi la utilan produktadon kaj mezuri la aĉetpovon de la homomultoj, ne akceptos danke tiun liberigon, tuj kiam sama enspezo certigos al ili parton de konsumado kiel antaŭe ?

Do la horo venos por la inĝeniero forskui la jugon, pensi pri si mem kaj siaj samsortuloj, plenumi sian socian rolon naciskale. Neniam epoko estis pli favora por la korporacio de la inĝeniero fervore kaj persiste entrepreni realisman studon de la Ekonomiko, rektan ekzamenon de ĝia funkciado, analizadon de ĝiaj mankoj, starigadon de efikaj kaj daŭraj rebonigoj.

Por tiri vian civilizacion el la kotejo, kie ĝi enmarĉiĝis, bone estis sin turni al inĝenieroj edukitaj per la metio, prefere ol al tiuj bonsocietuloj, ornamitaj per la titolo de teknikisto, sed kiuj dum sia vivo neniam enmanigis ilon, nek frekventis uzinon, laborejon kun ties problemoj, konsekvence nemulte taŭgaj por tuj bone kompreni la konkretecon de la homaj problemoj.

Sendube, la junaj teknikistoj, kaj ankaŭ multaj entreprenestroj, ege superŝutitaj de siaj profesiaj okupoj, disponigis sian kunlaboradon kun ia sindetenemo. Sed inter la maljunaj inĝenieroj, malbone utiligitaj, dungitaj kun rabato, aŭ konsumiĝantaj en senkuraĝiga senokupeco, multaj estis tiuj, kiuj entuziasme plene konsentis pri tiuj novaj perspektivoj proponitaj al ilia kompetenteco. Kaj konvenis al tiuj ĉi iniciati la starigon de studgrupoj kun nete difinitaj celoj, helpantaj la agojn de la sindikatoj de konsumantoj, pri kiuj mi parolos al vi poste.

Nenio povis prezenti pli grandan urĝecon ol la studado kaj la reĝustigo de novaj strukturoj ebligantaj la harmoniigadon inter la kolektivaj kaj la individuaj interesoj laŭ ia Ekonomio en kiu, dum la malabundo malgraviĝis, la natura inklino de la prezoj emis al tuta ruiniĝo, ĉela fino de neantaŭviditaj ŝanĝiĝoj, kio do bone implicis

la neceson inventi novajn formojn de distribuado de la enspezoj.

Familioj, studentoj, agrikulturistoj, komercistoj, maljunuloj, salajruloj, subestroj, inĝenieroj, impostpagantoj kaj konsumantoj, senrajtigite, asociite al ĉiuj, kiuj kontraŭvole suferas pro konsekvencoj de la sociaj malordoj, devis akiri la absolutan certecon, ke nenio pli bona venos mildigi ilian zorgon, tiel longe dum la iamajn ekonomiajn kaj monajn strukturojn ne anstataŭos aliaj "skemoj" malpli nenormalaj.

## ĈAPITRO V

La utilaj taskoj.

La inventaro de la dezirataj realigoj.

Dum miaj lastaj klopodaj iroj kaj reiroj mi ja observis tie kaj aliloke multajn realigojn, kiuj iam ŝajnus strangaj. Sendube ilia utileco evidentiĝis neneigebla, sed la plejmulto havis la nuran malpravon esti, laŭdire de la financistoj, ne sufiĉe rentodonaj kaj tial ilia efektivigo estis ĉiam prokrastita.

Tiun tagon mi rimarkigis tion al Katarina, kiu sin montris tute feliĉa kontentigi mian scivolemon :
- La inventaro de la dezirataj realigoj, ŝi konfidis al mi, estis daŭre kompletigata de la eminentulaj konsilantaroj. Tiuj ĉi tre konsideris la sugestojn esprimitajn de la loĝantaro, kiu deponis siajn dezirojn en tiucelajn fakojn dislokitajn en ĉiujn kvartalojn de la urboj kaj en la plej etajn vilaĝojn. La apartigon efektivigis specialigitaj komisionoj, kiuj studis la reefikojn sur la okupojn, la provizumadojn, kaj esploris la sliparojn de manlaboro. Kiam devis okazi elektoj, kiam aferoj fariĝis nepre necesaj, tiam la decidoj estis arbitraciitaj ĉe la lokaj aŭ regionaj komitatoj post kunigado de la elementoj de informado, estigo de la kvantoprojektoj pri energio kaj materialoj rilate la celitajn aranĝojn.

La vasteco de la utilaj taskoj, ŝi plu diris, kiujn ni povas entrepreni, estas limigita nur per tio disponebla de niaj personaroj en la petitaj korporacioj. Tial ke, nun, la biena spekulacio estas nur malagrabla memoraĵo, la verdaj spacoj ne ĉesas multiĝi en la plejparto de niaj urboj. Multaj inter ili anstataŭis tute nature ĉe ties lokoj la malsanigajn domarojn proporcie al ilia malapero kaj post reloĝigado de la okupantoj. Niaj maljunuloj profitas al vivkondiĉoj ege plibonigitaj. Vi ne plu retrovos postsignojn de viaj malbelegaj hospitaloj, kien enfalis, ellasitaj de la socio, enkazernigitaj en komunaj ĉambroj, tiuj, kiuj, je la aĝlimo, estis devigataj eliri el sia loĝejo, pro neeblo elpagi

la luprezon, aŭ tiuj, kiujn iliaj familioj forlasis por nek nutri nek flegi ilin, kaj precipe por ne loĝi kun ili en tro malgranda loĝejo.
La izolitaj maljunuloj, kiuj formulas tion per petskribo, estas akceptataj en emeritejoj aŭ en speciale aranĝitaj individuaj loĝejoj, por ke ili konservu siajn ŝatatajn kutimojn, meblojn kaj objektojn.
Pri kio ili okupiĝas ? Nu, kiel ĉiuj maljunuloj ili deziras iom da humana varmo. Ili partoprenas, laŭ siaj ebloj, al utilaj laboretoj. Ofte oni venas intervjui ilin, peti de ili konsilojn, aŭskulti ilin rakonti siajn memoraĵojn, malvenketojn kaj sukcesojn. Multaj instruoj fontas el la rakontoj de la maljunuloj.
Aliloke, ĝardenistoj-pejzaĝistoj aranĝas kun fervoro kaj pasio florajn dekoraciajn temojn, ĉie kie la situo kaj la grundo estas taŭgaj. Ili zorgas pri la herbetaroj, dum purigistoj tute refreŝigas niajn ĝardenojn, plaĝojn, publikajn lokojn, stratarojn.
Telefonaroj estis instalitaj en ĉiuj domaroj por eviti al ĉiu okupanto klopodojn pri demandoj ofte solveblaj per telefono. Ni tiel eliminas malŝparojn de tempo kaj rimedoj, t.e. ke ni etigas per tio la nombron kaj oftecon de la iroj kaj reiroj de la veturadoj en la urboj, kaj ankaŭ la kvanton de konsumitaj materialoj kaj la eluzadon de la ilaroj.
Niaj trajnoj estas ekipitaj per televidaparatoj same kiel cetere la plejparto de la atendejoj, kie la publiko haltadas : ĉe kuracistoj, dentistoj, barbiroj, restoracioj, aviadilejoj, haloj de stacidomoj, manĝejoj de laborejoj, junulaj hejmoj kaj domoj, spektaklejoj dum la interaktoj.
Vi konas niajn domarojn por izolitaj maljunuloj. Ni havas ankaŭ studentajn domarojn hodiaŭ disvolvitajn je grado nekonata viatempe. Oni ne plu trovas studentojn malbone loĝantajn ĉe privatuloj aŭ en mansardoj. La aŭtotrajnoj estis pli multigitaj por la libertempuloj. Aliaj novaĵoj respondas la zorgon mildigi la neutilajn laciĝojn. Ni havas trotuarojn ruliĝantajn laŭlonge de la trajnoj kaj ruliĝantajn bendojn por la pezaj manpakaĵoj, liftojn en ĉiuj domoj ekde la tria etaĝo. Ĉiu hejmo posedas siajn aerumatajn matracojn havigantajn ripoziĝan dormon, tolaĵojn kaj vestojn neĉifeblajn, nemakuleblajn. Estas sidlokoj kaj ŝirmiloj en la atendejoj. La kuraclokoj estas hodiaŭ alireblaj de ĉiuj, kiuj ilin bezonas. Estas sonizolitaj niaj kutimaj restadejoj,

dum iam bruo malfirmigis la rentodonon de multaj konstruaĵoj. La meblotransportistoj ne plu pene suprenlevas per brakoj pezegajn ŝarĝojn al etaĝoj ; ili uzas aŭ eksterajn ŝarĝolevilojn aŭ ŝarĝveturiletojn inventitajn por ŝtuparoj. La leterportistoj rondire vojaĝas per etaj elektraj veturiloj. La bruantajn kaj tremantajn bormaŝinojn anstataŭas la ultrasonaj aparatoj. Vi vidos sur la kamparo bateriojn da traktoroj telekondukataj, kiuj ŝparas penon kaj tempon de la kamparano, ankaŭ multajn individuajn helikopterojn, kiuj ebligas al li mallongigi la daŭron de siaj vojiroj kaj efektivigi ilin sen malutila laceco.

Fine, ni tute speciale grave zorgas pri la sekureco de la personaro okupata en la industriaj establejoj kaj multaj laborejoj uzas studitajn lumigadojn kaj adaptitan muzikon, dum la komunaj transportoj plibonigis sian komforton.

Al tio ĉi aldoniĝas ankoraŭ mil facilaĵoj por la mastrumantinoj pri kuiritaj manĝaĵoj kaj kolektiva hejtado, dum batalionoj da familiaj helpantinoj estas je la dispono de la hejmoj.

## ĈAPITRO VI
La aĉetoj, la podetalaj vendistoj, la prezoj.

La morgaŭo estis la tago de la aĉetoj.

- Vi vidos, diris al mi Katarina, kiom nia vivo fariĝis pli simpla, kaj kiel ni eliminis la plej grandan parton el viaj malnovaj klopodoj.

Ĉiu kvartalo posedis sian ĉiovendejon. Mi retrovis tie la ĝeneralan dispozicion de la iamaj grandaj vendejoj. Agrable klimatizataj kaj kun facila aliro la ejoj estis same malplenaj je personaro.

- Mi memoras, mi diris, ke tiaj establejoj estis tre malbone konsiderataj de la etkomercistoj, al kiuj ili prenis la klientaron. Kiel tiuj ĉi sukcesas plu ekzisti hodiaŭ ?

- Ni solvis ankaŭ tiun problemon, respondis Katarina. Kiam la komitatoj proponis al ĉiuj etbutikistoj pli ol kvindekjaraj dumvivan renton samvaloran kiel la enspezo de la plej bona el iliaj pasintaj jaroj kaj konsidere ankaŭ al la antaŭe amasigitaj investoj kaj al la pliiĝo de enspezoj esperataj de la prokrastita ĝuo de konsuma ŝparado, la plejparto fermis la butikon kaj retiriĝis el la ofico, feliĉaj fine malembarasiĝi je la sklaveco de deviga kaj ofte senfara ĉeestado dum la atendado de la kliento.

Al la pli junaj oni proponis liston de oficoj kun salajro certiganta al ili la saman konsumelspezon kiel antaŭe, la saman aĉetpovon, sekurecajn garantiojn multege pli grandajn kaj perspektivojn de promocio ofte tre superajn al tiuj, kiujn iuj povis esperi en sia iama profesio. Cetere, multaj elektis utili al la provizumado de la ĉiovendejoj, al la kontrolado de la kvalitoj, pakado, prezentado de la varoj kaj do ne esti devigitaj ŝanĝi siajn laborkutimojn. Koncerne la aliajn, vi havos baldaŭ okazon rimarki la facilecon de ilia reenoficiĝo, tiel ampleksa estas la serio de la oficoj proponitaj de la nura industrio de libertempoj.

Cetere ne ĉiuj formalaperis. Strato Sankta Honorato

(St Honoré) en Parizo posedas ĉiam siajn butikojn kun ties mil delikataj kaj raraj mirindaĵoj, kaj en la kvartaloj, kie la komunikservoj restas malbonaj, oni ankoraŭ trovas tiajn "trafkŝtopadojn", kie, por la plezuro de la okuloj, la arto de montrado anstataŭis la histerian kaj malbelegan reklamadon.
Mi sendube mirigos vin, sciigante, ke, fakte, relative granda nombro da etkomercistoj tiel restis hejme. La plej granda parto el ili ja vidis iom post iom etiĝi la nombron de sia klientaro, logata de niaj ĝeneralaj magazenoj, sed neniu sekve suferis malaltiĝon de sia aĉetpovo.
Ĵaluzaj pri sia sendependeco, tiuj butikistoj ne trovis multajn barojn al sia libero fiksi mem sian labortempon kaj, kiel en pasinta tempo, ili respondecas nur pri si mem. Ĵaluzaj pri siaj respondecoj, ili sciis asigni al tiuj ĉi malsaman celon : provizadi sian klientaron per la plej bona kvalito, sen trompo kaj friponado, kun maksimumo da konsideroj, antaŭsenti ĝiajn dezirojn, konsili ĝin, iafoje gvidi ĝian elektadon.
La praktikado de la profesio, senigita je multaj el siaj servutoj, donis al ili pli multajn libertempojn ; tiuj homoj estis konsekvence disponeblaj por plivastigi sian socian servon al kampoj elektitaj de ili tute libere. Pro tio iuj dediĉas kelkajn duontagojn kiel konsilantoj, monitoroj aŭ gajigistoj en la mil aktivadoj de la libertempoj, pri kiuj ni havos okazon reparoli. Aliaj kontentiĝas religante sin kun la familia vivo iam flankelasita pro la profesiaj postuloj.
Neniu bedaŭras esti definitive liberigita de la kontregistradaj kaj fiskaj tedaĵoj. Ĉiuj povas ĝui, krome, feriojn pli longajn, pli oftajn, aŭ zorgi pri familiaj, mastrumaj okupoj, dum "anstataŭantoj" certigas la akceptadon de la klientaro. La interhelpemo anstataŭas la konkurencon.

*

Ni kviete vojiris nun laŭ la amasoj de produktoj kaj varoj ĉiuspecaj prezentataj al niaj rigardoj :
- Vi ekmiras, diris al mi Katarina, pro la foresto de reklamo, de ŝanĝbrilaj koloroj sur la pakoj de niaj produktoj ? Ne forgesu, ke ni celadas, ne plu larĝan vendeblecon, sed nur la plej altan nivelon de oferto

por pagi nur la plej malaltajn prezojn. Ni plivalorigas nian aĉetpovon laŭ maniero, kiu ŝajnos al vi paradoksa, ĉar ni klopodas kiel eble malplej konsumi, eviti ĉiujn disperdojn, dum via epoko devis submetiĝi al maldeca malmodereco de rimedoj cele plejeble konsumigi, ĉiuj pretekstoj taŭgis por akceli viajn interŝanĝojn.

Mi klinis min al kelkaj etiketoj :

- Jen io neverŝajna ! Kiel tiu skatoleto da pingloj povas esti ofertata je prezo pli alta ol tiu de la skioj, kiujn mi ĵus vidis ? Ĉu estas eraro de markado ?

Katarina iomete pripensis. Evidente, de antaŭ la pasinta monato la pingloj ricevis nenormalan prezaltigon, ĉar tiam oni povis havigi ilin al si senpage.

- Efektive mi ne komprenas, ŝi diris. Lastan monaton, tiuj pingloj estis senkostaj. Kial tiu subita prezaltiĝo?

Mi pli kaj pli miris. Ĉu oni distribuas objektojn senpage ?

- Ĉu tio ne similas al ege supera socialismo ? mi diris. Ni iam konis la socialigadon de kelkaj servoj, sed atingi socialigadon de objektoj tiel bagatelaj...Kia burokratismo estas la via ? Kaj ĉar devige la ŝtato aŭ la komunumo pagu la varojn al la fabrikisto, mi demandas al mi je kiu ŝtupo altiĝas viaj impostoj kaj kiamaniere fiksiĝas la asigno.

- Ni ne pagas impostojn, respondis Katarina, kaj la fabrikisto ne estas pagata laŭ la kvantoj da pingloj liveritaj de li al tiu magazeno, sed pro la servo farita de li al la kolektivo, pro lia klopodado, kaj la rento, kiun li enspezas, utilas al li por pagi nek liajn proprajn liverantojn, nek liajn komizojn, sed nur la provizumadojn necesajn por lia persona kaj familia konsumado.

Tamen, ŝi denove parolis, kial, diablo! la pingloj atingas hodiaŭ tian prezon ?

Mi ekkredis al mistifiko. Sed Katarina vokis oficiston:

- Kial, ŝi demandis, tia prezo afiŝita hodiaŭ por tiu artiklo, kiu, lastan monaton, estis libere disdonata?

- Sinjorino, ni havis akcidenton komence de tiu ĉi monato en nia provizumado kaj momente ni preskaŭ senas je ili. Tial ni altigis la prezon de tiu artiklo por bremsi la mendon. Tiu situacio estas tute provizora, li aldonis, kaj normaliĝos verŝajne proksiman tagon kaj vi havos tiam denove la artiklon senpage.

Mi tute ne plu komprenis :

- Kiel vi povas havi skiojn je prezo tiel malaltega,

kompare kun ilia fabrikkosto ?
- Mi atendis vian demandon, respondis Katarina. Sendube tiu artiklo estas konstruita el vitra fibro produktita en tre granda abundo. Sed ĝia prezo devenas rekte de la libera ludo de la leĝo de oferto kaj mendo kapabla nun ludi maltrans la plankoprezoj, kiuj en la pasinta tempo respondis al limprezo, trans kiu neeblis vendi. Iam la industriisto fiksis prezon laŭ la produktokosto, aldonante al ĝi marĝenon de profito, kiu supoze kompensis lian propran laborenspezon, tiun de liaj akciuloj, fine monrezervon por la renovigo de liaj ilaroj kaj por la financa amortizo de liaj instalaĵoj. La objekto havis tiam prezon de oferto, debatitan interkonsente kun revendistaro, kies salajro devis esti enkalkulita interne de la fina prezo.
Laŭ tiu prezo fiksita en konsento kun fabrikistoj kaj revendistoj, oni ofte rimarkis, ke la vendado estis, malgraŭ ĉio, tro malrapida por subteni ritmon de kontinua fabrikado, kaj okazis, ke listoj da objektoj restis nevenditaj dum longaj monatoj, dum la ilaroj ne estis uzataj laŭ kiel eble plej bona produktokvanto. Kaj se fikomercisto, "mallojala" konkuranto, elpensis oferti la saman produkton je malalta prezo, ĝenerale sekvis bankroto por tiuj, kiuj montriĝis nekapablaj konsenti samvaloran rabaton.
Kiam komercisto estis en ekstrema situacio, li rabate vendis, t.e. li malaltigis siajn prezojn, kaj eĉ nur malmulte malaltigante ilin, li estis certa vendi rapide la stokon.
- Nu, mi interrompis, kion pli bonan vi trovis ?
- Ĝuste nenion ! ridante diris Katarina. Ni nur aplikas tute rigore la teknikon de la "enadapto" pere de la prezo, kio ebligas hodiaŭ ekvilibrigi ĉiumomente produktadon kaj konsumadon, operacio, kiu iam konsumis la penon de viaj ekonomikistoj kaj de viaj reklamistoj. Sed antaŭ ol alveni al tio, ni havis multajn diskutojn pri la maniero formi niajn prezojn, ĉar multaj puŝoj de opinio ekkontraŭstaris tion.
La unuaj subtenis esence la laborvaloron. Tamen sufiĉis vidi kian malordigon de la prezskaloj estigus la alpreno de tiu sistemo, ĉar la laboro mem reprezentas, por la plejparto el la industriaj produktoj, apenaŭ 20 % el la oferta prezo. Ĉu tiu lasta ne estis peze ŝarĝita per taksoj, impostoj, rentoj, jarrepagoj de kapitaloj,

monrezervoj, amortizoj, profitoj, makleraj pagoj, ĝeneralaj elspezoj, makleristaj marĝenoj, asekuradoj ktp... Kaj plie, ni neniam finus la rekalkuladon de la kostoj, se ni konsiderus la senĉesajn reĝustigojn de enspezoj, ŝanĝadojn de kvalifikado. Tiu ĉi ideo estis forĵetenda, ĉar ĝi ekmontriĝis kiel praktika aplikado ege tro peza de klopodadoj, kaj ĝi postulus senmezuran burokratan aktivecon. Ĝi kaŭzus ankaŭ veran vundan ĝenon en la kutimoj de niaj konsumantoj. Fine la laborvaloro lasis senresponda la demandon pri la prezo de artaj verkoj, tiun de okazaj aĉetaĵoj, tiun de multaj servoj.
Aliaj sugestis firmajn prezojn akompanatajn de antaŭecaj kartetoj. Estus reveni al la kutimoj de la direktistaj skoloj, al la solvo de la porciolimigaj periodoj, kiujn konis ĉiuj postmilitaj generacioj, kaj nepre estiĝus maljustaj favoroj, negocaĉoj, ĉiuj aĉaj sekvoj naskataj de la prezdirektismo.
Fine ni adoptis la solvon plej simplan, plej racian, tiun, kiu postulis la plej etan imagopenon. Tiu solvo havis precipe la grandan meriton ne malhelpi ĉies kutimojn.
Ni adoptis kiel deirbazon la prezojn uzitajn dum la hieraŭo de tago T, kaj laŭ tiu solida bazo ni poste praktikis sinsekvajn malaltigajn procentaĵojn, kiuj fine, evidente, modifis profunde la primitivan skalon de la prezoj, sed tre progresive, kaŭzante nek malhelpojn nek malcertecojn por la familiaj buĝetoj.
Mi interrompis :
- Sed, praktike, kiel viaj prezoj estas fiksitaj ?
- Ni alvenas al tio, respondis Katarina. Por atingi la nunan strukturon de niaj prezoj, strukturon, kiu, cetere, senĉese modifiĝas, ni empirie procedis. Al la iamaj prezoj, tiuj, kiujn al ni via epoko postlasis, ni aplikis, kiel mi ĵus diris, seriojn da malaltigoj laŭ sinsekvaj ŝtupoj.
Je tago T ni tiel malaltigis unuforme ĉiujn prezojn je 15 % kaj ni atendis la rezultojn dum la unua duonmonato por ekscii kiel reagis surloke la nivelo de la provizumadoj. Iuj produktoj montris abruptan malabundon, kaj tio instigis nin plialtigi la prezon de tiuj artikloj ĝis ilia malnova nivelo.
Kompense, ni povis konstati, ke aliaj produktoj ne

vendiĝis je kadenco apenaŭ pli granda ol antaŭe kaj nova malaltigo je 15 % estis do aplikita al tiuj kategorioj de varoj. Poste oni tiel daŭre "serĉis la konsumanton" ĝis la limo de rompado de la provizumadoj. Kiam okazis tiu rompado, ni altigis la lastan prezon je 5 %. Konsumado kaj produktado alĝustiĝis unu al la alia tiam laŭ kadencoj preskaŭ najbaraj.
Vi vidas do, Sinjoro Edders, ke tiu sistemo de fluktuantaj prezoj tute kontentigas nin. Ĝi estas regata surloke, ĉiu komunumo estas libera fiksi siajn prezojn interne de marĝeno difinita tiel ke la loĝantoj de najbara komunumo ne estu logataj sisteme provianti ĝi ĉe la lokoj malpli karaj.
Organismo kunordiganta la prezojn funkcias regione, sed ĝi intervenas nur por korekti la mankojn de provizumado, en kazoj de troa malegaleco de la prezoj inter du najbaraj komunumoj.
- Sed, mi rimarkigis, se la interŝanĝoj efektiviĝas laŭ fluktuantaj prezoj, kiel la entreprenoj ekvilibrigas sian kontregistradon ?
- Nu, ridetante diris Katarina, tio ŝajnos al vi nekredebla, la entreprenoj tute ne plu zorgas pri la kontregistrada ekvilibro, pro la tute simpla kialo, ke, inter ili ne plu ekzistas spezoj, ke ili ĉesis finance dependi unuj de la aliaj ; ne plu kreditoj, ŝuldoj ne plu, pagdatoj ne plu, fakturoj ne plu, procesoj ne plu, komercaj malkonsentoj ne plu, bankrotoj ne plu, ĉiuj tiuj vortesprimoj tute malaperis.
Vi demandas al vi, Sinjoro Edders, je kia ludo ni ludas? Mi klarigos al vi aliokaze kial kaj kiel ni ŝanĝis la "ludregulon", tiun, kiun vi iam praktikis, kaj vi juĝos pri la kvanto da avantaĝoj, kiujn ni sciis tiri el tiu transformado farita al kelkaj el viaj konvenciaj reguloj, kiuj malhelpis vin profiti, kiel ni nun tion faras, el la plej bonaj fruktoj de la teknika kaj scienca progreso: abundo kaj libertempoj.

## ĈAPITRO VII
La senkostaĵoj. La konkurenco.
Ĝia socia kosto.

Konversaciante, ni eniris en ĉambregon, kie la publiko ŝajnis ne pli densa ol aliloke. Cento da plej diversaj produktoj estis ekspoziciitaj tie sub la mencio "senpage": alumetoj, salo, spicoj, serioj de objektoj el plasto kun etaj dimensioj, mikrokanelaj diskoj, elektraj ampoloj, tualetaĵoj, unuformaj ludiletoj, sapo kaj lesivo, minerala akvo, sukero, eta materialo por sporto kaj kampado, mulditaj ordinaraj ŝuoj, lerneja materialo, ludilaro, ordinara kaj norma ĉiutaga teleraro, societaj ludiloj, kartoj, ŝakoj k.c.

- Jen niaj senkostaĵoj de la monato, fiere anoncis Katarina. Tio ekspoziciita ĉi tie respondas al specimenaro de produktoj kaj objektoj, kiujn ĉiu povaŝ laŭbezone havigi al si senpage. Tial ke vi nun scias pri la fiksado de niaj prezoj, vi devas senpene kompreni, kiel la distribuado de tiuj produktoj, haveblaj en granda abundo, tute ne bezonas esti bremsata per prezoj. Estas same pri multaj servoj. Kiam la funkciuloj estas sufiĉe multaj por plenumi ĉiujn bezonojn, kiam la produktokvanto de la ekipaĵaro igas same neutila ĉiun porciumadon, ĉiufoje kiam ni estas certaj, ke ekzistas neniu obstrukco laŭlonge de la ĉeno de produktado de iu varo.

La senpaga pano ne okazigis vicojn de atendantoj apud la panvendejoj. Ni disdonas senpage akvon kaj gason sen konstati nekutiman altiĝon de la konsumado. Koncerne elektron, ni konservis ŝajnan tarifadon nur por bremsi la malŝparadon ĉe privatuloj. Efektive ekzistas unika tarifo por ĉiuj hejmoj, ludanta la rolon de moderigilo, ĉar ni opinias, ke la maniero starigi la familian enspezon proksimume korektas la diferencojn inter malegalaj konsumadoj. Se vi memoras la monajn akrobataĵojn de armeoj da ekonomikistoj por starigi "ĝustan" tarifadon, vi agnoskos, ke la farita progreso

estas grava.

Klientino haltis proksime de ni, mi rigardis ŝin dum momento :

- Kiel vi eksplikas, mi diris post tempeto, ke tiu persono ne estas tentata provizumi ŝin trans siaj nunaj bezonoj ? Ĉu tiuj senpagaj fakoj ne estigas malŝparon, trouzon ? Kiam vi metos en tiujn fakojn fiŝkonservaĵojn, ĉu vi ne opinias, ke tiam iuj uzos ilin por nutri siajn katojn ?

- Vere, diris Katarina, vi emas atribui al niaj hejmomastrinoj sentojn tute nigrajn. Mi konfesas ankoraŭ ne ekscii, ke iuj tute intence subakvigis kelkajn kilogramojn da salo, aŭ plezure frakasis siajn elektrajn ampolojn, aŭ ekbruligis sian fajron per lignaj kruroj. Certe ni ne povas malhelpi al malvirtuloj aŭ frenezuloj, por ke ili ne ĵetu sapon en riveron aŭ ne faru fajraĵon per dekduo da alumetskatoloj !

Tamen ni estas certaj, ke la malŝparoj, en via epoko, atingis alian amplekson, se oni konsideras la elspezojn por reklamado, militpreparado, kosmomaŝinoj, logistiko, kaj la ega burokrataro, kiu vivis per la leĝaro rilate al la proprieteco, ĉirkaŭ kiu negocadis armeoj da juristoj, batalionoj da redaktoroj kaj da skribistaĉoj, multaj procesoficejoj. Sendube vi opinias iom eksterordinare, ke tiu "rekta prenado", limigita verdire al unu du centoj da komunuzaj artikloj, ne instigas al akaparado ?

Evidente, la akaparemo respondis iam al instinkto de antaŭzorgo, instinkto, kiu instigis ĉiun friponi, tuj kiam okazo prezentiĝis, tuj kiam oni ne riskis esti kaptita. Kolektivaĵoj, kiuj fondis la "memservon" en iuj ejoj, bedaŭregis tiun "ŝtelemon" tiam tiel kutiman. Aliparte, tuj kiam prezo ŝajnis avantaĝa, ĉu oni ne vidis la homojn rapide "provizumi sin", esperante tiel ŝpari parton de sia enspezo, sciante, ke la prezmaltiĝo ja ne daŭros. Kio tiam okazis ? La morgaŭon, la stokoj etiĝis, la prezoj altiĝis kaj la loĝantaro malhavis dum tempo provizojn, sen tamen tro protesti. Hodiaŭ tio same okazas, sed la malabunda provizado en niaj fakoj "senpagaj" estas malofta. La senpageco efektive alvenis iom post iom kaj dum tridek kvin jaroj ni neniam suferis longdaŭran malabundon de la artikloj, por kiuj estiĝis la senpageco en la "renkonto de la prezoj kun la aĉetantoj" ĝis la finlimo, t.e. nulo.

Fine, niaj senpagaĵoj koncernas ankaŭ servojn, kaj tiujn oni ne stokas, do ne akaparas. Ni devas nur atenti pri bona funkciado de tiuj servoj. Sed ĉiu agnoskas, ke la senpageco de multaj servoj, iam multekostaj, ege helpis plibonigi la aĉetpovon de ĉies enspezoj. En nia sistemo ne plu ekzistas tiaj duoblaj oficoj, kiujn neprigis la iama konkurenco. Oni ŝuldis al tiu ĉi ĉiaman mobilizadon de milionoj da personoj, kiuj oficis por aranĝado kaj modernigado de la komercoj, por reklama industrio kaj ties branĉoj, por la esplorado de la merkatoj, por la prezstudoj, kaj pro la multeco de markoj kaj agentejoj ĉiuspecaj : vojaĝoj, asekuroj, bankoj, servostacioj, bienaj agentejoj, transportoj, ĉiu kun siaj ejoj kaj ties fako, sia direktora kaj ofica personaro, siaj kontistoj, siaj propraj investadoj. Sed tiu multeco de duoblaj oficoj kondukis al ega malŝparado de homa peno kaj de naturaj vivrimedoj, kio limigis la amplekson de la produktado uzebla de la konsumantoj. Je la nomo de la konkurenco, ĉiu entreprenestro sekrete deziris la fizikan aŭ komercan morton de siaj konkurantoj, ilian finan malvenkon. La plej forta venku! Sed ne temis pri la plej forta laŭ merito, inteligento, moralaj aŭ profesiaj kvalitoj, nek pri la plej honesta. Iu ajn analfabeta malŝatindulo, se li nur sukcesis belan monŝteladon, povis, sin riskante siavice en kelkaj aferoj, frakasi multajn etajn familiajn entreprenojn. Se komparitaj kun tiuj de via epoko, niaj malŝparoj, almenaŭ tiuj konsekvencaj al kelkaj esencaj akaparadoj, ne estas gravaj. Dum, en la estinteco, instituciigitaj, ili servis kiel helpo al la ekonomia aktiveco, ili estas nun daŭre elpelataj.

Sed nia reĝimo krome disponas efikan barilon kontraŭ la senkonsideraj malŝparoj, t.e. la sankcio de la prezoj. Iam tiuj, kiuj havis multe da mono, povis senpune malŝpari ĝin, kaj parto de via produktado estis tiel destinita por plene satigi iliajn plej multekostajn plej ekstravagancajn bezonojn, dum restis malkontentigitaj la elementaj bezonoj de la plej granda nombro da homoj.

## ĈAPITRO VIII

La karto de monkredito.
Nova mono. La karto de kredito.
Ĝia uzo. La impostfraŭdantoj.

Alveninte apud la elirejo, Katarina, kun siaj aĉetaĵoj, postiĝis al atendantaro. Kiam venis ŝia vico, ŝi deponis la objektojn sur la ruliĝantan tapiŝon, dum la kasistino enskribis la prezojn, evidente ne kalkulante la senpagaĵojn.

Kun sia kupono ŝi tiam iris al dua kaso simila al kontmaŝino iam uzita en la bankoj. Ŝi prezentis slipon el sia sako, kaj la oficisto faris numeron sur klavaro kaj aperigis kontoslipon, sur kiu estis notitaj la antaŭaj aĉetoj.

- Ĉu vi saldas hodiaŭ ? li demandis.

- Jes.

La kasisto tiam ekplenumis duoblan operacion. Li enskribis sur la monata slipo la sumon de la lasta aĉeto de Katarina ; la ĉiomo aperis, tuj enskribita sur la kreditkarton de Katarina. La saldo tiel efektiviĝis per simpla enskribo. Neniam estis necese kalkuli monon, redoni monerojn, registradi la pagon en kontlibroj.

- Estas mirinde, mi ekkriis, vi tiel manipulis neniun monon, neniun bankbileton, neniun ĉekformulon. Cetere vi promenas kun via kontoslipo mem, tiu iam konservata de la bankoj. Vi uzas ian monon de konsumado, kiu malaperas dum la pago de viaj aĉetoj, kies sumo ne estas transdonita al la posedanto de la varo.

- Tio, kion vi diras, precizigis Katarina, estas samtempe ekzakta kaj neekzakta. Fakte, ne ekzistas posedanto de la varo, se ne tiu, kiu havigas ĝin al si cele al konsumado aŭ uzas ĝin por sia propra utilo. Aliparte, kaj vi tion tuj konstatos, ni uzas ankaŭ moneron kaj eĉ foje transdoneblan monon same kiel dum la tempo de via bona malnova kapitalismo !

Montrokestoj prezentis al la preterpasantoj sortimentojn da floroj.

- Tiuj homoj, diris Katarina, deziras gajni iom da kroma mono. Ne forgesu, ke ni estas dum sabato, tago de "libera laboro" t.e. laŭvola. Estas normale, ke tiuj, kiuj deziras servon de aliulo, pagas mem la servantojn. Kaj pro tio vi vidas tie aĉetantojn, kiuj pagas per mono.
- Sed, mi diris, kion faras la servantoj per tia mono, kiu ne estas akceptata en la vendejoj ?
- Nu, ili povas aŭ redoni ĝin al la ŝanĝkaso de mono, kaj la responda kredito estas aldonita sur la monata karto, aŭ ankaŭ reuzi ĝin siavice por akiri tion, kion vi iam nomis "nigran laboron" efektivigitan ekster la tempo postulata de la komunumo por la socia servo. Tamen ne iluziiĝu pri la gravo de la sumoj enspezataj per transdono de tiu cirkulanta mono. Por eviti ĝian akumuladon, ĝia indika signo estas ŝanĝota ĉiun trian aŭ kvaran monaton. Ties posedantoj estas tiam devigataj transdoni tian monon sur sian kreditslipon. Plie, ĉiu kontposedanto rajtas havi ĉiumonate da tiu mono nur etan procentaĵon de sia kredito, kio konsekvence limigas ĝian cirkulantan kvanton.
- Se mi bone komprenas, vi disponas pri du monspecoj, la unua estas kreditkartoj netransdoneblaj, kaj la alia, kiun vi estus doninta por aĉeti tiujn florojn ?
- Ni havas ankaŭ trian specon de mono, diris Katarina.

Mi ekopiniis la uzadon de ĉiuj tiuj monoj tre malsimpla. Tial ŝi vigle aldonis :
- Cetere, ĉu vi ne havis iam ankoraŭ pli grandan nombron da pagrimedoj : akcioj, asignoj de la ŝtata kaso, kuponoj, ĉekoj, ĉiu banko havis la siajn, kaj monpremioj, kalkulmarkoj, kambioj, kion ankoraŭ mi scias ? Ĉu la pagrimedoj, ĉiutempe, ne estis ege diversaj ? Anstataŭiginte ĉiujn tiujn monajn signojn kaj pagformulojn per nur tri, ni opinias, ke ni ege simpligis la operaciojn, kiuj, dum la lasta jarcento, okupis multajn homojn pri kontado kaj cirkulado de la mono kaj ĉiuj ĝiaj surogatoj.

Tiu tria mono, pri kiu mi aludis, prezentiĝas sub formo de libretoj analogaj al viaj malnovaj poŝtmarkoj, kiujn ni ne plu uzas por almenaŭ la interna servo, ĉar la poŝto estas senpaga same kiel la telefono. Tiuj markoj estas liverataj, same kiel la cirkulanta mono, ĉe la giĉetoj de la ŝanĝkaso kontraŭ notado de la kreditslipo. Baldaŭ, mi esperas, vi havos okazon

vidi kiel ni uzas ĝin.
- Sed kio okazas, kiam oni perdis sian slipon ?
Katarina montris la sian :
- Vidu, Sinjoro Edders, ĉiu slipo surhavas presitan foton de sia posedanto kaj specimenon de lia subskribo, kiu utilas por aŭtentigi la prokurojn. La hipotezo pri ŝtelo estas apriore escepta kaj ĉiu perdita slipo ĝenerale reiras al sia posedanto post kelkaj horoj aŭ tagoj. Atendante, la koncernato povas peti de la kaso de sia kvartalo alian slipon ebligantan al li debeti siajn elspezojn proporcie laŭ la restantaj tagoj ĝis la finiĝo de la valideco.
- Sed ĉu oni ne timas la rekulpulojn dezirantajn tiamaniere pliigi sian enspezon ?
- La slipoj estas laŭnomaj, do la rekulpo ne povos fariĝi kutimo. Se la koncernato sin turnas al kaso en urbo, kie li ne estas enskribita, la debeto estas sendota al lia propra kaso, kiu notas tion.
- Tiel vi estas nur duone ŝirmitaj kontraŭ la trompoj?
- Evidente, ni ofte konsideris, ĉu necesus starigi kontrolan policon cele al malkovro de tiuj malbonaj civitanoj. Poste ni kontrolmarkis la punindajn farojn. La nombro de la kulpuloj aspektis tiel malgranda kompare kun la rimedoj, kiujn ni estus uzontaj por malkovri ilin, ke fine ni preferis nur prove esplori, kaj ne kontraŭstari.
Cetere, ŝi aldonis, ĉu vi ne subtenis loteriojn kaj hazardajn ludojn, kiuj ebligis al la plej bonŝancaj dekobligi siajn enspezojn dum ono de sekundo ? Nu, ni opinias, ke la riskemuloj, punitaj pro malsukceso, similas al viaj obstinegaj ludemuloj. Sed en via epoko estis multaj akraj maljustaĵoj ; ĉar ĉiu ŝuldis sian enspezan parton, plej ofte, al hazardo aŭ bonŝanco, al okaza cirkonstancaro, kaj foje ankaŭ al malhonesto kaj malmoralo.

*

Ni vidis poste areton da personoj starantaj antaŭ giĉeto. Ĉiu prezentis al la stampado unu aŭ plurajn markojn kaj ricevis interŝanĝe tioman kvanton da disketoj.
- Tie ĉi, klarigis Katarina, oni disdonas disketojn por aŭtomataj distribuaparatoj kaj vi tuj komprenos la rolon de nia monkupono.

Multaj stratvendistoj, etaj riparistoj, metiistoj ne posedas tiujn kontmaŝinojn, kiujn vi vidis funkcii en la ĉiovendejo. Kiam servo estas enskribita sur baremo, ni pagas ĝian prezon rekte al la servanto per monmarkoj. Tiuj markoj plenumas la servon de ĉiouzaj kuponoj. Ili anstataŭas samtempe viajn biletojn por manĝoj, publikaj transportoj kaj eniroj en la spektaklejoj.

Ŝi tiris kelkajn markarojn el sia sako.

- Jen, ŝi diris, markaro je 10 frankoj, kaj alia je 50 frankoj. Ni havas ankaŭ foliojn da monmarkoj je 20, 100, 200, 500 kaj eĉ je 1000 frankoj.

Vi ja komprenas, ke estus senfine, se oni estus devigata notigi sian slipon por pagi tiel etajn elspezojn. Do ni aĉetas debete el nia kreditslipo ĉe la ŝanĝkasoj, laŭbezone, la markojn necesajn al tiuj etaj aĉetoj. Ekzistas ankaŭ aŭtomatoj, kiuj, post notado de via slipo, liveras la respondan kvanton da monkuponoj. Vi jam notis la egan nombron da aŭtomataj disdonaparatoj. Iom post iom ili anstataŭis la kvartalajn butikojn. Ĉiu domaro posedas la siajn. Ili disdonas kvindekon da komunuzaj produktoj, kiujn mastrumantino povas bezoni neaŭtaŭvidite.

Ni tute speciale starigis disdonaparatojn de senalkoholaj trinkaĵoj, tiel ke preskaŭ ĉiuj trinkejoj malaperis. Tiuj disdoniloj funkcias preskaŭ ĉie : en la laborejoj, ĉe la haltejoj de aŭtobusoj, en la haloj de stacidomoj kaj en la trajnoj, ĉe la lokoj de pilgrimado kaj sur la ŝipoj, en la kortoj de lernejoj kaj en publikaj ĝardenoj, ĉe la aviadilejoj, ĉe la vojkrucoj en la urboj, en la kinejoj, en la kampadejoj, apud la stadionoj, ĉe la naĝejoj, apud la benzinvendejoj, ĉe la plaĝoj, apud la resupreniriloj ĉe la vintrostacioj, laŭlonge de la turismaj vojoj kaj grandaj vojoj, en la sportejoj, ĉe la ĉevalkuradejoj, en la moteloj, en la minoj same kiel en la plimultaj administracioj kaj oficejoj de grandaj entreprenoj.

- Ĉu la provizumado de ĉiuj tiuj disdoniloj ne okazigas pezajn servutojn ? mi rimarkigis.

- Se konsiderata laŭ la ĝenerala plano, la operacio, post malpliigo de la personaro je la servo de la publiko, estigas netan gajnon, kiun ni enskribas en nian konton "libertempo". Cetere, ĉiu iom grava urbo posedas siajn retojn el plastaj tubaroj, facile munteblaj, kiuj

provizumas ĉenojn da disdoniloj.
- Ankaŭ ni havis tiun specon de disdoniloj, mi rebatis, sed ilia pliigado neeviteble estus pereiginta multe da etaj komercistoj.
- Kompreneble, daŭrigis Katarina, la starigo de multe da disdoniloj estis ebla nur laŭ la kondiĉo ne ruinigi la komercistojn devigatajn formalaperi aŭ redungiĝi. Sed vi scias nun, kiel solviĝis tiu problemo.

## ĈAPITRO IX
### La fiksado de la prezoj
### La kontrolo de la responsuloj

Mi estus dezirinta pli detalajn informojn koncerne la prezojn, kiuj ŝajnis al mi unu el la ŝlosiloj de la sistemo. Sed mi atendis okazon meti al mia gvidantino novajn demandojn :

- Ĉu vi ne aludis pri la fiksado de la prezoj far la komercistoj ? Ĉu do ili ĉiuj rajtas fari tion ?

- Verdire, diris Katarina, niaj responsuloj ne decidas mem pri tio. Sendube vi povis konstati, ke iuj etiketoj indikis malsamajn prezojn por sama produkto en ne samaj butikoj. Iam estis same, ĉar ofte la prezoj fiksiĝis laŭ la mieno de la kliento aŭ la kvartalo, t.e. la bezonoj de la komercisto, kaj ne malofte oni rimarkis en malsamaj butikoj prezdiferencojn je 30 kaj 40 procentoj, en kiuj ludis tuta malsimpla sistemo de rabatoj pli malpli konfidencaj.

Tie ĉi niaj responsuloj disponas nur pri ĉiutaga prezmarĝeno relative mallarĝa, kiu ebligas al ili korekti etajn ŝanĝojn en la rilato inter oferto kaj mendo. Ne ekzistas centra organismo por starigi liston el kelkaj dek milionoj da prezoj kaj sekvi ilian evoluadon tagon post tago. Eĉ mobilizante niajn elektronikajn cerbojn, ni neniam sukcesis tion. Taksoj pri malaltigo aŭ plialtigo de la prezo estas proponitaj nur ĉiumonate aŭ ĉiusemajne iniciate de profesiaj grupoj, kaj post konsultado de la sindikatoj de konsumantoj. Tiuj grupoj, pli bone ol la statistikistoj, konas la staton kaj la eblecon de siaj provizumadoj same kiel la intencojn de la klientaro. Ĉiuj tiuj responsuloj efektive restas en ĉiama kontakto kun siaj liverantoj. Ili scias do en kiu mezuro la vendado povos pliiĝi, se ili malaltigos siajn prezojn.

Se la mendo malpliiĝas en iuj fakoj, dum la prezoj jam atingis malaltan nivelon, sufiĉas, por eviti amasiĝon de la stokoj, malpliigi la laborhorarojn ĉe la fabrikanto,

kio, kompreneble, okazigas por la laboruloj nenian perdon de salajro.
Se temas pri pereivaj manĝaĵoj, frida ĉeno konsistanta el deponejoj, vagonoj, fridigaj transportoj kaj kargoaviadiloj ebligas al la varoj sekvi la klientaron dum ĝiaj someraj kaj vintraj migradoj. Oni do ne plu vidas iujn prezojn grimpi ĝis ega alteco en la someraj stacioj dum la epoko de grandaj amasalvenoj, escepte, kompreneble, se la provizumado estus malfruigita pro teknikaj kialoj.
Sed, aldonis Katarina, ĉu ne estis same en pasinta tempo ? Sufiĉis mallonga senpluvo aŭ malfrua somero, por ke viaj komercistoj ekspekulu tuj per la malabundo de la produktoj, sekrete dezirante, ke ĝi plu daŭru. Ili ofertis la subite rarajn varojn je prezoj, kiuj atingis ofte pluroble la produktokoston. Estis tie spekulado, kiu riĉigis iom la kamparanon kaj multe la makleristojn, dum malprofitis la konsumanto kun senŝanĝa salajro, al kiu la barilo de la prezoj malebligis aĉeti multajn komercaĵojn.
Hodiaŭ okazas pliâltiĝo de la prezoj, sed ĝi plu riĉigas neniun, ĉiu estas solidara tiel dum abundo kiel dum malabundo. Nur personoj kun alta salajro plu havigas al si, dum iuj epokoj, altprezajn komercaĵojn. Sed ĉu ne estis same antaŭe ? Ne riproĉu al ni favori la plej monhavajn, konsideru, ke la altaj rentoj ne plu estas apanaĝo de kasto, sed estas relative ofte la rekompenco de la merito kaj de la penado.
- Kiel vi kontrolas viajn responsulojn ? Ĉu tiuj ĉi ne povas tute senpune sekrete liveri varojn al siaj parencoj aŭ amikoj, ne postulante la notadon de la kreditslipo ?
- Tiu trompo okazis foje dum la epoko, kiam ni ankoraŭ ne grupigis la distribuajn lokojn ĉe la sino de la ĉiovendejoj. Sed tiaj trompaj operacioj neniam iĝis danĝeraj. Por prepari malabruptan ŝanĝon, ni devis permesi al la podetalaj vendistoj senpage sin provizumi sur siaj propraj stokoj, plu enspezante la socian renton je la sama nivelo de siaj antaŭaj enspezoj. Cetere, tio estis nur apenaŭ duonprocento de la tuta konsumantaro, kiu portempe viciĝis kun la privilegiuloj pli-malpli praviĝitaj.
La kontrolo de la responsuloj koncernas la sindikatojn de konsumantoj, kiuj plenumas ĝin tiel flekseble kiel

efike, postulante tiucele de siaj anoj, ke ili signalu la malbonajn agojn, kiujn ili konstatas. Fine, la ĉiovendejoj, same kiel ĉiuj entreprenoj, devas registre kontadi la materialojn.

Ĉu mi konfesu al vi, ankoraŭ diris Katarina, ke ni iom penas kompreni la pasivecon, kun kiu viaj kamparanoj akceptis regulon, laŭ kiu iliaj enspezoj dependis de la veterstato je la Sankta Medardo en limoj de ilia tute eta horizonto. Kion estus dirintaj viaj spicistoj, se regulo ne malpli stulta komisius al la Saturna Ringo same arbitracii iliajn salajrojn ?

Vi opinias nian skemon malsimpla, sed ĉu ne estis skemo pli strangega tiu, kiun vi iam praktikis ? Tiu skemo estis komprenebla nur de eta nombro de viaj mandarenoj. La loĝantaroj tiam postulis nur la pagrimedojn akceptatajn de la komercistoj cele al provizumado de siaj bezonoj. Nu, dum vi devis malŝpari pli ol duonon el la oficaro, egajn kvantojn da krudmaterialoj, dekojn da miliardoj da kilovatt-horoj, nur por veturigi, tra mil kaptiloj kaj insidaĵoj, stokon da mono kaj kredito, hodiaŭ sufiĉas la laboro de kvin personoj por havigi al 30 OOO loĝantoj iliajn necesajn enspezojn, kaj apenaŭ pli por la urboj pli multhomaj.

## ĈAPITRO X
## La oficejo de la Mono
## La Ŝparado

Vizito al la Oficejo de la Mono estis aranĝita dum posttagmezo. Ĉeestis malmulta personaro en la loko; en unu el la ĉambroj funkciis turniĝanta sliparo trakurata per elektrona okulo, kiu transsendis al teletipo la indikon de la sumo legata ĉe tiu ĝenerala sliparo, dum la kredit-slipoj sinsekve aperis antaŭ la transskribaparato. Apenaŭ du horoj sufiĉis por mekanike skribi proks. 30 000 slipojn. Tiuj ĉi estis poste falditaj, gluitaj, klasifikitaj elektronike, pretaj por distribuado laŭ kvartaloj, stratoj, numeroj, kaj laŭ entreprenoj.

Tamen, la distribuado laŭ la loĝejoj estis escepta. La direkcio de ĉiu entrepreno efektive transdonis ilin al sia personaro, dum la "sendependuloj" prenis la siajn en la kvartalaj oficejoj, kie ili estis deponitaj.

Oficejo pri pagordonado plenumis la alĝustigon de la rentindicoj, kontrolkomparante la premiojn, la promociojn, la ŝanĝojn en la civila stato, kontrolmarkante la feriojn kaj datrevenojn, prizorgante la plenumadon de la rajtoj de ĉiu konsumanto.

- Je la komenco, diris Katarina, multaj personoj maltrankviliĝis pri siaj ŝparaĵoj. Sed poste ili komprenis, ke tiuj ĉi ne estas nun utilaj, escepte por grava estonta aĉeto.

Ni interkonsentis, ke el la saldoj ne uzitaj de la kredit-slipoj estos transporteblaj nur la sumoj blokotaj en kredit-ŝparo. Tiel, tiuj, kiuj antaŭvidas gravan elspezon superan al iliaj enspezoj, simple resendas sian slipon je la fino de ĝia valida limdato, kaj la neelspezitaj saldoj totaliĝas, monaton post monato, en blokita konto. Tiu kreditoŝparo ricevos siatempe la destinon deziratan de la kontposedanto.

La rolo de la ŝparado do ne plu estas sama kiel antaŭe: vi ŝparis por investi kun interezo cele al sekureco, por pliigi vian profiton. La kredito-ŝparo restas tie

ĉi ŝparado por konsumado prokrastita.
Oni ne plu investas por establi "fonton de enspezoj", tial ke la enspezoj estas rekte ligitaj al la fizikaj dimensioj de la produktado, kies daŭrigo estas certigita.
La ŝparado konsistigas tiel rimedon nur por akiri kromajn propraĵojn por tiuj, kies monataj enspezoj ne estas sufiĉaj por gravaj aĉetoj, kaj kiuj cetere povas anstataŭigi tiun ŝparadon per ŝuldo, se ili deziras tuj ĝui la aspirataĵon.
Iam viaj bankistoj favore konsilis al ŝparado, sed pro la nura celo uzi ĝin kiel subtenon al kredito kun interezo, dum la frenezo de la reklamado instigis al pli granda elspezo. La asekuroj kontraŭ morto, la ŝparkasoj same instigis la personojn malpliigi sian konsumadon, sed ili redonis per devalutita mono la sumojn konfiditajn al ili.
Tiu instigado al ŝparado estis, dum via generacio, nur rimedo por aktivigi la monan cirkuladon kaj "frukt-igi" la monon profite al precipe financaj establoj.
La kolektita ŝparmono subtenis la kreadon de mondeponoj, kiuj riĉigis la "kreditfabrikantojn".
Fine mi devas doni lastan precizigon : ĉiu kreditkonto estas konsiderata en ĉiama "superprovizado", tiel ke en okazo de urĝa bezono ĉiu persono povas disponi pri sumoj, kiuj iam estis ŝparitaj kontraŭ malbonŝanco.
Ni fiksis tiun konstantan rezervon je kvaroblo de la monata rento skribita sur la kreditslipo de la koncernato. Sed fakte temas tie pri kredito pli simbola ol reala, kiun oni uzas preskaŭ neniam, ĉar ĉiuj kuracadoj estas senpagaj kaj la emeriteco garantiata per plena rentenspezo. Tamen, senton de granda sekureco havas ĉiu individuo, kiu nun ne plu bezonas zorgi pri la tuja estonteco de sia familio kaj de si mem.
Sed malfruas, vi pasigis lacigan tagon, kaj ni havas rendevuon morgaŭ matene ĉe la doktoro.

## ĈAPITRO XI

La ekonomia kadro kaj la homo

Mi endormiĝis nur post longa tempo. Meze de la mateno Katarina venis al mi kaj ni iris kune al la apartamento de la doktoro.

- Patro, jen nia granda malsanulo, anoncis Katarina, malicete ekrigardante min. Temas pri malsanulo de la antaŭa jarcento, samspeca kiel tiuj multaj, kiujn ni jam flegis ; tradiciisto, konsideranta tre valoraj la virtojn de la deviga laboro, nostalgio de la pasinta tempo, lia kazo ŝajnas al mi unu el la plej klasikaj. Mi konfidas lin al vi.

Kaj ŝi foriris per flugetantaj paŝoj, komplice ridetante al sia patro.

- Nu, Sinjoro Edders, diris li, ni ekzamenos tion. Mi estas feliĉa pro via vizito. Ni havas multon por rakonti, ĉu ne ? Sed, en kia stato estas via reakomodo?

De ok tagoj, senĉese mi malkovris novajn aspektojn de tiu miriga civilizacio, kaj mi sentis min kvazaŭ mi estus ricevinta kapturniĝon, min demandante ĉiumomente, ĉu mi estas ja vekita, kaj kiel la socieo ĉirkaŭ mi povis tiele ŝanĝiĝi. Ĉu oni ne certigis, ke la homoj, en tiu lando, ĉesis kvereli inter si pro mono ? Foje mi preskaŭ kredis al scenigo, al artefarita mondo, kaŝanta siajn problemojn kaj siajn difektojn al fremdaj okuloj.

- Mi malbone komprenas, fine mi diris, kiel la homa konduto povis modifiĝi tiagrade.

- Sed, rebatis la kuracisto, la homa naturo estas funde bona, kaj pri tio ROUSSEAU verkis aĵojn perfekte saĝajn. Sed liaj ideoj ne kongruis kun la tiama ekonomia reĝimo kaj liaj samtempuloj nature mokŝercis liajn verkojn.

Mia kara Edders, plue li diris, ni pruvis, ke nur la ekonomia kadro edukas la homon al sociemo, determinante la rilatojn inter la individuoj. Sendube la homaj agoj respondas al certaj celoj, kiuj neniam ŝanĝiĝos:

aspiro al plej granda feliĉo, t.e. ĉiamaj klopodoj pri materiaj aŭ moralaj kontentiĝoj, deziro superi la aliulojn.

Dependigante tiujn celojn de necesa antaŭa akiro de mono, la malnovaj ekonomiaj kadroj sciis nur igi la homon lupo por la homo. Ili sciis nur inciti al malamo disvastigi maljustecon, starigi kiel principon la "lukton por la vivo", kaj ne estis ja facile reagi kontraŭ la atavismo de la jarcentoj, dum kiuj la homo devis lukti sola, fronte al la naturaj fortoj por konkeri sian rajton al vivo. La malsekureco estis tiam komuna regulo ; kaj tiu malsekureco neprigis por ĉiu individuo la devigon akumuli riĉaĵojn, se li volis akiri eĉ nur malprecizan kaj nefirman asekuron kontraŭ la batoj de la sorto. Tiu akumulado, senlima, kondukis la homojn al uzado de absoluta povo, efektiva ekonomia diktaturo super ĉiuj siaj samcivitanoj, kaj tiu povo estis uzata poste kiel fonto de riĉiĝado, ĉar tiu, kiu disponis pri la povo, faris la leĝojn kaj la leĝoj estis konceptitaj nevarieble por konservi kaj pligrandigi la proprietecon, garantion de la riĉeco kaj fundamenton de la aŭtoritato. La trovemo de viaj bankistoj estis granda, sed ili baldaŭ ludis kiel sorĉist-lernantoj. De la momento, kiam la akcelado de la teknikaj progresoj devigis ilin praktiki maltusanajn detruojn por antaŭgardi la rentabilitaton de siaj investoj, ĉio ekiris tute malbone. Ili okazigis militojn por defendi la minacatajn vendeblojn, por forigi la ekonomian minacon de la landoj ekonomie pli bone armitaj por la konkero de la eksteraj merkatoj. Kaj la malŝparado ekhavis novajn formojn. Oni konstruis multekostajn kosmajn maŝinojn, kies ĉefa merito estis malaperigi kiel vaporo el la spaco la frukton de milionoj da laborhoroj. Kaj dum la armeizado ĉiam plivastiĝis spite al pacaj internaciaj klopodoj, kaj dum la grandaj neutilaj laboroj akumuliĝis, tiam la entreprenoj prosperis, kontentaj trovi en la Ŝtato la plej miraklan el la klientoj. La celo de ĉiuj tiuj operacioj estis ĉiel forigi danĝeran troproduktadon, kiun la privatuloj ne povis konsumi, sed tamen endis havigi al ĉiu plenan enoficiĝon.

La etoso kreita de via ekonomia sistemo, kiam estiĝis la unuaj manifestiĝoj de abundo, certe ne estis favora al solidareco kaj helpemo. Speco de kolektiva kaj

neniiga frenezo trafis la respondeculojn, kiuj deziris antaŭgardi siajn privilegiojn kaj konsideris ĉiun ŝanĝon atenco kontraŭ ili. Aranĝoj tute malprudentaj, kiaj la Banko de la agraro, la detruoj de rikoltoj, la stokadoj, fariĝis kutimaj agoj, dum milionoj da malsatantoj postulis parton, kiun via sistemo ne kapablis havigi al ili.

"Nia kapitalismo funkcias, tamen ree diris fervoraj dungitoj. Ni produktas, nia nacia enspezo kreskas, la plena enoficiĝo estas certa, la mono firma."

Sed necesis fermi la okulojn kaj ŝtopi la orelojn por ne vidi nek aŭdi la grandegan perdotaĵon, kiu pagis la prezon de tiu ŝajna prospero. La statistikoj montris la nombron de ŝarĝitaj vagonoj, sed tute evitis konigi iliajn enhavojn, kiuj tute ne interesis la konsumantojn. Salajroj plialtiĝis, sed la fisko kaj la bankoj fervore rapide tutrabis, pere de la prezoj, la mizerajn almozojn penege akiritajn de la sindikatoj, kaj por la plagviktimoj, la maljunuloj, la vidvinoj, la familioj de la akcidentuloj, por la trompŝtelitoj, la malaltrangaj oficistoj, la emeritoj la malsanuloj, la bankrotuloj, por la kripluloj, la senfort-uloj, la maljunaj submastroj senoficaj, por ĉiuj tiuj malfavoratoj, la prospero pri kiu arogante fanfaronis viaj reĝimoj prezentis nenian konkretan signifon.

Kiam malaperis la kaŭzo de tiaj ekscesoj, ĉu ni miru, ke ties videblaj efikoj preskaŭ tuj malpliiĝis ? La teknika progreso, la entrudo de miliardoj da energetikaj sklavoj, anstataŭantaj, plifortigantaj la homan laboron, pliigante ĝian efikon, povis nur krei favorajn kondiĉojn por drasta ŝanĝo en la strukturoj mem de via kapitalista socio.

Tiel oni malkovris, ke la laboro por aliulo, ofte seninte-resa por la plenumantoj, la seniniciativaj subuloj, povis ne plu reprezenti la superegan celon, la ĝojon de la ekzistado, sed signifis servuton, el kiu la homo devis liberiĝi laŭ la tutnovaj ebloj liveritaj de la scienco kaj tekniko. Lasite al liberaj klopodoj, la homo per ili baldaŭ montros sian personecon, ĝis tiam subpremitan de la postuloj de profesio pli ofte trudita ol elektita. Kaj tiel ja okazis ; la individuo, parte liberigita de deviga laboro, malkovris al si novajn talentojn, fortan deziron sin kulturi, instruiĝi ne nur cele al praktikado de mondona profesio, sed por provizi siajn libertempojn, eskapi el enuo, lertigi sian juĝkapablon, plenumi socian

rolon adekvatan al siaj eblecoj, kaj spiritedukiĝi.

- Sed, mi diris, ĉu ne estis dirite, ke libertempo kaj bonhavo estas tre malbona skolo por la praktikado de vera humanismo ?

- Tiuj, al kiuj oni dirigis tiujn parolojn, respondis la kuracisto, estis ja parolportantoj delegitaj de la plej riĉaj. Ĉi-lastaj trovis oportune limigi la bezonojn de la amasoj kaj pri tio ne rekte klopodadis cele al konservo de siaj monprofitoj. Bonhavo kaj libertempo, tion ili diris al si, okazigus pliajn ŝarĝojn al la produkto-kostoj, devigante la laboristojn, kies salajroj estas la nura fonto de enspezoj, formuli novajn postulojn. La progresiva anstataŭo de la konsumanta ŝtato per la privata konsumado efektive senutiligis pli larĝan solventecon de la salajrularo, sed kompense okazigis fiskleĝaron senĉese pli gravan fine igantan la salajrulon-konsumanton fiska subtenanto kaj la komercistojn aro da helpaj impostistoj. La mono nur transiris senutile ĉenon el "fiskaj etapoj", lerte rekaptota de la Ŝtato, kiu poste redistribuis ĝin per mendoj al entreprenoj, kies inventoj akumuliĝis.

Oni pagigis la impostpagantojn ĉiuokaze, ĉiupretekste: atomarmilaro, helpo al neevoluintaj landoj, atomaj aparatoj kaj kosmaj programoj, asekuroj, ĉiuj tiuj operacioj celis lasi al la malfeliĉaj impostopagantoj etajn vivrimedojn, dum iliaj laborenspezoj estis transdon-itaj, antaŭ ol esti konsumitaj, al komerckontraktoj, al entreprenoj plenumantaj la diversajn programojn enskribitajn en la Ekonomia Plano.

Vi tamen sukcesis doni al tia rabado demokratan ŝajnon : asembleoj, konsilantaroj kaj sindikatoj volonte akceptis tian maskiĝadon, al kiu ankaŭ speciale mult-vorta literaturo alportis sian helpon.

Do estas la liberiĝo de la homo el la eventualaĵoj de la laboro, kiu aliigis lian naturon, aŭ pli bone, kiu ebligis al tiu ĉi sin montri sub aspekto hodiaŭ tiel surprize stranga al vi. Ni malfermis la homan menson al la plena solidareco kaj ni forĝis tiun superan civilizacion, kiun envias al ni la popoloj vivantaj ankoraŭ sub la malnovaj reĝimoj, sed iompostiome venantaj al ni.

Ankaŭ la restarigo de pli granda sociala justeco, aŭ pli bone la malgravigo de la maljustaĵoj, estis unu el la decidigaj faktoj, kiuj plibonigis la etoson de frateco necesegan al la disvolviĝo de la individuo.

## ĈAPITRO XII
La kuracistoj.
La grado de malkontenteco.

Mi aŭskultis la kuraciston sen interrompi lin. Evidentiĝis, ke la nura fakto "ŝanĝi la ludregulon" profunde aliigis la naturon de la sociaj rilatoj, humanigante ilin, kaj tiu konstato modifis ĉiujn opiniojn antaŭe esprimitajn pri tio, kaj kiuj estis nur simplaj hipotezoj.
- Sed, mi diris turnante min al la kuracisto, ĉu vi mem, kiu nun estas kvazaŭ komunuma oficisto, ne bedaŭras vian iaman sendependecon ?
- La sendependeco de kuracisto, mia kara amiko, estas nur ŝajna. Ni ĉiam estis la sklavoj de klientaro speciale postulema. Rekviziciitaj dum la milito kaj okaze de grandaj katastrofoj, ni estis, en ĉiuj epokoj, ŝtatoficistoj je la servo de la kolektivo, je la servo de niaj malsanuloj, kaj la fakto, ke kelkaj inter ni vidas nun siajn enspezojn fiksitaj de komitato de eminentuloj, ne difektas pro tio la sentojn, kiujn ili travivas bone servante aliulojn.
Nia metio rangigas nin en kasto. Ke nia profesio restu respektata kaj hierarkiigita, tion ni petis al la nova reĝimo. Ni senĉese observis kodon pri honorario; kaj ni deziras, ĉar la kuracarto estas senpaga por la malsanuloj, ke la instancoj komisiitaj por provizumi niajn enspezojn konsideru la gradojn de nia arto por diferencigi niajn salajrojn.
Nu, ni mem miris pri la kondiĉoj senprokraste proponitaj de la komitatoj. La zorgo fiksi niajn enspezojn estis lasita je nia iniciato. Kelkaj famaj kirurgoj kaj fakuloj eĉ ricevis ĝeneralan senpagecan karton. Oni fine lasis la malsanulojn libere elekti sian kuraciston, kaj tio estis reala progreso kompare kun tio, kion vi nomis iam la socialigita medicino.
La ĉefa kritiko kontraŭ tia medicino estis efektive la devigo por la malsanuloj enskribiĝi ĉe kuracisto prizorganta difinitan distrikton. Sendube tio estis

ne grava al multaj malsanuloj, por kiuj iu ajn kuracisto valoras alian, precipe en epoko, kiam la hospitalaj kuracistoj pli kaj pli multiĝis.
Endis ja konsenti, ke la medicino estis praktikata kun egala konscienco en la hospitaloj, kien estis transportitaj la homoj grave vunditaj en trafikakcidentoj. Tiuj hospitaloj, tute bone ekipitaj, enhavis instalaĵojn, kiuj povis rivali la plej bonajn ekipaĵojn de la plej specialigitaj klinikoj.
Aliparte, multaj junaj medicinistoj inklinaj por tiu profesio spertis grandajn malfacilojn por ekipiĝi, ĉar tio postulis egajn sumojn. Hodiaŭ nia profesio estas alirebla al iu ajn klaso de la socio. La studoj estas tute senpagaj kaj estigas nek ŝarĝojn nek "preterlasitan profiton" por la familioj, kuraĝigitaj per monkompensoj, kiam la infanoj sekvas superajn studojn. Fine la juna medicinisto estas provizita per la tuta materialo necesa al la praktikado de sia profesio.
Dank'al tiuj aranĝoj la nombro de medicinaj studentoj duobliĝis en kelkaj jaroj. La instruado per televido ebligis ege mallongigi la daŭron de la formado. Sed ni nin turnas pli kaj pli al la preventa medicino, kio etigas la nombron da flegotaj malsanuloj. Fine, la absoluta forigo de ĉies financaj zorgoj kaj pornegocaj vojaĝoj rezultigis la malaperon de granda nombro da kazoj de deprimoj kaj de ĉiuj iliaj sekvaĉoj. Ankaŭ la forigo de la loĝejaĉoj kontribuis al konsiderinda malaltigo de la nombro da alkoholuloj kaj de ties konsekvencaj malsanoj. Pro ĉiuj tiuj kialoj la medicina profesio fariĝis multege malpli laborpostulema, sed ĝuas egalan konsideron.
Sendube nia profesio ĉiam organiziĝis por eskapi al ĉiu protekto, al ĉiu kontrolo ; kaj sendube ankaŭ ni estas hodiaŭ komunumaj oficistoj. Sed kiu plendas pro tio ? La plimultaj kuracistoj viaepokaj, escepte de la armekuracistoj kaj la asistantoj de hospitaloj, ŝatis sian sendependecon laŭmezure kiel tiu libero ebligis al ili mem fiksi la sumon de siaj enspezoj kaj finaranĝi laŭ sia plaĉo siajn horarojn kaj vojaĝojn. Nu, estas same hodiaŭ. Kelkaj praktikantaj kuracistoj malemis konigi la sumon de siaj enspezoj, timante malagrabligi sian klientaron. Dotite per karto de senpageco, ili egalas la miliardulojn, povante havigi

al si ĉion, kion ili bezonas. Cetere, tio nenion ŝanĝis al la situacio de kelkaj inter ili, kies antaŭaj enspezoj garantiis jam iliajn tutajn bezonojn.
Tamen, ni ne estis tiom maltrankvilaj. Ĉu Britio, kelkajn jarojn antaŭe, ne naciigis la medicinon ? Nu, la varbado en la profesio ne malpliiĝis pro tio. Por la junaj medicininda estis la promeso eviti la grandan malfacilon konkeri klientaron. Nuntempe, ekde la unua tago al ĉiu el ili estas konfiditaj multaj malsanuloj kaj ĉiuj tiuj junaj kuracistoj baldaŭ aprecas la profesiajn avantaĝojn donitajn al ili per la prizorgado de multnombra klientaro. Iam, kiel cetere kelkaj plu faras hodiaŭ, multaj malsanuloj nur foliumis la telefonlibron por elekti la deziratan kuraciston. La hospitalaj asistantoj sin sekvis ĉe la lito de la sama malsanulo, kaj kiam la familia kuracisto feriis aŭ nature mortis, anstataŭanto flegis liajn malsanulojn. Sed la familia kuracisto estis ofte lukso, kiun ne povis ĝui ĉiuj hejmoj, kaj la hospitaloj tiel akceptis la plej multajn el la malsanuloj.
- Mi konkludas el tio, mi diris, ke la oficistigo de via profesio neniam faris alion ol normaligi la situacion fakte ekzistantan jam de antaŭe. La kuracistoj plu enspezas, ĉe la komitatoj de eminentuloj, sumon egalvaloran al tiu ricevita antaŭe ĉe la klientoj, t.e. sumon iom post iom pli gravan, kaj ili konsekvence havis nenian seriozan motivon kontraŭstari al tiu nova salajra sistemo.
- Estu trankviligita, daŭrigis la kuracisto. Oni mortas nun nek pli rapide nek pli malbone. Male, la ŝanĝo dume okazinta en la ritmoj de la vivo, la granda senpeziĝo de la ofico, de la labortempo je la servo de aliulo, la forigo de la kaŭzoj de tro frua uzdifektiĝo de la korpoj, pli bone ekvilibrigas la sanstaton de la raso, tial ke ni ĉiuj vivas kun multege malpli da klopodoj. Eĉ la nura malgraviĝo de alkoholismo estis unu el la faktoroj, kiuj plej kontribuis al la pliboniĝo de la socialaj vivkondiĉoj. Vi iam imputis al alkoholismo multe da sociaj malbonfaroj, sed vi ne tro klopodis por forigi la kaŭzojn mem de alkoholismo : la loĝejaĉoj kaj la enuo, la kvereloj en la hejmoj. Por multaj, drinki estis nur distrilo kontraŭ la manko de intereso, kiun prezentis senperspektiva ekzistado, dum kiu ĉio estis tiom rigore porciumita. Sendube, falsa abundo disetendiĝis en viaj montrofenestroj sub la mirigitaj okuloj

de la turistoj kaj promenantoj. Sed tio estis nur trompa brilo, ĉar tre malmulte da elmontritaj produktoj estis haveblaj de etenspeza popolamaso. Kaj tiaj ekspozicioj ofte insultis la malsaton kaj bezonon de milionoj da individuoj nekapablaj tiri profiton el ili. La malkontento kreskis kun la supreniro de la progreso, kiu multigis la diversecon de la riĉaĵoj kaj la enviojn. Viaj statistikistoj plu vicigis prezindicojn kaj salajrindicojn, ŝajne ne ekvidante ke, paralele, la realaj bezonoj ne ĉesis multiĝi pli rapide ol la enspezoj ĉe la plimultaj salajruloj sufiĉe kulturitaj kaj vivantaj ĉe bonhavaj medioj.

Malkonstruante la loĝejaĉojn, loĝigante ĉiun familion komforte, kaj forigante la morgaŭajn zorgojn per plena sekureco de la enspezoj, ni do tute aliigis la familian etoson. La nombro de eksedziĝoj malaltiĝis je 60 % ; la junula delikteco preskaŭ ne plu estas. Ni kalkulas ne pli ol kelkajn centojn da sinmortigoj jare. Se oni sinmortigas ankoraŭ iomete pro amĉagreno aŭ nekuraceblaj malsanoj kaj se ekzistas kelke da mensmalsanuloj, kompense ne plu estas sinmortigoj pro monaj zorgoj, pro bankrotoj, pro malagrablaj kunloĝadoj, pro neŭrozoj kaŭze de manko de sonizolado en la loĝejoj aŭ pro fuŝita profesio, sensukcesa ekzameno.

La regreso de malsanoj imputeblaj al alkoholismo kaj ĝiaj aĉaj sekvoj estas do por ni ĉiuj motivo fieri. Kaj ni scias hodiaŭ, ke tiu plago estis rekte kaŭzita per la ekzisto de loĝejaĉoj, de senkultureco. Tute juna la infano lernas la malutilon de alkoholo kaj ekkutimas konsumi frukto-sukojn senpage disdonatajn en la lernejoj kaj ĉe la stadionoj. Paralele ni detenis nin malaltigi la prezon de la vinoj kaj alkoholoj. Oni trinkas do multajn sukojn de vinberoj kaj sukojn de fruktoj iomete alkoholajn, cidrojn, bieron je 4°, lakton, mineralajn kaj gasajn akvojn. Kaj ni, medicinistoj, havas pli da libertempoj.

## ĈAPITRO XIII

Kosto de nesekureco

Laboro kaj libertempo. La batalemo.

Interbabilante, ni proksimiĝis al la granda fenestro, kiu donas vidon sur lageto, en kiu kelkaj brilkoloraj fiŝoj avide vetbatalas por iomete da nutraĵo.

- Ĉu ni ne similas tiujn fiŝojn ? mi diris. Nia epoko estis tre priokupita de tiu batalemo, kiu jam ŝajnis al ni neanstataŭebla por provizi la vivon. Nu, mi konstatas, ke la batalemo ŝajne cedis al plena interhelpo. Kiel klarigi, en tiaj kondiĉoj, la daŭran fervoregon de ĉiu dum la plenumado de ties taskoj ?

La kuracisto ridetis :

- Vi estas nerebonigebla. La ĝangala leĝo jam estis rigardata kiel natura leĝo de la vivo. Sed tiu leĝo apartenas al la jarcentoj de rareco, kiujn konis la homaro laŭlonge de sia historio. "Ci ŝvite perlaboru cian panon", diris la evangelioj. Ni plu devas perlabori nian panon. Tamen nia peno etendiĝas laŭ tempo multe pli mallonga ol antaŭe, tute simple. Kial ni plenumu mem penigajn taskojn, dum nia armeo de sklavo-robotoj nun taŭgas por efektivigi ilin kun pli da precizo kaj perfekto ol la plej bona el la iamaj metiistoj ? En nomo de la plena dungiĝado, ĉu vi ne lasis ofte en rezervo multajn maŝinojn kun la celo havigi laboron al via laboristaro ? Kion opiniis tiam la laboristoj kaj inĝenieroj, kiuj konceptis kaj konstruis tiajn aparatojn, vidante la kvazaŭan malŝaton, kiun suferis la frukto de ilia laboro ?

La batalemo skribita en la koro mem de la homa naturo ne malaperis pro tio, ĉar ĝi plu rolas dum mil okazaĵoj, kaj tutspeciale en la libertempaj aktivadoj, kie ĉiu strebas superi aliulon. La homo estas kreita sendube por klopoda vivo. Tiu ofta diro estas biologie ekzakta. Sed estas tute nepruvite, ke tiu klopodado devas nepre okazi en rutina laboro, serve al mastro. Oni same laciĝas, naĝante en naĝejo, grimpante monton,

ebriiĝante per skiado, provante rolon en amatora teatro. Oni ĉiam malpravas samigi libertempon kaj senokupon. Granda nombro da personoj iam devige laboris en metio aŭ en loko ne libere elektita, kaj multaj sopire atendadis la sabaton aŭ la feriojn, dum kiuj ili povis elekti siajn aktivadojn, kondiĉe ke iliaj enspezoj ebligu tion.
Nova etiko trafis nin. Ĝi havas tute alian sencon, alian celon. Precipe en tio, ni sukcesigis la nuran grandan revolucion el ĉiuj epokoj. La skolta spirito viaepoka, per kiu la gejunuloj realigis tre laŭdindajn interhelpojn, viaj diversaj konkursoj, en kiuj ĉiu lerte elturniĝis, kie ĉiu luktis por venki, jen kio estas en la nova spirito. Sed la grandega plivastiĝo de niaj libertempaj aktivadoj ebligas hodiaŭ al tiu batalemo disvolviĝi en multaj diversaj kampoj. Tiel ni konservas la eternajn instigilojn, kiuj igas ĉiun homan vivon ĉiama mempreterpasado.
Kvankam la profesia aktivado mem donas foje la okazon konkeri la honorojn kaj aliulajn konsiderojn, necesis agnoski, ke la dispartigo de la taskoj iomete kontribuis ĉie forigi el la laboro ĝian tutan homan sencon, pli kaj pli maloftigante la okazojn por laboristo distingiĝi, dum libertempoj kaj ties aktivadoj ebligas nun ĉiajn aŭdacojn, ĉiujn iniciativojn.
Via ekonomia sistemo, pludiris la kuracisto, lernigis al vi la ecojn de la risko kaj danĝero. Ni montris nur ke la diferenca mona skemo povos aliigi la medion kaj ke la homo, praktikante solidaron malakceptitan de la merkataj leĝoj dum via epoko, povas celi altan nivelon de materiaj kaj moralaj kontentiĝoj, pli rapide ol per la klopodo danĝere vivi, senĉese celadi al lukto kontraŭ konkurencantoj estigitaj de via mon-civilizacio. Ĉiuj ĉi luktoj kostis al la homamaso la plej penigajn mankojn. Oni tre atentigis pri la feliĉaj gajnantoj de la turniroj, sed oni prisilentis la senvalorulojn, la perdantojn, la viktimojn. Fine, la militoj, al kiuj neeviteble kondukis tiuj luktoj por la mono, por la vendeblecoj, por la akcelado de la interŝanĝoj, por la "mona bonfarto", por la bilancoj, okazigis terurajn detruojn de riĉaĵoj, kiujn ankaŭ la sekvantaj generacioj ne povis ĝui.
Sendube via kapitalismo havigis abundajn enspezojn al malplimulto da privilegiuloj. Sed kian sekurecon

ĝi donis al la plimultaj konsumantoj ? Ĉu tio ne estis ekonomio de "ĵetkubo", ekonomio de hazardo, tiu de ŝanco ? Ĝi baraktis en la socia maljusteco, fonto de malamoj ne esprimitaj, kaj ne povis esti alio dum la enspezoj plu estiĝis per cirkulado de aĉetrimedoj kaj dum tiu cirkulado restis ligita ne nur kun la ofteco de la interŝanĝoj, sed ankaŭ kun ĉiuj specoj de elementoj plej fantaziaj, plej strangaj : konjunkturo, meteorologio, akcidentoj ktp.
Kial ŝanĝi la sistemon ? diris la monhavantoj. Kion vi riproĉas al ĝi ?
Sed ĉu iu sistemo funkcias, kiam, teknike kapabla forigi la malabundojn, ĝi ne povas certigi la sekurecon de la enspezo ? Kiam ĝi lasas la fruktojn putriĝi en la fruktoĝardenoj, kiam ĝi misuzas oficaron je la servo de malŝparado kvazaŭ oficiala, kiam ĝi ne ebligas al familio vivteni sin post la malapero de la familiestro pro kaŭzoj, pri kiuj vidvino kaj georfoj ne respondecas? Viaj monaj strukturoj ebligis ja sendi kosmonaŭtojn en la spacon, atomajn submarajn ŝipojn sub la polusan kaloton, tio havis la efikon distribui bonajn dividendojn al la akciuloj de la "General Dynamic Corps", al tiuj de la "Chase Bank" kaj luksegajn tantiemojn al administr-antoj, sed ili estis neniel orientitaj al la celo venigi la bifstekon de la herbejo al la stomako de la konsum-antoj. La celo de la produktado koncernis ne la bezonojn de la homo, sed nur tiujn de la kapitalo. Kaj dum la unuaj bezonis abundon, la duaj postulis malabundon.

*

- Konsentite, mi diris, ne mankis dum tiu epoko personoj bonintencaj, kiuj kun plej bona sincereco kredis sian estontecon sekurita kaj tial neniel deziris ŝanĝi la instituciojn.
Pri la aliaj, ili nur diris aŭ pensis : Neniel utilas lukti por kimeroj. Ĉu ne estis ĉiuepoke riĉuloj kaj malriĉuloj? Subpremantoj kaj subpramatoj ? Profitantoj kaj turment-atoj ? Ĉiutaga peno sufiĉas. Ni ne estas estroj de nia destino ! Nu, ni klopodu nur akomodi nin kiel eble malplej malbone al kio ekzistas, ĉar pruvite estas, ke ni povas nenion ŝanĝi al tio. Vivu ni kiel realistoj kaj ne kiel utopiistoj aŭ idealistoj.
La subpremantoj tenis ĉiujn povojn, do probable la prematoj ial pravis tutcedante al submetiĝo.

La kuracisto ekbalancis la kapon :
- Al unuj kaj aliaj mankis nur informoj. La nekontentuloj viktimiĝis pro tre lerta propaganda sistemo praktikanta veran cerbolavadon, kondiĉanta la spiriton, apartiganta, malkompletiganta la informadojn, neŭtraliganta ĉiujn pripensadojn de la individuo superŝutita per bildoj, sonoj, bruoj, literaturaĵoj kaj dekadencaj spektakloj. Dum la monhavantoj ege iluziiĝis pri sia reala sekureco, minacata ĉiumomente de ŝteloj, malsano, kataklismoj, atencoj, konjunkturo, militoj kaj multe da aliaj faktoroj. El ĉiuj minacoj, kiuj persekutis la homon batalantan kontraŭ la malfeliĉo, la malsekureco estis sendube la plej grava. Neniu eskapis el tio kaj la ekonomia kadro, tiam bazo de viaj ĉiutagaj klopodoj, rezervis al ĝi speciale logan agadkampon, enigante ĝin en la malsekurecon de la enspezo.
Viaj ekonomiaj institucioj ordonis efektive la cirkuladon de la mono, la manieron krei la enspezaron. Ili postulis, ke multaj salajroj, precipe la etaj kaj mezaj, plu dependu de la ofico, de la ĉeesto dum la laboro, de ties daŭro. Kaj milionoj da simplaj homoj, vivante ekster oficoj, tiel devis tede peti malgravajn almozojn: maljunuloj, vidvinoj, emeritoj, malsanuloj, kripluloj, ĉehejmaj virinoj, bankrotuloj, senhejmuloj, senlaboruloj, maljunaj submastroj, netaŭguloj, resaniĝantoj, mobilizitoj akcidenttrafitoj.
Sed ankaŭ enoficigitaj salajruloj ne eskapis el la nesekureco de la enspezo. Multaj iluziiĝis, trankviligitaj en trompa eŭforio, nekonsciaj pri la necerteco de situacio, kiun mil cirkonstancoj riskis ĉiumomente malfirmigi : bankroto aŭ morto de labordonanto, kuniĝo de entreprenoj, profesiaj malsanoj, sabotado de la ilaro, detrua tertremo, inundo, incendio, fizika nekapableco (iskiatalgio, reŭmatismo, infarkto...), interpuŝado de la karakteroj, profesia kulpo aŭ eraro, malpliiĝo de la vendeblo pro konjunkturo (konkurenco, dumpingo, ekonomia krizo, strikoj, hazardo de la merkatoj, konsumbrida politiko, malkoloniado, socialigado, militfino ktp...).
La nesekureco trafis ankaŭ la agrokulturajn mediojn dum lokaj veter-kataklismoj kaj same dum epokoj de abundo kaŭzanta prezfalon.
Ĝin suferis la sendependaj profesioj ne ŝirmitaj socie kontraŭ la malsanoj kaj por kiuj ĉia labormanko okazigis

perdon de enspezoj.
La porsekuraj investoj estigis tiun produktadon por la profito projektitan tiam en viaj planoj laŭdire "ekspansiaj", bagatela aŭ vana produktado publike mallaŭdegita tiuepoke fare de profesoro Galbraith kaj al kiu la porreklama industrio kaj la ŝtato kune klopodis krei nenaturajn vendeblecojn, dum tiom da bezonoj, ja realaj, restis nekontentigitaj.
La kosto de la nesekureco estis ekscesega. Por subteni la profiton per rareco, la ŝtato devige praktikis esence maltusanan politikon, malbone provizumante la vendejojn, aŭ malhelpante la liveradon de tamen utilaj produktaĵoj.
La rento de produktiveco postulis firmecon de la prezoj ne tre ŝatatan de la konsumantoj kun senŝanĝa enspezo, el kiuj apenaŭ 5 ĝis 6 % partoprenis interesiĝon.
Estis facile kaj elturniĝe kulpigi la fatalon respondeca pri la suferoj de multaj individuoj kaj familioj dum ilia ekzistado. Tiu vidpunkto evitis klarigi la rolon de la ekonomia kadro en tiu interligo de faktoj, ĉe kies fino okazis malaltiĝo de enspezo, preskaŭ ĉiam nemeritita.
La analizo de la faktoroj de nesekureco malkaŝis sendube seriojn da neeviteblaj malfacilaĵoj de natura deveno, sed ĝi malkovrigis ankaŭ la tutan respondecon de homaj konvencioj, de ekonomiaj institucioj, pri la konsekvencoj, tiuj ĉi tute ne naturaj, de tiaj malfeliĉaĵoj en la enspezoj de la personoj.
Sendube, malpliiĝoj de dungoferto okazis antaŭ via epoko, akompanataj de malaltiĝoj de la produktado. Necesis tiam malpli provizumi la loĝantarojn aŭ postuli de ili pli da laborado. Sed en via epoko, ne plu estis same, ĉar la utilan produktadon faris nur duoneto de la laboristaro. Kvankam miliardoj da horoj estis malŝparitaj kaj aliaj miliardoj perditaj ĉiujare sekve de diversaj akcidentoj, la nivelo de tiu utila produktado ŝajnis ne reagi al la fluktuado de la ofico ! Kial do vi senigis je necesaĵo, kial vi senrajtigis tiujn viktimojn de malbenita hazardo, se, paralele, la utila produktado restis samkvanta kaj kapabla provizumi ilin laŭ la sama antaŭa takso ?
Plu konsentante, ke la enspezo estu ligita al la ofico kaj estigita en la prezoj, vi konstruis al vi malhumanan socion, kun frenezaj normoj preskaŭ absurdaj, en kiu oni vidis la individuojn interbatali kiel dum la kaverna

epoko anstataŭ ol interhelpi. Ol la kuniĝon de la klopodoj, kiu estus liberiginta ilin de la malabundo, ili preferis la luktojn forkonsumantajn homan materialon kaj malŝparantajn riĉaĵon. Ili organiziĝis laŭ klanoj cele al daŭrigo de malabunda produktado kun la nura zorgo havigi al si enspezojn, kiuj ebligos iom post iom disvendi kaj dispartigi ĝin. Vi devis malnobligi la laboron, por ke la kredito kresku, la mono cirkulu kaj formu la enspezaron.
Fine, al la peza kosto de la nesekureco necesis aldoni tiun de la jura kaj puna aparato destinita protekti la rentabilitaton de la alproprigoj, la koston de la rabaj difektadoj sekve de ŝteloj, de atencoj, tiun de la armado postulata por la ŝirmado de la vendeblecoj, por la enspezaro kaj la porsekuraj investadoj, fine la koston de la detruoj pro viaj militoj.
Ni ofte nin demandis pri la kialo de tiu inerteco de la socio antaŭ strukturoj tiel fundamente malbonaj. Ĉu necesas supozi la homan penson nekapabla starigi rimedon, nekapabla koncepti aliajn, tamen malpli frenezajn, formojn de sociala vivo ?

## ĈAPITRO XIV

Registrita legaĵo. La revolucia evoluado
La forigotaj oficoj. La oficoj por refakigado
La industrioj de la libertempo
Signifo de la libertempo

Doktoro Harvey momente silentis. Li direktis siajn okulojn al la bretoj de sia biblioteko kaj mia rigardo sekvis la lian. Ĉar mi miris pro la nekutima formato de iuj bindaĵoj, li amuziĝis pro mia rimarko :

- Nu, li diris, vi kredas, ke ni pasigas la tempon legante ?

Li baskuligis unu el la bindaĵoj, kiujn mi rimarkis. Tiam aperis teko rondforma.

- Kion, diable! vi do kaŝas tiel ? mi demandis. Ĉu drogon ? mi ridante diris.

- He! vi preskaŭ verdiris. Ni toksas efektive nian cerbon per la enhavo de tiuj skatoletoj.

Li levis la kovrilon kaj forigis serion da plastaj disketoj ; estis tre etaj magnetaj bendoj.

La kuracisto ridis pro mia miro.

- Kaj jen en mia mankavo la teatra verko de unu el niaj plej famaj aŭtoroj.

Li funkciigis alian bindaĵon.

- Kaj jen estas serio da pasiaj policaj enigmoj. Tie estas rakontoj pri vojaĝoj. Ni havas ankaŭ iujn pli instruajn.

Li metis koloneton da disketoj sur specon de portebla magnetofono kaj voĉo laŭtiĝis, emocia, vateca, envulta, de granda pureco de tembro.

- Ni pasigas, dank'al tiuj registraĵoj, mirindajn momentojn en distroj, dokumentadoj, instruoj, dume ĉirkaŭirante, laborante, veturante aŭ piedirante. Iam malmulte da personoj trovis la tempon por legi, kaj la registrita legaĵo estis rezervita nur al la blinduloj, tial ke la registrita eldonado ne estis profitdona, kaj eĉ se ĝi estus tia, la eldonistoj kaj ĉiuj papervendistoj kontraŭus al tio. Estis tie unu el la aspektoj de la konflikto

inter la Utileco kaj la Rentabilitato, kutima en via epoko. Vi ne povus imagi kiom da virinoj, kaj tute speciale tiuj, kiuj hejme mastrumas, ŝatas tiujn distraĵojn samtempe riĉigajn kaj agrablajn.
Sed pri kio mi parolis ?
- Ĉu ne temis pri la inerteco de la socianaro pri la perspektivoj de ŝanĝo ?
- Jes, daŭrigis doktoro Harvey, la plej granda parto el viaj samtempuloj apartenis al la kategorio de malkontentaj konsumantoj, reala kerno de iliaj postuloj. Dispartigitaj laŭ multaj kluboj politikaj, sindikataj, profesiaj kaj aliaj, ili velkis pro vanaj klopodoj, eltirante nur sendaŭrajn kaj malaltegajn almozaĵojn kiel monhelpon por pagi siajn senĉese kreskantajn bezonojn. Sed tiu dispartigo igis sendanĝera tiun komunan malkontenton de la trompata amaso, kiu devis esprimiĝi per la voĉo de siaj reprezentantoj, tiuj ĉi rapide konsciaj pri sia propra intereso : direkciaj komitatoj, prezidantoj, vicprezidantoj, ĝeneralaj sekretarioj, al kiuj iliaj oficoj havigis profitdonajn enirpermesojn en multajn konsilantarojn, aŭdiencon ĉe oficialaj kluboj kaj certajn konsiderojn.
Kvazaŭ bufro inter la amaso kaj la estraro, ĉiuj ĉi direktantoj, helpataj de siaj staboj, klopodis malkovri mil bonajn kialojn por prokrasti la alvenon de transformo, tamen ja necesa kaj urĝa, de viaj ekonomiaj kaj monaj strukturoj.
"Le evoluo al novaj ekonomiaj kaj sociaj vivmanieroj estas nur progresiva. La naturo ne faras salton" : tio estis la esenco de la diroj kaj propagandoj de tiuj "konstruantoj de la Jaro 2000", ne urĝiĝantaj riski siajn privilegiojn en aventuroj supoze danĝeraj, kaj kies ĉefa zorgo estis persvadi aliulojn, ke la Ekonomio evoluas al formoj pli humanaj sen la bezono perturbi ĝiajn delikatajn mekanismojn.
Tamen tiu evoluo ŝajnis ĉial suspektinda, evoluo interrompita per militoj, dum kiuj severaj moroj alternis kun sociaj malordoj, kie la maljusteco daŭre disetendiĝis tute senpune, kie la hazardo kaj la ŝanco estris sukceson aŭ fiaskon, kie efemeraj liberoj dependis de la enspezo, kie la libertempoj estis ĉiam maloftaj, evoluo, kie senĝene klopodaĉis procentigistoj kaj diboĉuloj, trompŝtelistoj, seksperistoj, spekulantoj, negocistoj, militprofitantoj, tromporabantoj, ekspluat-

istoj de la malvirto kaj de la malmoralo, ĉiuj konsiderataj laŭ la mezuro de siaj enspezoj, evoluo, kiu daŭrigis ĉiujn malbonaĵojn de dekadenca reĝimo.
Sed ĉu la ĉiutaga vivo ne kutimis al tiuj senpreparaj ŝanĝoj surprizantaj la individuon ? Ĉu ĝi ne alportis neatenditaĵojn : nenaturajn mortojn, malriĉiĝojn, subitajn katastrofojn, akcidentojn, epidemiojn kaj gravajn kataklismojn ? Kaj ĉu via ekonomia kadro mem ne estigis profundajn malordojn, detruante familiojn, ruinigante ŝparantojn, kaŭzante multe da memmortigoj , eltirante la mobilizitojn el ilia familia vivo, metante sur la straton personojn pro bankroto de labordonanto, aŭ viktimojn de kriplaĵo, malsano, akcidento, kulpajn nur pri maldungiĝo, kondamnante ankaŭ maljunulojn, vidvinojn, etrentulojn vivi kiel ratoj? Ĉu ne pli justas konsideri la Homon ludilo de hazardo, de malfirmeco, de aventuroj, malhelpata de neantaŭvideblaj faktoj el ĉiuj specoj kaj el ĉiuj momentoj, sed dotita de miriga adaptiĝemo al novaj ekonomiaj strukturoj, precipe se ĉi tiuj celas pli bonan socian harmonion ?
Se viajn revoluciojn, pli ofte politikajn ol ekonomiajn, akompanis sociaj perfortoj, estas pro tio, ke tiuj revolucioj celis al transdonoj de riĉaĵoj, al fortranĉoj de rentoj, al maldungoj sen kompenso. Kaj estis same pri projektoj de mona plibonigo kontraŭaj al privilegioj de la mona komerco, profesio politike tiel influa, ke oni ne plu miras hodiaŭ pri la malsukceso de la timemaj provoj en tiu kampo.
La originaleco de nia Ekonomio pri servo kaj konsumado kuŝas, tute male, sur garantio de plibonigitaj vivkondiĉoj al **ĉiuj** konsumantoj : malpli da neutilaj laciĝoj, pli da komforto, pli da libertempoj kaj kulturo, socia vivo pli harmonia, malpli malmorala, pli humana. Tamen, male al tio iam imagita de multaj, tiu rompo kun la pasinteco, kun ĝiaj malbonaĵoj, maljustaĵoj kaj malordoj, povis efektiviĝi alportante tumultojn nek al la individuaj kutimoj, nek al la funkciado de la familia ĉelo. Ĝi trudiĝis progresive, ne tiom por aranĝi malabruptajn ŝanĝojn, cetere neutilajn, sed por prudente antaŭeniri, ŝanĝante la ŝanĝendaĵojn, al fina celo, uzante la plej efikajn mallongigajn rimedojn. Ni jam sciis, ke nova speco de mono estos perfekte tolerata de la konsumantoj, el kiuj multaj jam kutimis

prezenti por notado la "kredit-slipojn", kiujn liveris al ili viaj ĉiovendejoj, viaj benzinstacioj, kaj iuj hotelaj servoj.
Se la substituado de la amaso de la kutimaj pagrimedoj per "kredit-slipoj", netransdoneblaj, nediskuteblaj, ne plu cirkulantaj sed renovigeblaj, ekestis unu el la solaj novigaĵoj malfacile realigeblaj iom post iom, tamen tiu operacio povus ekpaŝi laŭ eta skalo, tiu de vilaĝo aŭ de komunumo kaj poste disvastiĝi tra la tuta lando.
Je la tago T., tiu de la grava mona reformo, salajroj estis sammaniere preparitaj kaj distribuitaj iniciate de la entreprenestroj aŭ de la administracioj, ĉiuj provizumitaj per slipoj de 50, 100, 200, 500 kaj 1000 frankoj, dum la komitatoj de eminentuloj, starigitaj en ĉiu komunumo, delegis al la profesiaj grupoj la taskon starigi la enspezon de la "memstaraj laboristoj". La esplorado de la malnovaj deklaroj de jarenspezoj liveris, se mankis pli precizaj fontoj, la indikon de la sumo enskribota sur la unuaj kreditslipoj. Pri la efektive dubaj okazoj, la koncernatoj estis petitaj deklari mem la sumon de sia lasta jarenspezo, kun rezervo pri eventualaj kontroloj.
Kiel vi povis konstati, la sumo de la enspezoj, monpremioj kaj monkompensoj, estas ĉiam rondigita je la cento. Kredu, kiom ridinda kaj ekskutima estas hodiaŭ tiu kontado laŭ decimoj kaj centimoj, ĉiuj ĉi apotekistaj kalkuloj primokitaj de viaj burokratoj uzantaj sian tempon por liveri, je proksimuma milimo, la konsumrajtojn de la salajrularo kaj emeritaro, kies ĉefa zorgo konsistis el diskutaĉoj pri la pligrandiga takso de 4,28 % kaj pri la emerita poento je 5,01 FF. La plej naivaj tiel konservis la iluzion ricevi siajn rajtojn strikte starigitajn laŭ vera alkemio de ciferoj, kies misteron fine sukcesis malkovri nur multgalonaj matematikistoj. Tiu tuta mistifiko feliĉe finiĝis. Anstataŭ cerbumi super kalkuloj de statistikoj, procentoj, interezoj kaj patentaj taksoj, la iamaj oficistoj okupiĝas nun pri laboroj pli produktivaj.
Je la tago T + 2, la prezoj, tiel rondigitaj je la deko aŭ la cento, sendependigitaj de la kostoj kaj enspezoj, ekigis serion da ŝtupoj de malaltigo, nuligo, stabileco aŭ renovigo, laŭ la reago de la reprovizumado responde al la mendado, kies aĉetpovo nepre sekvis la fizikan

volumon de la produktado. Sed mi jam parolis pri tio dum nia konversacio lastan semajnon.
Ni fine ekplenumis ankaŭ progresive la organizadon de la oficaro. Antaŭ la tago T, ni enlistigis la oficojn forigendajn, tiujn refortigendajn aŭ starigendajn, same ankaŭ la oficojn provizorajn, ne postulantajn specialajn kapablojn. La personoj okupataj en forigota ofico estis petitaj sciigi kion utilan ili deziras fari, kaj, dum la periodo de profesia refakigado, ili, komprenEble, ricevis la saman iaman salajron.
Se ne estis tuja elekto, la provizoraj oficoj akceptis ĉiujn personojn atendantajn refakigadon.

- Mi estas iom konfuzita, mi konfesis, meze de viaj kategorioj de oficoj : oficoj provizoraj, oficoj de refakigado, oficoj forigendaj, oficoj disvolvendaj. Mi deziras demandi al vi ankaŭ kiel vi liberigis la oficojn kvalifikitajn "disponeblaj" ?
- La plena dungiĝado, kiun viaj ekonomikistoj konsideris tre grava, kaŝis al vi vian riĉecon. De kiam ĉiu estis okupata eĉ je io ajn, je iu ajn produktokvanto, la prospero renaskiĝis, ĉar la mono cirkulis. Tamen temis pri prospero pli ofte banka, "nacia", kiu ne nepre lasis komfortan vivrimedon en ĉiuj hejmoj, kaj la plej granda parto el la etsalajruloj, kiel mi jam diris al vi, utilis nur kiel transdonantoj de mono, la prezoj kaj la fisko lerte reprenis al ili la plimulton el ilia salajro antaŭ ol ili ĝin profitis.
La reprenado de la laboristoj disponeblaj la morgaŭon de la strukturŝanĝo estis konfidita al identigaj komisionoj, kiuj starigis tiun inventaron en nepra interrilato kun la profesiaj organizoj. La reprenendaj laboristoj konsistis speciale el : tiuj liberigitaj per la aŭtomatigo, la kresko de la produktiveco, la forigo de la oficoj evidente pletoraj, precipe ĉe la kamparanoj, la komercistoj, la magazenistoj, la ŝtatoficistoj kaj militistoj, la oficistoj de benzinvendejoj, kies nombron oni povus dekonigi sen ajna ĝeno por la uzantoj. Ankaŭ multe da laboristoj fariĝis disponeblaj pro la mallongigo de la tempoperdo pro malsanoj kaj akcidentoj, pro la memvola daŭrigo de la laboro trans la postulata tempo, pro la refakigado de la neadaptitoj, pro la rapida kvalifikado, pro la socia promocio, pro la staĝoj de la studentoj, pro uzado pli racia de la manlaboro

puna kaj soldata, fine pro importado de eksterlandaj laboristoj kaj pro la demografia kreskado.
Sed ekde la tago T ankaŭ tre multe da oficoj fariĝis senutilaj, pliigante la nombron da disponeblaj personoj: teknikistoj de la oficoj komercaj kaj financaj, neproduktantaj metiistoj, kurtaĝistoj, bienaj agentoj, asignistoj, bankrotaj sindikoj, kambiagentoj, enspezistoj, stampistoj, kasistoj, enspezestroj, oficistaro de la socialaj asekuroj kaj de la asekuraj kompanioj, makleristoj, stratvendistoj, personoj zorgantaj pri komerco kaj spezoj : financaj oficoj de industriaj kaj komercaj establoj, oficoj de impostoj, de registrado, de dogano, de markoj, organismoj de kredito kaj pruntoj, direkcio de buĝeto, financa ministerio, ĝeneralaj spezoj, kaso de deponoj kaj garantioj, oficejo de monŝanĝo, asekuraj kompanioj, bankoj, ofico de la publikaj ŝuldoj, departementaj kasoj, procesoficejoj, industrioj pri reklamoj, pri armado. Fine la regrupigo de la punktoj de distribuado ekliberigis ankoraŭ pli ol 60 % el la magazenistoj kaj kontoristoj.
Multaj eminentuloj, kiuj kutimis praktiki financan esoterismon kaj ĵongli per ĉies mono, konsterniĝis pro la malapero de la objekto mem de siaj klopodoj. Tiel estis tute speciale pri la financaj ĉefoficistoj, kontrolistoj, inspektoroj, kaj pli granda nombro da politikistoj, kies agemo celis ĝis tiam akiri kreditojn kaj subvenciojn per uzado de ilia influo. Same, ĝeneralaj kaj komunumaj konsilianoj vidis malaperi la materialon, sur kiu ili praktikis siajn talentojn. Ĉiuj parolademuloj, gravegaj prezidantoj, kies aŭtoritato mezuriĝis per la nombro de milionoj aŭ miliardoj, kies tajdon ili direktis, same vidis la disfalon de sia piedestalo. Unuj vivis per podiaj efektoj, dum aliaj nutris sin per frazeologio adaptita al parolmaniero de la financistoj. Malplaĉis al ili konstati, ke la nova reĝimo tute ne bezonas ilian sciencon, la tutan literaturon de ekonomikistoj kaj ekonomiistoj, kiu plenigis la bretojn de librejoj dum pli ol jarcento, instruis generaciojn da lernantoj, mobilizis la laboron de armeo da tipografoj, kaj havigis renton al tiom da paperkomercistoj. Ĉu la mono, la antaŭzorgoj, la ekonomikaj kalkuloj, la planoj, ne okupis multe tro da tempo dum la pasintaj jaroj ? Iuj eĉ asertis, ke pli ol la duono de la oficoj celis nur promenigi la monon de konsumanto al alia.

Nur por kontregistri la "ŝuldojn" kaj "havojn", kolektadi kaj redistribui la monpaperon, ĉu ne necesis postuli la kunhelpon de la personaro de la bankoj, tiu de la ĝeneralaj spezoj, de la direkcio de la prezoj, de la kaso de familia monatribuo kaj de socia asekuro, tiu de la direkcio de la buĝeto, de la "plano", de la nacia kredito, de la direkcio de la impostoj, de la bienaj societoj kaj de kredito, de la ŝparkasoj, de la poŝtkontoj, de la impostkolektado kaj de multaj aliaj administracioj, kie oni parolis pri mono ?
Oni devis forstreki tiujn aktivaĵojn, kies rolo estis de tiam finita.
- Kaj jen, daŭrigis la kuracisto, ni restis do embarasitaj per milionoj da senlaboruloj. Sed ni havis tamen la konsolon scii, ke ilia provizumado restis certigita per la tuta laborularo de la utila produktado kaj ne estis kialo por ne doni la kutiman salajron al tiuj multaj senlaboruloj reenoficigotaj.
Feliĉe, ne mankis la oficoj de refakiĝado. Ĉu ne necesis prizorgi unue la oficojn antaŭe okupitajn de la virinoj, kiuj deziris tiam restadi hejme, aŭ de la emeritoj, duobligi ankaŭ iujn postenojn taksitajn penigaj ?
Paralele, multaj profesioj estis tiam nesufiĉe provizitaj: socialaj asistantinoj, familiaj helpantinoj, akceptejoj, infanĝardenistinoj, flegistinoj, gastakceptantinoj, estetikistinoj, infankulturistinoj, hospitala kaj hotela personaro, arkivistoj, arkeologoj, bibliotekistoj, konsilistoj privataj kaj pri profesia orientado, internaciaj rilatoj, prelegantoj, kulturaj kluboj, komentistoj, art-kritikistoj, dialogistoj, verkistoj, instruistoj, enkadrigado de la junularo, monitoroj, enketistoj, agroekspertoj, grafologoj, higienistoj, urboplanistoj, arkitektoj, inĝenieroj, interpretistoj, sekuristoj, fekundigistoj, pejzaĝistoj, kuracistoj, kirurgoj, dentistoj, mastrumantoj, organizantoj de renkontoj, profesoroj pri ludoj, muziko, danco, psikanalizistoj, psikoteknikistoj, pilotoj de helikopteroj, arbokulturistoj, ĝardenkulturistoj, scenaristoj, anoncistoj, tradukistoj, kemiistoj, gvidantoj por vizitoj de laborejoj kaj uzinoj, maŝinkondukistoj, aktoroj kaj artistoj, hararanĝistoj por virinoj, desegnistoj por vivantaj desegnoj, demonstristoj kaj riparistoj, elektronikistoj, fizikistoj, agronomoj, sciencaj serĉistoj, meblotransportistoj, kampomekanikistoj, purigistoj

de la publikaj lokoj, de la plaĝoj kaj ĝardenoj, vojprotektado, sekuraj kolegioj, muntistoj kaj reĝustigistoj, helpkuiristoj, restoraciistoj ktp...
Ankaŭ la porlibertempa industrio, kiun ni intencis disvolvi, postulis multe da novaj oficoj. La klopodo efektive direktiĝis al la konstruado de moteloj kaj hotelaj ekipoj, de individuaj kaj familiaj helikopteroj, velŝipoj, motorboatoj, ŝirmitaj kaj hejtataj banbasenoj, televidaparatoj kaj transistoroj, junulardomoj, tenisejoj, ŝirmitaj stadionoj, fot-laboratorioj, optikaj materialoj, projekciiloj, kameroj, akvarioj, ludiloj, sociaj ludoj, seĝtelferoj kaj telferoj, magnetofonoj, ekipaĵoj de stacioj de vintraj sportoj kaj de akvoveturaj sportoj, areoj por velflugado, substrukturo por turisma aviado kun tereno proksima de ĉiu grava komunumo, turismaj aviadiletoj kun tre simpligita konduko, spektaklejoj, muzikiloj, elektrofonoj, komfortaj kampadejoj, ruldomoj, ekipoj por fiŝado kaj submara esplorado, golfejoj, kegloludejoj, glaciglitejoj, sportaj ekipoj, arbokulturejoj. Ni devis ankoraŭ zorgi pri la laboramatoroj, la amatoroj pri mallongaj radio-ondoj, pri reduktitaj modeloj, kinistoj, diskŝatantoj, malkovri talentulojn, mimikistojn, artistojn, kantistojn, akrobatojn, aranĝi kaj ekipi plaĝojn, ekipi cirkojn, karuselajn parkojn, plimultigi koncertojn, spektaklojn pri sono-akvo-lumo, rondirantaj bibliotekoj, provizumi per akcesoraĵoj la trupojn de amatoraj teatroj, eduki monitorojn, dancinstruistojn, muzikistojn, realigi edukajn filmojn, provizumi la kolektistojn, aranĝi krozadojn, varbi reporterojn. Tiel, la industrio de la libertempo, je la celota stadio, estis ebligonta mem enoficigi la plej grandan parton de niaj "laborliberigitoj".
La libertempo efektive fariĝis nia plej urĝa bezono, post la kontentigo de niaj elementaj bezonoj. Mirige nekutima laŭ siaj naturo kaj konsekvenco, sed precipe tiel stranga por viaj ekonomikistoj, kiujn ĝi profunde perpleksigis, la libertempo, bezono senĉese ampleksiĝanta, efektive havis lokon nek en la projekto de libera merkato, nek en tiu de viaj planitaj sistemoj, kiuj tiam daŭre ligis la enspezojn al la plena dungiteco. Antaŭ kvardek jaroj, vidante tiom da malserenaj homamasoj iri al laborejo por tedegaj longegaj veturadoj lacegaj, postuladi laŭlonge de la jaro, malhavi esperon, observante kiel la laboristo, la suba ŝtatoficisto,

la malgrava oficisto plenumis sian taskon, legante la raportaĵojn efektivigitajn en laboristaj medioj, ni nepre devis konkludi al daŭra malhumaniĝo de la laboro.

Sendube tiu malhumaniĝo parte devenis de la disdivido de la laboro pelita ĝis ekstremo, trudita de la strebado al pli fruktodona produktiveco, sed tiun seninteresiĝon al laboro, elmontritan de granda kaj senĉese **kreskanta** nombro de salajruloj, ŝajne kaŭzis precipe la disvolviĝo, cele al profito, de la produktadoj, kies ĉefa kliento estis la ŝtato, kaj ankaŭ de ĉiaj malŝparadoj, kiuj valorigis aliajn produktadojn, same tute senigitajn je homa celeco.

Al tiuj neutilaj kaj senkuraĝigaj oficoj truditaj de modo, aparte stultega, de formado de viaj monprofitoj, indas aldoni la serion ĉiam kreskantan de "oficoj-servoj", kiuj neprigis spezojn, procezojn, investojn kaj arbitraĝojn : asekuroj, bankoj, kolektado de impostoj, administrado de la akcioj, procesoficejoj, financaj fakoj de la entreprenoj, komercaj servoj, reklamindustrio, socia asekuro, borso, inspektoj kaj kontroloj, publika ŝuldo, plano, buĝeto, leĝaro, administrado, resume kelkaj 15 miliardoj da horoj estis tiel misuzitaj ĉiujare nur cele al amasa kolektado, redistribuado de mono, cirkuligado de porcio-kuponoj donantaj laŭvice al ĉiu el viaj samcivitanoj la rajton konsumi parton de strikte utila produktado, kies efektivigo postulis jare nur ĉ. 10 miliardojn da horoj, sumo kontrolita post nia reformo.

Do ŝajnis teknike eble ĝiri tiujn 15 miliardojn da horoj al la konto de la libertempoj kaj de ties industrioj kaj la operacio dependis nur de la transformado de la mona sistemo kaj de la alpreno de alia maniero krei enspezojn.

Ĝuste la konsciigo, ankoraŭ nepreciza, pri tiu socia neutilo, kaŭzis la disreviĝon de tiom da viaj salajruloj implikitaj en tiuj malŝparoj de homa materialo. La ĝojo krei, "poluri" la laboraĵojn, estri la materion, tiu tuta frazaro, kiun tiam oni tre ŝatis uzi, havis sencon nur por etaj grupoj : inĝenieroj, direktoroj, altrangaj oficistoj, teknokratoj. Sed spite tiun artefaritan homan varmon, kiun nur kelkaj prosperaj entreprenoj zorgis disfamigi inter sia personaro, la plimulto de la manlaboruloj iom post iom ĉesis atribui al

la laboro, katenanta ilin al aliula servo, ian ajn "noblecon".
Precipe ŝajnis urĝe al la amaso enspezi sian kreditoraĵon, forskui sian servutecon, kuri for de la bruo, for de la haladzoj, liberiĝi de la hierarkiaj devigoj, de la ordonoj, de la riproĉoj, de la turmentadoj, forlasi la ekzaltan vivon de grandaj urboj, retrovi sin "libera", libera agi laŭplaĉe, libera eksterigi mil talentojn ĝis tiam neatentindajn, valorigi sian personecon, superi sin. Multegaj estis tiuj, kiuj atendis la liberigan horon, la sabaton, la libertempojn, la emeritecon, la feriojn. Tiu avidego al libertempo, tiu bezono forkuri el la profesia kadro sendube komuna al ĉiuj epokoj, prenis, dum la via, akran karakteron de bezono kvazaŭ fiziologia.
Ni scias hodiaŭ, ke per multaj aktivoj, kiujn ĝi ebligas, la libertempo ofte kunutilas por levi la nivelon de bonstato de la individuoj kaj de la familioj. Ni konsideras la libertempajn aktivadojn kiel specojn de donacoj, kiujn ĉiu konsentas al si mem kaj al siaj samfamilianoj, alportante al ĉiuj suplementon de kontenteco.
Laŭ tiu vidpunkto, la enkonduko de la libertempo, konforme al nia ĉarto, konsekvence transdonas al la individuo pli egan parton de respondeco kaj iniciativo rilate lian gradon de kontento. Ni konsentis kiel celon de nia ekonomio la kontentigon de la homaj bezonoj kaj pro tio la libertempo nun viciĝis sur la listo de la produktoj kaj servoj plej dezirataj.
Sed la libertempo plu devas esti provizumata, aranĝata, diversigata, alirebla al ĉiu, t.e. pagita kiel servo. En la estinteco vi organizis ĝin nur favore al emeritoj aŭ al libertempuloj, al kiuj vi konsentis nur bagatelan vojaĝmonon. Kaj tial ke viaj libertempoj ne kunhavis la materiajn, intelektajn kaj moralajn kondiĉojn necesajn : kulturo, edukado, komforta kaj sonizolita restadejo, variaj kaj alireblaj distroj, industriaj strukturoj kaj servoj adaptitaj al viaj bezonoj, ili konsistis plej ofte, por la popolamaso, en helota vivo dediĉita al enuo, alkoholo aŭ malvirto.
La rekonsidero al la libertempo dependas hodiaŭ de tiu eblo, iam nekonata, kiun liveras la teknika kaj scienca progreso : fari el ĝi la ilon de la morala progreso. La homo povas hodiaŭ dediĉi parton de sia vivo, de siaj tagoj, de siaj semajnoj, de la jaro, por

pliampleksigi siajn konojn, provizi sian cerbon, valorigi sian personecon, zorgi pri sia propra plezuro kaj tiu de siaj samfamilianoj, vivi libere.

Ŝajnas al mi nenormale, ke dum via epoko, kiam la energidonaj rimedoj aldonitaj al la homaj klopodoj ebligis multobligi la volumon de la plimultaj produktoj laŭ mirigaj proporcioj, la homo estis ankoraŭ devigita liveri la saman kvanton da laboro, dum dudek laborhoroj semajne dum dudek ĝis dudek kvin jaroj je la servo de aliuloj sufiĉus por kontentigi la postulojn de la utila produktado.

Sed via Ekonomio bazita sur la kapablo de la ofico por cirkuligi stokon de mono, ne povis strukture akcepti libertempon plene pagitan. Via Politiko pri plena dungiĝado, forkonsumanta riĉaĵojn kaj ekscesegajn homajn laborojn, estis la invento de viaj financistoj, kiuj, pri civilizacio de libertempo, lernigis al vi nur ties senhontan karikaturon lerte ekspluatatan de kelkaj iluziistoj.

Niaj ekonomiaj kaj monaj strukturoj, konceptitaj por kunigi la teknikan progreson al la morala kaj socia progreso, taŭgaj por efektivigi liberan tempon, transformis vian stultegan mondon dediĉitan al la netrafebla plena dungiĝado, tiun mondon en kiu, malriĉelemaj, ligitaj, vi uzis la duonon de via tempo kurante al mono.

## ĈAPITRO XV

La disvolvendaj industrioj
La uzadoj de televido,
de la individua helikoptero,
de plastaj materialoj.
La hierarkio en la enspezoj
La interesiĝo al laboro

Eksilentis la kuracisto. Iu ĵus frapis ĉe la pordo. Estis Chester.

- Mi estas tre kontenta vin vidi, diris al li mia gastiganto. Ĵus mi estas dononta al nia amiko kelkajn detalojn koncerne agfakojn, pri kiuj vi estas kompetenta. Antaŭ momento li ŝajnis maltrankvila pri la refakigo de niaj senlaboruloj je la tago T. Mi klarigis al li pri dungado en la porlibertempaj industrioj : restas al vi indiki kiel vi klopodis por la aliaj.

Chester etendis sian manon al ni :

- Feliĉa mi estas retrovi vin, li diris, kion vi deziras scii ?

- Nu, mi respondis, parolu pri viaj novaj industrioj.

- Fakte, ni havas nemulte da vere novaj industrioj. Ni disvolvis iujn fakojn, kiuj, dependaj de la merkato dum la lasta jarcento, estis daŭre bremsataj pro nesufiĉaj vendeblecoj. Inter la ĉefaj sektoroj tute speciale prizorgataj de niaj komitatoj, mi citas al vi : la aŭtomatigado, la individuaj kaj kolektivaj hejmaj aparatoj, normigitaj laŭ la plej bona marko, la turisma kaj transporta aviado, la aŭdovido, la konstruado de aŭtovojoj, la atomcentraloj, la cementfabrikoj, la elektra konstruado, la konservado, la klimatiziloj, la eduka kino, la sinteza kaŭĉuko, la aŭtomataj disdonaparatoj, la levaparatoj, la elektroniko, la industrioj de azoto kaj frido, la petrolkemio, la fiŝbredado, la arbokulturejoj, la agronomia serĉado, la ilmaŝinoj, la konstruaj materialoj, la agromaŝinoj, la plastaj materialoj, la silikonaj teksaĵoj.

Ni konstruis ankaŭ novajn civitojn meze de la kamparo,

malkonstruis ĉiujn malsanigajn lokojn kaj ĉiujn loĝejaĉajn kvartalojn.
Ni uzas televidon por la hejma aŭdovido, por la konado de la mondo, la edukaj ludoj, la kontrolo de la planado en laborejoj kaj fabrikoj, la inventaro de la stokoj, la gardado de la laborejoj kaj ĉiovendejoj, la rapida profesia formado, la lernado de la manlerteco, la operaciaj teknikoj, la konsiloj kaj receptoj por la hejmaj mastrumantinoj, la kursoj de formtranĉo kaj desegnado, la infanvartado, la formado de aktoroj kaj prelegantoj, la prezentado de specimenoj kaj varofertoj ĉe la lokoj de produktado, la gazetaraj konferencoj, la dissendo de la kunvenoj de eminentulaj konsilantaroj, la informado al la konsumantoj, la ekonomia propagando, la instruado de la malfacilaj temoj, la mallongigo de la studdaŭro, la ŝparado de instruistoj, la eduka reklamado, la elementaj sportaj instruoj, la lernado de ŝakludo, fine la dissendado de la plej bonaj filmoj kaj spektakloj, kio des pli etigas la multalvenojn al la spektaklejoj kaj ŝparigas al la artistoj tedegajn provojn.
Same, helikoptero estas por ĉies uzoj kaj grandskale kiam la atmosferaj cirkonstancoj tion ebligas, por ŝpari tempon, personaron kaj rimedon : montaraj kaj surmaraj helpoj, prigardado de la plaĝoj, signalado de la incendioj kaj lokalizado de la irejoj, ekspluatado de la vojaroj de elektra transporto, montara transporto de materialo, alportado de materialo al laborejoj, provizumado de la rifuĝejoj, lumturoj, ŝipoj sur la maro, altaj paŝtejoj dum senpluva vetero, izolitaj regionoj, aera kaj voja polico, serĉado de la deliktuloj, transportado de la kampuloj al la urbo, higienaj elĵetoj, servoj de la poŝto kaj de la kuracisto sur la kamparo, aliro al izolitaj lokoj, malkovro kaj valorigo de novaj turistaj pejzaĝoj, konstruado de rifuĝejoj en altaj montoj, ĉasado, fiŝado, rapidaj interrilatoj for de la stratoj embarasoj, de la laceco kaj de la nerektaj vojoj, traktado de la rikoltaĵoj, disverŝado de insektodetruiloj, semadoj, lukto kontraŭ akridoj, evakuado de viktimoj de tertremo aŭ inundo, alvenado al aviadilejoj, sekura transportado de eminentuloj, signado de vojplanoj, esplorado de la vojstrekoj kaj montopasejoj, vojfarado, signalado de lokoj de fiŝado, skitrajno, transŝipigo de pasaĝeroj sur la maro, helpo al vojcirkul-

ado, fotado kaj serĉado pri minoj, transportado de fajristoj kaj unuaj helpoj, laboroj pri ligno kaj akvo, informado kaj informiĝo, turismo, kampado en izolitaj lokoj, studo de signado de oleoduktoj kaj alttensiaj elektraj lineoj, poŝtservo interurba, disŝutado de sterko, transiro de riverŝveliĝo, konstruado kaj inspektado de barajôj, translokigo de kamparanoj tra iliaj bienoj kaj kontrolado de iliaj sezonaj laboristoj per individuaj helikopteroj fabrikataj nun grandkvante kaj kiuj ŝvebas je nur kelkaj metroj super la tero.
Estas same por la plastaĵoj nun ĉiutage kaj por preskaŭ ĉio uzataj, kiuj viaepoke estus okazigintaj kontraŭagojn de la feraĵistoj kaj de multaj fabrikistoj kaj liveristoj. Ni uzas ilin kiel konstrupartojn por la loĝejoj, oleoduktoj, karoserioj de aŭtoj kaj vagonoj, elektra materialo, ĉarpentaĵoj, pilonoj, dentradoj, iloj, pakotekoj, hejmaĵoj, vestaĵoj, ŝuoj, tukoj, ĉemizoj, mebloj, pentraĵoj, ornamaĵoj, tenduma kaj sporta materialo, fabrikado de skioj, librejaĵoj, lernmaterialo, muzikdiskoj, ŝvebaviadiloj, aviadiloj, ludiloj, pavimado de ŝoseoj, ŝirmkovriloj por stakoj kaj klimatizado de ŝirmitaj ĝardenkulturoj. Por citi nur unu ekzemplon, la "propileno", subprodukto de la keroseno, kiun uzegis via milita aviado, timigis ĉiujn teks-industriistojn. Abunda materialo tute malkara, el kiu oni povis krei teksaĵon kvaronigantan la prezon de la ĉemizaĵoj. Tiel oni evitis diskonigi ĝiajn aplikojn, kiuj estus ruinigintaj multe da produktistoj kaj komercistoj. Hodiaŭ, dank'al propileno ni povas bonvole oferti al ĉiu el niaj samcivitanoj ĝis tri aŭ kvar ĉemizojn jare, kaj la eluzo de tiu materialo estas tre eta.
Nia unua zorgo estis do malaperigi ĉiujn bremsojn kontraŭ la produktado de varoj kaj servoj **utilaj**. Ni fine komprenis, ke cirkulanta mono neniam atingus tiun rezulton. Laŭ tiu postulato ni do starigis novan sistemon.
Pligrandigi je 50 % la **utilan** produktadon estis celo teknike kaj materie ebla dum eta templimo, ĉar, sen ion ŝanĝi al la tiam uzata substrukturo, sufiĉis, post forviŝado de la financaj baroj, forigi la malŝparojn, plani la oficojn kaj uzi la ilaron kaj ekipojn laŭ ties optimuma kapablo produkti per ĉiuj energifontoj. Tiel ĉiu vidis sian aĉetpovon kreski same je 50 %.
La reformemuloj, multaj dum via epoko, ŝajnis ignori la koncepton pri "nur utila produktado" kaj volis, ke

tiu aĉetpovo estiĝu per aldona salajro. La plej sagacaj rekomendis la akordigon de la prezoj al la kondiĉoj de la oferto kaj mendo, kalkulante je la kreskado de la produktado por plietigi la prezojn, dum la nominalaj enspezoj suferus nur etajn korektojn, simplajn ordigojn. Kiel Katarina hodiaŭ klarigis al vi, niaj prezoj karakterizîĝas pro tio ke ili povas esti nun pli malaltaj ol la teoria produktokosto, malsuperi la minimuman prezon kaj eĉ trafi nulon en okazo de totala abundo.

- Sed, mi diris, kiel ĉiu ricevas la ĝustan prezon de sia laboro ?

- La laborprezo, respondis Chester, prenas la formon de kredito enskribita sur ĉiu slipo. Ni estas salajrataj ne plu laŭ la materia rezultato de la laboro, kiun ni faras, sed laŭ la funkcio, kiun ni plenumas, laŭ nia kvalifiko, kaj ankaŭ iamezure, laŭ niaj bezonoj kaj nia sociala efikeco. Tiel, per niaj monrimedoj, ni aĉetas produktojn, kies prezo estas tute fremda al la sumo de la salajroj distribuitaj al la personoj, kiuj kunlaboris al la produktado, transportado kaj distribuado de tiuj produktoj.

- Mi konsentas, mi rebatis, ke oni povas apliki sistemon de indicoj, ian taksadon, koncerne la kvalifikon kaj la funkcion de la oficisto, sed por la bezonoj, esence subjektivaj, mi malbone distingas la kriteriojn, laŭ kiuj vi hierarkiigas la salajrojn, kiujn vi distribuas.

- Via rimarko estas ĝusta, respondis la inĝeniero, sed ni ne estus realigintaj nian celon, se ni ne estus alportintaj kontentigan solvon al tiu demando.

Ni do interkonsentis, ke, por la plimulto de la individuoj, la vivmaniero estis ĝis tiam kondiĉita de la nivelo de la enspezoj, ĉar ĉiu devis nepre dozi siajn bezonojn laŭmezure kun sia buĝeto. Ni deduktis el tio, ke, por malhelpi neniun, la bezonoj de ĉiu respondu al ties kutimaj enspezoj, ankaŭ por la bonhavuloj. Konsekvence, ni plu salajris tiujn lastajn laŭ iliaj antaŭaj enspezoj, escepte de la parto, kiun ili kutimis investi.

Koncerne la konsumantojn, kies enspezoj estis modestaj kaj ĉefe tiujn, kies realaj bezonoj estis ne tute kontentigitaj, progresiva ordigo de iliaj enspezoj, de ilia kvalifika kaj funkcia indico plibonigis tre bone ilian vivmanieron.

- Resume, mi diris, vi ne tuŝis la altajn vivnivelojn, kaj precipe la iamaj senhavuloj profitis de la kreskado de la produktado.

- Jes ja, estas tio. Ni ne volis unuformecon de la enspezoj, kiu naskus ĉe la plimulto senton de pli grandaj maljustaĵoj, ĉar la bezonoj profunde diferencas de individuo al alia, de familio al alia. Ni ne konsentis ankaŭ egaligi malsupren, t.e. eltiri la pluson de la bonhavuloj por doni ĝin al la malpli favorataj. Tio estis iam la programo de viaj socialistaj skoloj.
Ni kalkulis nur pri la pliigo de la volumo de la produktado por pligrandigi, dank'al sagace distribuataj enspezoj, la porcion de la konsumantoj, kies bezonoj ne estis bone kontentigitaj. Tiel la konkura fervoro plu daŭras, ĉar ni konservis al la aktivadoj la instigilon de la persona intereso, harmoniigita nun kun la kolektiva intereso.
La malnova sistemo konsideris la monon kiel donitaĵon kaj ankaŭ kiel superegan celon. En la nia, la mono estas nur rimedo, simpla helpilo, ilo je la ekskluziva servo de la konsumado. La donitaĵo estas la disponebla kaj kvalifika laboro, la celo estas produktado aŭ utila servo. La prezo utilas nur por porciumi la konsumadon, konsidere al la konstantaj, pli-malpli restantaj, multnombraj malabundoj.
La mono estas nur rimedo por konsumi. Ĝi ne plu estas rimedo por investi, kaj la monŝparado ne plu havas sencon rilate la sekurecon, ĉar tiu ĉi estas strukture garantiata al ĉiu individuo.
- Kaj malgraŭ ĉio, mi diris, ĉu la individuo plu interesiĝas pri sia laboro, dum li sentas sin ŝirmata kontraŭ la bezono ?
- Unue, respondis Chester, la individuo estas ŝirmata kontraŭ la bezono, nur kondiĉe ke li registriĝu ĉe la laborservo, same kiel, iam, necesis, por ricevi salajron, pruvi oficon kaj, por profiti aliulajn servojn, plenumi soldatservon, se ne, vi estus persekutita de la ĝendarmaro kaj ne povus dungiĝi.
Estas do same hodiaŭ. Ĉiu individuo, memvole forlasanta sian oficon sen enskribiĝi en atendan liston, estas denuncita al la centra sliparejo kaj riskas, se ne esti senigita je sia kreditslipo, almenaŭ ricevi tiun minimuman vivrimedon, kiun vi iam rezervis al viaj maljunuloj pune pro ilia aĝo.
Tiel la salajro restas la rekompenso de deviga laborperiodo plenumita ĉe la kolektiva servo, kvankam tiu salajro estas disigita de la daŭro de tiu periodo.

Alivorte, la labormaniero de la individuo sendube gravegas por taksi lian enspezon, lian indicon ; tamen la tempo, dum kiu li plenumas siajn socialajn devigojn, por tio ne estas konsiderata, sed liaj libertempoj, lia labormanko, supoze ke provizora aŭ refakiga ofico ne estus proponita al li, kiam li decidis ŝanĝi entreprenon, lasas sendifekta lian enspezon. Nur la forkuro estas malmilde punita kaj sufiĉas por instigi lin plenumi siajn devojn.

- Ĉu vi ne havas la impreson esti - kiel mi diru?
- enkazernigitaj ?

- Jen estas grandega vorto, replikis Chester, kun rideto. Se vi nomas enkazernigo la fakton esti okupata en oficejo aŭ en laborejo dum ia nombro da horoj ĉiutage, da tagoj semajne, de semajnoj jare kaj da jaroj en la vivo, nu, konsentu, ke tiu enkazernigo estis pli malbona dum via epoko, kiam oni vidis tiom da personoj forlasi sian hejmon frumatene, por iri penadi al laboro ofte sensenca, senutila, aŭ ankaŭ okupiĝi pri bagatelaĵoj, nur por ricevi salajron, fine de du semajnoj aŭ de monato.

Tiun senton de sociala neutilo spertitan de viaj samcivitanoj anstataŭas nun konscio pri la utila rolo plenumata de ĉiu serve al komunuma produktado, kiun profitas unue li mem kaj liaj samfamilianoj.

Sed, por kompletigi la fervoron al laboro, ni starigis ankaŭ aron da aĵoj, da detaletoj, kiuj, mi tion certigas, estas gravaj por multaj laboristoj ; ĉar ilia enspezo estas garantiata, ili estas pli kaj pli avidaj je konsidero. Ni aljuĝas meritaĵojn, ni publikigas la fotojn de la plej indaj en la gazetaro. Kelkaj estas invititaj paroladi ĉe la radiosendilo, kaj protio ili tre fieras. Sed la kuracisto devus esti jam koniginta al vi ĉion ĉi, kaj prezentinta la tuton de niaj stimuloj.

- Efektive, mi respondis.

Kaj, manifestante etan malpaciencon :

- Malgraŭ ĉio, niaj profesoroj instruis al ni certan koncepton de la penoj. Por riĉigi la individuon kaj la socion, la laboro devas resti lukta ago, kun la ecoj de ludo, t.e. risko, pripenso, ruzo kaj hazardo.

- Ĉiuj ĉi elementoj estis fakte kutimaj al viaj entreprenoj fordonitaj al la hazardo de la konjunkturo, devigataj por vivi, ruzi kontraŭ la klientaron, kaj riskantaj miskalkulitajn elektojn, sed ĉu vi ne kredas, moke

diris Chester, ke tiujn ĉefajn ecojn praktikis ĉefe viaj ŝtelistoj de kokidoj kaj viaj domrabistoj ?
Ni scias, ke eminentaj entreprenestroj pretendis similigi la laboron, kia ajn estas ĝia celo, al sociala funkcio; sed ili malbone kaŝis sian konfuzon, kiam ili estis devigitaj agnoski, ke la laboro, al kiu estis kondamnitaj iliaj oficistoj, prezentis nur tre etan socialan utilecon, kaj tiam ili rekonis, ke la celo de la laboro estis ofte nur la rento aŭ la profito. Konsekvence la produktado por la profito iom post iom anstataŭis la produktdon por la utileco. Ĉu viaj kamparanoj, kiuj elradikigis siajn plantaĵojn, forŝutis siajn rikoltaĵojn sur la ŝoseojn, viaj fiŝistoj, kiuj reĵetis en la maron la frukton de sia laboro, atakalbordiĝis al la ŝipoj liverantaj siajn produktojn en la havenoj kaj verŝis mazuton en la ŝipkelojn, viaj publicistoj, kiuj endormigis la publikan malfidon, viaj procentegistoj fine, ĉu do tiuj personoj, kaj multaj aliaj, plenumis socialan funkcion ?
Aliaj emfazis pri la saviga rolo de la laboro. Tamen sufiĉis demandi suboficistojn, foje plenumantajn absurdajn taskojn, por ekkompreni, ke ilia unua zorgo estis forkuri el tiu kvazaŭa punlaboro konsiderata kiel nura rimedo havigi al si salajron.
Ni rehonorigis la nocion pri utila laboro, difinante aliajn celojn al progreso. Kiam dekoj da miliardoj da energidonaj sklavoj aldoniĝis al la laboristaro, tiu celo tiam estis malpliigi la elspezon de homa laboro, etigi la tempon pasigitan en la kolektiva servo, krei libertempon por ĉiuj. Sed libertempo ne estas senokupeco. Male, ĝi ebligas liberajn aktivadojn neprofitcelajn, memvolan kontribuadon de ĉiu al supera civilizacio.
- Mi bonvolas konsenti, mi diris post momento, ke pro la videbla rezulto de viaj zorgoj - la prezmalaltiĝo ebliganta al ĉiu pli konsumi - certa kolektiva fervoro tenas la individuojn ĉe l' laboro. Sed kio okazos, kiam via sistemo atingos ĝeneralan abundon, t.e. senpagan, kaj kiam sekve neniu rento estos distribuata? Ĉu vi ne direktiĝas al samigo de la vivmanieroj ? Al kia socio vi alvenos, tiel implikitaj en la ĝenerala senpageco de la produktoj kaj servoj ?
- Via hipotezo estas absurda, respondis Chester iom malpacience, kaj neniam ni priparolis ĝin. La plena abundo estas mito ; ni konas la limojn de niaj produkt-

kapabloj, eĉ aŭtomatigitaj. La bezonoj senĉese disvolviĝas kaj multaj el niaj prezoj estas, de pluraj jaroj, tre firmaj. Tio estas pruvo, ke la konkurado pri la raraj produktoj estas ĉiam vigla. Kial produktoj estas ankoraŭ raraj ? Ties kvanto tamen pligrandiĝis, sed paralele same la bezonoj. Aliparte, la soifo al libertempo ĉiam pliiĝas, kaj por kontentigi ĝin ni devas ne tro zorgi pri iaj produktofakoj ne ĉiam facile aŭtomatigeblaj.

Forpasos ankoraŭ multaj jaroj, eble jarcentoj, antaŭ ol ni alvenos al tiu "preno el la produktamaso", kiun iam al vi promesis viaj komunistoj. La konkurado estos ankoraŭ vigla pri objektoj aŭ servoj, kies abundo ne estas antaŭvidebla : raraj eldonaĵoj, nekutima manĝo, altprezaj tualetoj, juveloj kaj eĉ la enirkosto de iaj fermitaj kluboj. Por ilin havigi al si, ĉiu klopodas plibonigi sian salajron, diferencigi ĝin de tiu de la aliuloj.

- Mi kredis, mi diris, ke viaj kluboj kaj similaj institucioj estas senpagaj kaj fariĝis alireblaj de ĉiuj ?

- Ni devis, respondis Chester, konsideri psikologian elementon certe atentindan kaj neneglektendan. Ĝenis niajn klopodojn malbonvolo fare de familiaj klanoj de la alta burĝaro, kiu volis kunveni en fermitaj rondoj. Kvindek ĝis ducent mil privilegiuloj deziris plu vivi aparte de l' "vulgum pecus". Tiel ni lasis al ili la eblecon starigi siajn klubojn, kie oni postulas altan kotizon tro multekostan por la popolanoj. La modo forpasas iom post iom, kaj multaj homoj mokŝercas tiujn personojn, kiuj sin distras multekoste, ĉar ankaŭ la komunumoj konstruigis kaj prizorgas same komfortajn klubojn, kie ĉiu povas trovi aron da distraĵoj kaj elegantaj okupoj, kiaj skermo, rajdarto, golfludo, akvovetura skiado kaj aliaj sportoj laŭdire "noblaj", iam rezervitaj al riĉa elito, sed hodiaŭ eblaj por ĉiuj.

Mi aldonos kelkajn vortojn pri la formado de niaj sociaj kadroj. Ni kreis tiucele ĉe la regiona ŝtupo prospektivajn centrojn.

Tiuj centroj rememorigas, laŭ multaj aspektoj, viajn iamajn "Royaumont". Ili organizas staĝojn de tri semajnoj ĝis tri monatoj. Ni tie klerigas prelegantojn, administrantojn, kandidatojn al aŭtoritataj postenoj. Tie oni ricevas la sperton de multaĝuloj plenumintaj dum sia kariero gravajn funkciojn. La membroj de la eminent-

ulaj komitatoj venas tien por lerni la esencon de tio, kion ili devos scii. La entreprenestroj kaj la sindikataj kadroj tie havas priinformajn periodojn. Aliaj vizitas tie kursojn por kulturi sian personecon. Tiuj centroj servas ankaŭ kiel provoj por soci-ekonomiaj eksperimentoj. Oni tie aŭskultas la homajn reagojn al la novaj projektitaj rimedoj. Oni tie eksperimentas instrumetodojn.

Diskutkunvenoj, interargumentadoj, seminarioj ofte okazas tie kun partopreno de larĝa publiko.

En tiuj edukejoj troviĝas instalaĵoj plej modernaj kaj plej kompletaj : biblioteko, diskoteko, aŭdovidejo, legejo, sportejo, ludejo kaj kunvenejo, ripozejoj, kovrita naĝejo, koncertejoj kaj spektaklejoj, haveno por helikopteroj, infanejoj kaj komfortega hotelo.

La kuracisto sin turnis al Chester :

- Ni haltu tie, ĉi-matene, li diris. Mia filino intencis akompani posttagmeze nian amikon Edders, por montri al li la malŝarĝadon de fiŝŝipoj. Sed, ĉar vi estas libera, eble vi deziras iri kun ili. Viajn teknikajn klarigojn certe ŝatos nia amiko.

Kaj li konsilis al ni, ke ni atendante refreŝigu niajn fortojn.

## ĈAPITRO XVI

La fiŝado.
La kosmoesplorado,
ĝia antaŭeca grado.

Mi ne rekonis la silueton de la malnovaj trolŝipoj. La ŝipoj vicigitaj laŭlonge de la kajo ŝajnis sen mastaro sed kun radararoj. Ilia ferdeko estis traembarasita de laŭ mi stranga materialo. Chester helpis min :
- Niaj ŝipoj fiŝas per ultrasonoj. Dank'al tiuj radaroj la fiŝbenkoj estas rapide troveblaj : la trolŝipoj tiel ne perdas tempon por traserĉi ĉaslokojn, helikopteroj ĝenerale malfermas al ili la vojon. Tiel ni malpliigis konsiderinde la nombron da rotacioj de la ŝipoj kaj evidente la nombron da ŝipanaroj. En la havenoj, kie la ŝipanoj restas relative multnombraj, ĉiu ŝipanaro foriras meznombre nur unu-dufoje semajne, certigante servon alterne.
La fiŝoj rekte pasas de la ŝipkeloj sur rultapiŝoj al klimatizitaj transportoj, kiuj tuj direktiĝas al tutproksima aerhaveno, kie atendas la marfiŝojn ŝarĝaviadiloj pretaj flugi en la land-internon. Fridveturiloj tuj fiŝprovizumas la kelkajn 30 000 komunumojn, kie iam oni vere neniam vidis la marfiŝojn.
- Mi memoras, mi diris post kiam Chester donis tiujn kelkaj klarigojn, pri la multaj incidentoj senĉese okazantaj dum ĉiu alveno de fremdaj fiŝŝipoj en niajn havenojn. La fiŝoj eltiritaj el la ŝipkeloj estis disĵetitaj sur la stratojn. Kaj la fiŝistoj, por sin pravigi, deklaris la konservejojn plenplenaj de varoj kaj la konsumadon nekapabla aĉeti la tuton de la ĵus alportitaj fiŝoj.
- Jes, diris Chester, kiu ŝajne bone amuziĝis, viaj planistoj sendube faris sian eblon, sed ili estis senpovaj fronte al la malordo propra al ekonomio de libera merkato. Ili konis nenian leĝan rimedon por devigi la konserventreprenojn pligrandigi siajn instalaĵojn trans la limoj nur necesaj al solvendaj vendeblecoj. Por la fiŝistoj ne ekzistis alia solvo, en la iama ekonomia sistemo, ol plirarigi la varojn cele al firmigo de la

prezoj, tial ke tiuj ĉi rekte dependis de la enspezoj de la produktistoj kaj salajruloj. Ĉiu indulge bedaŭregis tiun maltusanismon, bone sciante, ke nenio estos farita por ĝin eviti.
Hodiaŭ ni ne plu havas tro da produktado. Ĉiuj ĉi fiŝoj, elŝipigitaj en tiu momento, estos konsumitaj plej malfrue post kvardek ok horoj, aŭ eĉ ĉi-vespere, en miloj da etaj vilaĝoj kaj en la kamparoj. Vi iam asertis, ke estis tro kare kaj tute ne profitdone transporti, per la hodiaŭ uzataj rimedoj, varon preskaŭ senvaloran.
Kiam vi parolis pri kosto, temis pri ofico, materialoj, energio. Nu, vi ne tamen hezitis malŝpari centojn da miloj da oficoj kaj plej multekostajn materialojn por ekspedi aparatojn en la kosmon aŭ por eksplodigi viajn termonukleajn bombojn. Tiaj operacioj ebligis al la entreprenoj, kiuj kontraktis ŝtatajn merkatojn, realigi tre gravajn profitojn. Cetere oni ĉiam trovis multajn politikistojn por garantii la enskribon de tiuj enspezoj.
Ni decidis nur, ke la kosmo povas ankoraŭ atendi plurajn jarojn, kaj eĉ kelkajn jarcentojn, la viziton de manpleno da niaj civitanoj. Referendumo rapide sciigis niajn komitatojn pri la intereso de la konsumantaro por tiuj amuziĝoj de kleruloj. Alia referendumo sciigis same, ke paŭzon de la armilfabrikado deziras la plimulto de la civitanoj. Ili opiniis, ke estis pli bone dediĉi niajn kvalifikajn oficojn kaj multekostajn materialojn al socialaj utilaj taskoj, ol malŝpari la fruktojn de milionoj da laborhoroj por stultaj aferoj pri prestiĝo, dum tiom da niaj vilaĝoj bezonas provizumadon per freŝaj fiŝoj aŭ, pli simple, per akvo.
- Do, mi diris, vi forlasis la kosmo-esploradon ?
- Jes, diris Chester, ĉar, tuj kiam ni nombris niajn oficojn, ni miris pro la graveco, kiun vi atribuis al la fabrikado de viaj aparatoj, kvankam restis multo farenda por igi nur akceptebla la ekzistadon de viaj tiamaj loĝantaroj. Tiuepoke, iu prezidento de respubliko en Nigra Afriko jam konkludis : "Pli bone nutri ol brili !" Tiu ĉi febra etoso, instigita de entreprenoj, kiuj atendis el tio bonajn profitdonajn merkatojn, celis ankaŭ, ke la civitanoj malatentu siajn proprajn problemojn.
Mi ekbalancis la kapon.

- Ni opiniis, ke la kosmo-esplorado povus kontribui al la malkovro de novaj metalfandaĵoj, uzotaj poste por pli utilaj aferoj.
- Tio, kion vi asertas, estas ekzakta, sed via rezonado pruvas deformon de la penso, cetere komunan al granda nombro de viaj samtempanoj.
Vi same asertis, ke la militoj kontribuas al la homa progreso. Sed tiam nemultaj spirituloj sin demandis, kio instigis la entreprenojn partoprenigi siajn laboratoriojn kaj sian personaron en gigantaj konsumadoj de grandvaloraj materialoj. Tamen la respondo estis simpla : la celo de via kapitalismo identiĝis kun la atingo de la plej ega profito kaj viaj monlordoj ne tiom zorgis kontribui al la progresoj de sciencoj, ol realigi maksimumon da profito kiel liverantoj de la ŝtato, kies kaso restis daŭre provizumata.
Kaj la eltrovoj estis nur hazardo dum la procezo de la kapitalista akumulado, ĉar tute ne gravis, ke ili estos poste uzataj aŭ ne je la profito de la privatuloj. La kapitalismo estas fremda al ĉiu homa konsidero. Ĝia rolo estas nur produkti kaj vendi, eĉ se ĝi devus por tio malŝpari egajn riĉaĵojn.
Cetere, de kiam la mono ne plu estis la celo de niaj aktivadoj, ni povis atribui al la esplorado homajn celojn, kun misio atingi ilin kiel eble plej rapide. Ĉu temis pri la plibonigo de metalfandaĵo por ilo? Ni ne emis por tio malŝpari tempon kaj materialojn al konstruado de pafejoj por raketoj nek uzi malrektan rimedon per rondvojo ĉirkaŭ Venuso.
Niaj esploristoj estas reĝe pagataj, ili laboras kun la sama konscienco kaj la sama fervoro kiel siaj antaŭuloj ; tamen, diferenco : ili ne plu ekpensas estigi epidemion cele al provizumado de apotekoj per novaj kaj multekostaj specialaĵoj...
La esplorado ne plu orientiĝas al profito, sed respondas la celojn de niaj institucioj : maksimume ŝpari niajn naturajn riĉaĵojn, mildigi la penon de la homoj, la neutilajn laciĝojn, krei libertempon kaj efektivigi ĝin je plejeble eta homa kosto.

## ĈAPITRO XVII
La internaciaj interŝanĝoj

Katarina reatingis nin dum ni reiris, ĉiam konversaciante, al la centro de la urbo :
- Ĉu vi ne timis pri la sinteno, la morgaŭon de via tago T, de la alilandaj ŝtatoj, kiuj, mi tion supozas, haltigis siajn interŝanĝojn kaj faris aranĝojn por protekti la interesojn de siaj ŝtatanoj kaj de ties investitaj kapitaloj ?
Jam de longe Katarina atendis mian demandon :
- Tre certe, ŝi diris, ni tre timis esti sufokitaj samtempe pro manko de importado kaj malfido de kelkaj fremdaj landoj.
Ni tamen sciis, ke intereso gvidas la agojn de ĉiuj registaroj same kiel de privatuloj. Tial ni konservis la esperon, ke ĉio rapide aranĝiĝos, ĉar ni intencis malprofitigi neniun kaj ankoraŭ malpli niajn alilandajn gastojn.
Estis por ni "kvietigilo" la ekzemplo de Sovetunio, kies interŝanĝoj, ĉesintaj dum momento kun la okcidentaj landoj, baldaŭ rekomenciĝis profite al la kapitalistaj entreprenoj.
La eksterlandaj interŝanĝoj do plu daŭris, sed kiel kutime oni interŝanĝis varojn, kies listo estis ege mallongigita. Tiom da ĉiuspecaj produktoj estis interŝanĝitaj en via epoko nur cele al profito por viaj komercistoj kaj bankistoj !
- Efektive, mi konsentis, ni importis, dum iuj jaroj, miliardon da ovoj el Danio, dum niaj kamparanoj ne povis vendi siajn proprajn produktaĵojn. Etaj prezdiferencoj tiel estigis egajn translokigojn de varoj de lando al lando, havigante profiton al la importistoj. Nur la mono ordonis la naturon kaj gravecon de la interŝanĝoj kaj neniu sin demandis pri ilia reala utileco. Kutimo estis konsideri tiujn operaciojn nur laŭ strikta kalkulado kaj pri ebla privatula profito.
Ni interŝanĝis vinojn, samkvalitajn silkaĵojn, veturilojn,

fruktojn. Oni reduktis, intence, iujn produktadojn cele al importado de pliaj kvantoj, aŭ al malfermo de akreditivaj kontoj aŭ ankaŭ al fruktodonaj makleraj komercoj.
- Jes, diris Katarina, mi sciis pri ĉi tio. Nun ni limigas niajn interŝanĝojn je la plej necesaj ; ni estas mendantoj nur por la al ni ankoraŭ mankantaj krudmaterialoj: kupro, raraj metaloj, kruda kotono. Pri petrolo ni valorigis gravajn fontojn sur nia teritorio, sed ni estas plu klientoj de aliaj landoj. Kompreneble, niaj landlimoj restas malfermitaj al ĉiuj troaĵoj, kiujn la aliaj landoj deziras forigi el sia interna merkato, ĉar la nia estas ampleksigebla ĝis la limo de niaj realaj bezonoj. Niaj maraj fiŝbasenoj, niaj industriaj bredejoj de kortbirdoj kaj de porkoj solaj konsumas kelkajn milionojn da tunoj da bazaj manĝaĵoj, kiujn, iam, vi celis detrui spite al ĉio, timante produkti trans la bezonoj de viaj mallarĝaj merkatoj.
Per sukero, tritiko, lakto, butero, nia kukindustrio disservas al lernejoj, kantinoj, pensionoj, feriaj kolonioj, emeritejoj, kaj multe da aŭtomataj disdoniloj, kie kontraŭ eta prezo la mastrinoj sin provizas. Niaj maljunuloj, speciale, multe konsumas ilin. Estis plezuro, kiun malmulto el ili povis iam pagi al si. Dank'al nia mono ni forigis la "rentabilitaton" kaj povis celi al ĉiuspecaj produktaĵoj laŭdire troaj.
Ni eksportas vinojn, modaĵojn. Ankaŭ niaj artistoj estas tre ŝatataj. Same niaj bonkvalitaj fabrikaĵoj: skioj, glitflugiloj, transistoroj, turismaj aviadiloj, elektra kaj elektronika materialo. Ni eksportas ankaŭ pipojn, parfumojn, viskon, memoraĵojn kaj multajn produktaĵojn de nia metianaro. Fine ni provizas la landojn de Centra Eŭropo per freŝaj fiŝoj.
- Sed ĉu vi ne importas ankaŭ alilandajn veturilojn? mi diris, dum ni preterpasis vastan halon sub kiu estis eksponitaj italaj, germanaj, britaj kaj eĉ usonaj modeloj. Mi ŝatus scii, kiel via fantoma mono ebligas pagi tiajn importaĵojn ?
- Ĉu vi ne opinias, respondis Katarina ridetante, ke eble plej bone estus demandi pri tio la direktoron mem de tiu halo ? Mi estas certa, ke li informos vin ankoraŭ pli bone ol mi.

Antaŭita de Katarina, mi eniris en komfortan oficejon, veran vitran palacon kun planko kovrita per dika tapiŝo. La direktoro tre afable akceptis nin :

- Jes, li diris al mi, kiam mi starigis la demandon al li, mi vendas ĉiujn ĉi veturilojn tre ŝatatajn de iu klientaro. Sed la prezoj sin tenis stabilaj de pluraj jaroj, escepte de la unua semestro de la pasinta jaro. Tiam, grava alvenaĵo instigis nin apliki 25 % da rabato, sed ni devis ĉi-jare plialtigi niajn prezojn ĝis 5 % sub tiuj de la antaŭaj jaroj. Je sia nuna prezo, niaj veturiloj ne restas pli ol tri semajnojn en niaj haloj; kio respondas proksimume al la kadenco de nia provizumado. La klientaro tiel estas kontenta.
La mendoj, sendube vi tion scias, estas centralizitaj ĉe la oficejo de la eksteraj interŝanĝoj, kiel cetere por la aliaj importaĵoj. Sed ni rilatas nur kun la regiona fako de tiu oficejo, kiu rekte ekzamenas la petojn laŭ sia kompetento, kaj la administraciaj formalaĵoj estas tre simplaj. Mi kredas scii, ke la finaranĝo efektiviĝas per interŝangoj kaj ke la varoj kompense senditaj estas taksitaj je la prezo, kiun ili havas en la adresita lando. Konsekvence, la ricevanto fiksas sian prezon, kontrolitan de niaj komercaj sekretarioj. Tiel la eksterlandaj interŝanĝoj estigas neniun apartan problemon, krom kiam oni petas, kiel kontraŭaĵon de niaj importaĵoj, varojn riskantajn plialtigi daŭre niajn internajn prezojn. Se foje tio okazas, la diskutoj estas direktitaj al la regiona ŝtupo kun arbitracio de kunordiga instanco.
La ofico de la eksteraj interŝanĝoj tiel bilancas la konton kun la aliaj landoj laŭ la mona sistemo de tiuj landoj. Efektive nia mono ne havas fiksan kurzon; la varoj interŝanĝitaj estas enkurzigitaj, tiel ĉe importado kiel ĉe eksportado, laŭ fremda valuto.

Ni adiaŭis la afablan direktoron, dankante lin pro lia bonvola interparolado.
- Mi supozas, mi diris farinte kelkajn paŝojn, ke vi solvis ankaŭ la problemon pri alilandaj investoj ?
- Efektive, respondis Katarina, estis tre grava zorgoplena punkto. Ni devis konsideri, en niaj novaj institucioj la sorton de blokitaj kreditoj, valorpaperoj de fremdaj partoprenoj.
Pri niaj samlandanoj la solvo estis simpla : la kapitalo malaperis, sed la rento pludaŭris samvalora. La posedantoj de kapitalo ne petis pli, ilia unua zorgo estis ĉiam savi kiel eble plej frue sian monon ofte riske

ŝparlokita.
Pri la fremdaj investistoj la problemo alie aspektis. Ilia mono ĝenerale estis investita sub formo de ekipaĵoj, bienoj, kiujn oni ne povis disigi dum la rezigno de la kontrakto. Dialogon iniciatis la koncernaj societoj kaj kolektivoj.
Oni ne povas nei la fakton, ke tiuj investistoj foje servis la celon de progreso en nia lando, skuante nian rutinon, kreskigante la komunan heredaĵon, valorigante grundojn aŭ profitigante nin de la fruktoj de multaj eltrovoj. Konsekvence, ni ŝuldis al ili parton de la nacia enspezo, kiun ili kontribuis krei.
La rezignoj de kontraktoj, kiuj neniam prenis timigan ritmon, trovis en iaj kazoj kontraŭaĵon en paralela rezigno de niaj propraj investoj alilande. Estis juraj interŝanĝoj. Ekzemple, oni interŝanĝis la instalojn de "Libby's C°" kontraŭ akcioj de "Port de Rosario", tiujn de "I.B.M.France" kontraŭ "Rio Tinto". Ĉiu rehejmeniris. Plej ofte la investistoj kontentiĝis rehavigi al si nur siajn rentojn sub formo de produktaĵoj. Kelkaj definitive instalis sin en nia lando, por surloke elspezi tion, kion ili deziris konsumi.
Tamen io estis certa : malmulte da landoj, memorante la epokon de la "germanaj kompensoj" dum la intermilita periodo, deziris kompensan repagon per produktaĵoj. Ĉu ili ne jam sufiĉe penis malembarasi sin de siaj plusoj ?
Aliparte, kial ni estus malhelpintaj la eksportemon komunan al tiom da nacioj iam superŝutitaj per troaĵoj ? Ĉar ni povis plilarĝigi nian internan merkaton ĝis la ekstrema limo de la realaj bezonoj, ĉu ne eblis al ni grandege malfermi niajn landlimojn al importadoj ? Tiel ni fariĝis benita tero por la ricevo de ĉiuj plusoj utilaj al niaj loĝantaroj. Kaj tio estas unu el la plej strangaj aspektoj de nia ekonomia revolucio, tiu, kiu mirigis ĉiujn observantojn. Lando de abundo, ni ludas, tute nature, la rolon, kiun iam tiom da registaroj zorgis trudi al la "evolulandoj".
Hodiaŭ, dank'al instituciigo de la interhelpo, la veraj "Unuigitaj Nacioj" estas survoje. Pli bone ol ĉiuj solenaj paroladoj, la plena sukceso de nia eksperimento kontribuis trabati la vojon al ili.

## ĈAPITRO XVIII

La gazetara libero.
Inventaro de la kolektivaj bezonoj.
La studenta lerndaŭro.
Soldatservo kaj civilservo. La defendo.
Libertempoj. Abundo kaj morala malzorgo.
Materialismo kaj religio.
Sociala progreso kaj morala progreso.
La artistaro.

Tralegante la matenan gazetaron, mi vidis serion de artikoloj, kiuj klarigis vidpunktojn kun por mi nekutimaj vigleco kaj sincereco.

- Ne surpriziĝu, diris Katarina, al kiu mi malkaŝis mian miron, pro tiom da esprimlibero. Inter la "gajnantoj" de la nova reĝimo, estas bone lokitaj la ĵurnalistoj kaj ĉiuj, kiuj deziras libere eldiri sian penson. Nia esprimlibero estas plena, ĉiuj iamaj "tabuoj" malaperis. En via epoko, la politiko kaj okazaĵoj estis plej ofte taksitaj laŭ la implikitaj privataj interesoj; multaj do estis la ĵurnalistoj tiel silentemaj.

Same, viaj politikaj luktoj servis kiel preteksto al intensa agado en multaj kampoj. Ni praktikas hodiaŭ la rektan demokration ; la demandoj pri mono kaj defendo de la rajtoj pravigis iam la ekziston de viaj politikaj partioj, kies ĉefa, se ne nura, okupado estis peri ĉe "moŝtoj" postulante pri subvencioj, kompensoj, preferaj taksadoj, eksproprietigoj, koncesioj, merkatoj, monatribuoj. Kaj aroj da komizoj, inĝenieroj, tajpistinoj, kontistoj kaj kasistoj dediĉis sian tempon por konsulti aŭ redakti leĝojn, ordonojn, dekretojn, cirkulerojn, kondiĉajn kajerojn, postulojn, en kiuj temas ekskluzive pri mono kaj rajtoj de la proprieto. Nun, kiam ni havas nek buĝeton, nek impostojn, ni dispartigas la tempon tiel ŝparitan inter la agadoj sociale utilaj, la libertempaj industrioj kaj la libertempo mem.

*

Mi surpriziĝis, ne vidante sur la vojoj la multajn cisterno-kamionojn, kiuj iam embarasis ilin, kaj mi rimarkigis tion al Katarina.

- La plimultaj transportoj de nepakitaj fluidaĵoj fariĝas per dukto el plasto, kies lokado iĝis rapidega, ĉar la tubo estas fabrikata kaj malvolvata surloke ekde la plasta materio tenata ĉe sia punkto de modlebleco. Aroj da duktoj por petrolproduktoj, vino, lakto, provizas samtempe la centrojn kaj la ĉefajn vojojn. La lakto estas kolektata el la farmodomoj al la komunumaj laktejoj, poste direktata per aliaj duktoj al ĉiovendejoj. Aliaj duktaroj provizas la kampajn domojn per akvo kaj la plimultaj farmbienoj estas ekipitaj per ŝprucigiloj. Laŭlonge de niaj marbordoj, serio de instalaĵoj kun granda produktokvanto, funkcianta dum la sekecaj periodoj, senmineraligas la maran akvon por sendi ĝin al irigaciaj duktoj. Vi vidos ankaŭ grandegajn etendaĵojn da varmejoj el plasto, infraruĝe varmigitaj kaj kiuj ŝirmas la plantojn kontraŭ la printempaj frostoj, la hajlo kaj la fortegaj ventoj. Ni tiel ricevas mirindajn rikoltojn konstante bonkvalitajn.

La alta nivelo de produktiveco, kiun ni deziris atingi en la agrara fako, postulis la varbadon de multaj agronomoj. Por instigi tiun profesian inklinon, sufiĉis proponi faciligojn : plilongajn feriojn, donacon de veturilo por la junaj studentoj ekde ilia studfino, ankaŭ taŭgan dungopremion. Vi ne agis alie iam por dungi volontulojn por la armeo. Hodiaŭ, bezonante armeon da agronomoj, ni uzis la saman metodon.

- Ĉi tiuj realigoj, mi diris, certe mobilizis multajn manlaboristojn kaj gravajn rimedojn ?

- Bone, diris Chester, mi pensis, ke vi tuj demandos, kie ni trovis la necesajn kreditojn por bone plenumi tiujn taskojn ! Iuj komunumoj - li daŭrigis - pli rapide realigis siajn aranĝojn, nome tiuj, kiuj, ne tre industriigitaj, disponis tuj post la agrara reformo kaj la ordigo de la troaj profesioj, pri grava nombro da oficoj.

Komence duobliginte, eĉ triobliginte iajn oficojn por okupi ĉiujn personojn, la komitatoj de eminentuloj inventaris la bezonojn de sia komunumo kaj la sugestoj ekalvenis : "La nacia vojo n-ro 10 estas tre danĝera, kaj ĝi devus pasi ekster la vilaĝo. La stacidomo estas malbone lokita en kurbo de la vojo, necesus transloki ĝin. Veturas multaj trajnoj ĉiutage kaj la fervoja transpasejo estas plej danĝera : necesas havi ponteton.

Ni ne havas urban bibliotekon. Mankas al ni banoj, duŝoj, loĝejoj. Niaj elementaj klasoj estas plenplenaj, ne ekzistas loĝejoj por la instruistaro. Ni havas neniun veturrimedon por rehejmeniri vespere el la najbara urbo, kiam ni ĉeestas spektaklojn aŭ konferencojn. Ni neniam ricevas mediteraneajn fiŝojn, ni aĉetus 800 kilogramojn da ili ĉiusemajne. 200 personoj petas dumonatajn krozadojn dum majo-junio al Sud-Ameriko kaj al Svedio. Ni ne havas vartejojn. La sindikato de konsumantoj deziras akiri etan hidroplanon de 250 vaporĉevaloj por dimanĉaj promenadoj al multaj lagoj kaj lagetoj de la regiono. Mankas al ni tenisejoj. Ni deziras malgrandan aerodromon. La junuloj ŝatus sperti velflugadon kaj helikopteron..."
La laboro do ne mankis, kaj akcelita profesia formado ebligis plejofte varbi surloke la personaron necesan al la plenumado de la programoj.
Dekkvin tagoj sufiĉas nun, dank'al la modernaj metodoj de metilernado, por formi aparat-kondukiston, kaj unu jaro por fari dudekjarulon kvalifikita laboristo. Dank'al la aŭdovidaj metodoj, kiuj anstataŭis en multaj fakoj la iaman majstran instruadon, menciinde pri lingvoj, historio, ekonomia geografio, sciencoj, nia supera instruado akceptas ĉiujare grandan nombron da ĉiuaĝaj lernontoj. La tuta homcerbaro estas kulturata tiel ĝis satureco, kaj ni ŝuldas al tiu valorigado de la homo la abundon, kiun ni profitas. La riĉofontoj de la naturo kaj de la grundo estas neelĉerpeblaj, kaj la kvalifikita laboro, la cerbo de niaj serĉistoj unuiĝas por disponigi al ni tiujn riĉaĵojn sub konsumebla formo. Nia mono utilas nur por dispartigi la fruktojn de la produktado.
Se taŭgaj, niaj gejunuloj daŭrigas siajn lernadojn kaj kulturon ĝis la dudek-kvara jaro, privilegio iam rezervita al riĉaj studentoj.
La lerntempo konsistas al staĝoj en laborejoj, konstruejoj, administrejoj. Fine de la studado, niaj studentoj estas preskaŭ tuj utiligeblaj, kun matureco ne posedata de viaj iamaj universitatanoj, kaj kun ĉiufakaj scioj, kiuj igas ilin kapablaj informiĝi pri sia profesio kaj elekti ĝin laŭ vasta skalo de aktivaĵoj.
Paralele ni atentas, ke la proks. 100 miliardoj de mekanikaj kaj energidonaj sklavoj dresitaj por helpi nin, estu plej bone uzataj, precipe por ŝpari penigan

laboron kaj fabriki libertempon al la homo.
- Vi parolis pri junaj studentoj, sed, rimarkigis mi, ĉu vi forigis la militservon ?
- Verdire, respondis Chester, ni aliigis ĝin en civilan servon, devige plenumatan de la junuloj fine de iliaj studoj. Ni ja komprenis, ke necesas miksado de la sociaj tavoloj je tiu aĝo, cele al plej bona interkomprenado, kaj ke naskiĝas daŭraj amikaj sentoj dum tiu periodo. Nu, la komunuman spiriton, kiu por ni plej gravas, ni ĉiuokaze disvolvas.
- Sed per kio do vi okupas ĉiujn viajn "enbrigadigitojn"?
- Por multaj el tiuj "enbrigadigitoj", kiel vi nomas ilin, tiu periodo de ilia vivo estas ofte la plej interesa, la plej fekunda, precipe por tiuj, kiuj poste devos plenumi tedan laboron.
Unue la plimulto el ili lernas duan metion, per kiu ili povos, eventuale, pasigi siajn libertempajn aktivadojn. Grava kontingento da ili sin dediĉas al la loĝeja servo, organizita same kiel la iamaj kampadaj konstruistaroj kaj ili ĝuas, en la regionoj, kie ili laboras, la plej bonan akcepton. Efektive, oni ne forgesas, ke ĉiu emerito rajtas laŭ sia deziro trovi loĝejon en de li elektita loko kaj tiel niaj kamparoj iom post iom hompleniĝis. La ruĝkrucanaj kursoj estas devigaj. Niaj "junulbrigadoj" servas kiel krompersonaro por helpi dum portempaj mankoj. Ili certigas la purigajn servojn dum esceptaj kazoj, helpon dum rikoltadoj, la kadradon de la feriaj kolonioj, la transportadon de la produktivaj ŝlimoj el la akvo-retenujoj de la grandaj baraĵoj. Ili partoprenas la operaciojn de rearbarigado, senŝtonigado, plugebligado, senratigado, prizorgado de kamparaj alirvojoj. Oni utiligas ilin por la arkeologiaj rubforigoj, la funkciado de multnombraj kvartalaj memservejoj. Ili prezentas vojaĝantajn orkestrojn, teatrajn trupojn, helpojn al la instruistaro.
Paralele, la neprogresintoj ricevas aldonon de ĝenerala kulturo, aŭdovidan instruadon. Dank'al aŭdovido, niaj junaj "mobilizitoj" same perfektiĝas en la praktiko de pluraj fremdaj lingvoj. La seminarioj kaj diskutkunvenoj estas ĉiusemajnaj kaj malkovras rimarkindulojn, kiuj ĝis tiam subtaksis sin. La tempo-tabelo enhavas la helpon al paroladoj far emeritoj, maljunaj kadroj, paroladoj, kiuj dum aliaj cirkonstancoj, ne multe allogus la junulojn. Vizitoj kaj staĝoj en uzinoj kaj sur konstru-

ejoj estas organizitaj kaj foje decidigas pri la elektota kariero.
La praktikado de ĉiuj sportoj okupas ja larĝan lokon en la formado dum la civila servo : aerŝvebilo, velŝipo kaj akvoskio estas speciala ŝatataj. Fine la civitana kaj morala edukado, la ekonomia instrukciado estas kompreneble en la programoj, dum edukaj dokumentaj filmoj malfermas al ĉiu vastan kampon de pripensado. Vi do konstatos, ke niaj junuloj ne perdas multe da tempo, plenumante sian civilan servon, kies daŭro ne superas dekdu monatojn.
Pri nia Nacia Defendo, ĉar ni ne plu havas debatendan ekonomian problemon kun la aliaj nacioj, konkerendan vendeblecon, ŝirmendajn privatajn interesojn ekster niaj landlimoj, ni estis devigataj progresive forigi nian armilaron. La afero estis des pli facila, ke, dank'al la strukturoj, kies grandajn trajtojn vi nun konas, la aliigo de la entreprenoj, kiuj antaŭe provizis la militmaterialojn, starigis de tiam neniun problemon. Dum iu tempo, nia Nacia Defendo organiziĝis en kvazaŭa "Underground", preta uzi, se necese, la rimedojn iam praktikitajn de viaj rezistadaj movadoj.
Komence ni proklamis nian neŭtralismon kaj nia "nacia milicio" neniam intervenis kaj ŝajnas ja , ke ĉia militrisko estas definitive for, pro la nura efiko de la ŝanĝoj, kiujn ni faris al via mona sistemo.
- Tamen, mi rimarkigis, donante eblecon akiri precipajn kaj foje superfluajn vivrimedojn al tiuj, kiuj ĝis tiam povis apenaŭ vivteni sin, rezigneme kaj okaze sen bezonoj, ĉu vi ne altigis ĉe kelkaj la gradon de malkontenteco ?
- Mi komprenas vian vidpunkton, respondis doktoro Harvey, ĉar ĝi estis la nia ĝis ni estis certaj pri pli bona kontenteco, ne nur en la kampo de ĉefaj bezonoj, sed preskaŭ ĉiam ankaŭ en tiu de neĉefaj bezonoj. Ĉiu scias, ke dependas nur de li mem atingi socialan, superan vivnivelon.
Sendube la bezonoj elvolviĝis pli-malpli rapide ĉe la plimultaj individuoj, kaj ĉe iuj pli rapide ol la ebleco kontentigi ilin. Sed ĉu tio ne estis iam la ĝenerala regulo, kiu kaŭzis tiom da frustracio en la sektoro de precipaj bezonoj, kie la mankoj ŝajnis malplej elteneblaj ?
-Hodiaŭ, kvankam oni ne plu scias tre bone difini

la limon de la primaraj bezonoj, tial ke la libertempo ŝajne fariĝis unu el ili kaj ne la plej malgranda, oni povas aserti, ke la gradoj de kontenteco estas pli altaj por la granda plimulto de la konsumantoj kaj uzantoj, nun malpli stulte senhavaj ol iam, kaj ĝuantaj realan liberon en multaj kampoj.

- Viaj homoj, mi diris, devas terure enui. Ĉu ili ne opinias la ekzistadon monotona, ĉar senklopoda?

- Vi levas tie demandojn de alia jarcento ! ekkriis mia gastiganto. Kie vi vidas, ĉirkaŭ vi, enuantajn homojn ? Kiel enui antaŭ mil rimedoj por ĝui klerigajn, riĉenhavajn libertempojn ? Pri la korpaj penoj, ni havas ilin tiom, kiom havis la laboristoj de via epoko. La diferenco kuŝas en tio, ke hodiaŭ niaj streboj estas libere konsentitaj, ĉar oni praktikas ilin precipe dum la libertempaj aktivadoj.

Libertempo tute ne signifas senokupecon. Se vi tion deziras, ni povas enketi inter la loĝantoj de tiu ĉi urbo por scii, kion ili faras dum siaj ferioj. Vi certe miros pro la diverseco de iliaj aktivadoj, pro ilia elturniĝemo aranĝi siajn liberajn tempojn. Socialigante la libertempon, ni forigis la plej gravan obstaklon, kiu malhelpis la plimulton el viaj samcivitanoj ĝui ĝin. Nun, pli ol duono de la plenkreskuloj ĝuas la oran vivon de emerito laŭ stilo "Jaro 2000". Multaj posedas terenon, sur kiu ili konstruigas laŭplaĉe la de ĉiam revitan domon, kun la flordomo, la rozujoj, la bredejeto, kabaneto por la ilaro, laborejo por laŭokaze laboreti, fotografia laboratorio. Aliaj instalas teleskopojn sur sia teraso kaj pasigas siajn belajn vesperojn, esplorante la astrojn. Bibliotekoj kaj diskotekoj, kinkluboj estas malfermitaj al ĉiuj. Inter najbaroj organiziĝas koncertoj de ĉambromuziko, turniroj de ŝakoj kaj briĝo, kaj kiam la vetero estas bela, la gejunuloj kaj la malpli junaj ĝuas la plezuron uzi ŝvebilon, akvoskion sur la lagoj kaj baraĵakvo. Ankaŭ kelkaj pasiiĝas por la amatora teatro. Simplaj ekskontistoj fariĝis famaj arkeologoj aŭ talentoplenaj kinistoj. Ankaŭ la fiŝbredado, la geologio, la skulptarto, la zoologio, la matematiko havas multajn adeptojn. La nombro de radioamatoroj preskaŭ dekobliĝis de dudek jaroj. Multaj emeritoj, kies aktivadoj estas liberaj, montras sian personecon. Ili prenas lecionojn pri pentrarto, kantarto, piano kaj aliaj muzikinstrumen-

toj. Cirkoj kaj aliaj spektakloj sinsekvas ĉiusemajne en la plimultaj urboj kaj vilaĝoj. Multnombraj inventistoj esploras en plej diversaj studkampoj. Ankaŭ botaniko, dekoracio, etmodelismo, poezio, speleologio, havas siajn fervorulojn, dum aliaj preferas sin dediĉi al iaj manioj kaj strangaĵoj : akvarioŝato, kolektoj, bredado de bestetoj, astrologio, lertludoj, prestidigitado, radiestezo, spiritismo, magio.
Sed ja la vojaĝojn preferegas la bonfartaj personoj. Krozadoj estas organizataj dum la bela sezono kaj ek al malkovro de l' mondo ! La gastado estas surŝipe certigata kaj kostas al la kolektivo nur la konsumado de karburaĵo. Ni preferas uzi ĝin tiumaniere, ol por raketoj, flugado de bombardaviadiloj aŭ militmanovroj. La malplej agemaj ĉeestas koncertojn, vizitas muzeojn, foriras kolekti florojn, fungojn, sovaĝajn berojn, aŭ konstruas etmodelojn, miniaturajn trajnojn. Fine, televido proponas al ĉiuj hejmoj plej variajn programojn.

Aŭskultante tiujn dirojn, mi ne povis reteni min rememori la iamajn senĉesajn avertojn de moralistoj asertantaj, ke materiala civilizacio fordonita al facileco devus konduki al neŭrozoj, memmortigoj, inerteco. Mi rimarkigis tion al mia kundialoganto :
- Kiel vi klarigas la mankon de ĉi tiuj bedaŭrindaj konsekvencoj antaŭdiritaj de niaj sociologoj kun tiom da certeco ?
- Nu, li respondis, ne multaj strebas klarigi tiun fenomenon, kiu, mi volonte konsentas, ŝajnus erariga por la moralistoj de la malnova epoko. Ĝin ni nur konstatas. Cetere, temis pri simpla hipotezo.
Tamen niaj sociologoj atente pripensis tiun defion al iama abunda literaturo. Tiu ĉi ŝajne estis demonstrinta plej nediskuteble, ke ju pli granda estus la vivfacileco, des pli certe ĝi estigus malnobligon de la individuo, ĝian falon en mallaboremon kaj malvirton. Kaj ĝi montris ekzemple la putrintan Usonon kun ties huliganoj, malalta kulturnivelo, malbonaj moroj.
Tiu dekadenco havis tamen aliajn kaŭzojn ol la relative komforta vivado de la usona popolo ; ĉar ekzemple tiam en Svisio, alia riĉa lando, la honesto estis legenda. Do necesis serĉi aliloke la originon de tiu morala malzorgo konstatita en la landoj, kie regas abundo. Ni scias hodiaŭ, ke putrigis la loĝantaron de Usono

ne abundo, sed la eduka sistemo kaj la kulto al mono. Usono vivis nur por mono dum plenan liberon ĝuis la infanoj, kiuj faris ĝis la adoltiĝo, ĉion, kio plaĉis al ili.

Endas ankoraŭ aldoni, ke tiuj, kies profesio celis malvirtigi la morojn kaj la junularon per publikigaĵoj kaj spektakloj malĉastaj, vidis sian komercon prosperi kaj ili gajnis multe da mono. La kuniĝo de tiaj komercaĵoj kaj de tiu tro granda libero lasita al la junularo nepre rezultigis certan dekadencon de la moroj. Pro tio, ke ni forigis ĉian intereson al la komerca organizo de tiu dekadenco, ege malmultiĝis la profesiuloj, kiuj profitis de tio.

Paralele, la instruado estis profunde modifita en sia enhavo kaj en siaj metodoj. Vi konstatos kiom, en niaj lernejoj, estas grava la instruado de la civitana virto. Ekde sia juneco la infano lernas situiĝi en la socio kaj liaj edukistoj enradikigas en lin la principon de la plena solidareco, kiu devas konsistigi poste la ĉarton de la tuta vivo.

Ni instruadas nin, ni kulturas nin senĉese, ne nur cele al kiel eble plej bona plenumado de nia socia rolo, sed ankaŭ kaj precipe je nia propra profito por riĉigi nian cerbon, por inteligente uzi niajn libertempojn.

Elektinte aliajn celojn ol senfinan vastigon de la produktado, nia socio ne estas logita de materialismo. Tion vi konstatis : ni celas pli volonte kvietigi la bezonojn ol intensigi ilin, kiel tion necesigis via komerca civilizacio.

Ni ja iomete antaŭvidis, ke la Homo, ĝuanta pli larĝajn kaj pli inteligentajn libertempojn, fariĝos pli komprenema al la spiritaj observadoj ; sed ni estis surprizitaj per la pleneco de tiu spiriteca renoviĝo faciligata per la ĉirkaŭa etoso, el kiu, nun estas for la malamaj sentoj, la hontindaj interezaj temoj, la koruptado de ĉio per mono.

La respekto al la kredoj, la libero de la kultoj, absoluta toleremo, ĉio ĉi reprezentas unu el la karakterizaĵoj de nia komunuma socio. Ni scias, ke por multaj el ni la feliĉo ne devige identiĝas kun la ĝuo de plej granda vivkomforto, aro da nure materiaj kontentiĝoj. La plena sekureco, hodiaŭ certigita por ĉiuj, ne povos, sola, kvietigi la bezonon de morala subteno

dum afliktaĵo kiel la perdo de karulo, nek mildigi la suferojn de dolora malsano, nek respondi la demandon pri la destino de l' Homo.
La Komunuma spirito aperis dank'al la nova ekonomia kadro ; ĉu ĝi ne devenas rekte de la Krista doktrino? Hodiaŭ, liberigite de ĉia komerca ekspluatado, la religio ege gajnis laŭ pureco de intencoj. La ekleziularo, ankaŭ de la aliaj kultoj, enspezas krediton samrajte kiel la loĝantaro. Ni efektive opinias utila ilian servon, kiu spirite riĉigas la vivon de tiuj, kiuj petas ilian helpon, rekuraĝigas la suferantojn, kontribuas al respektigo de morala kodo, sen kiu ne estus organizita socio. Formalaperis nur tiaj multegaj bonfaraj asocioj, kiuj en via epoko kontentiĝis, helpante etnombrajn malfeliĉulojn, kaj devis, por tion fari, senĉese petadi la publikan bonkorecon.
Nia komunuma sistemo definitive forpelis "vendistojn el la templo".
La moraligo de la aktivadoj multe kontribuis, aliparte, resanigi la junularajn mediojn. La enspezoj nun distribuataj ne plu rezultas de feliĉa sekvo de vendo, interŝanĝo, transporto. Tiel, modifante la objekton mem celitan de la entreprenoj, kiuj iam sin dediĉis al malmoralaj aktivadoj, ni radikale forigis la kaŭzon de tiu dekadenco, kiu konsumis viajn societojn dum la pasinta jarcento. En tiu epoko, kiam la mono diktatore regis ĉiujn aktivadojn, estis kutimo detrui la nutrovarojn, korupti la junularon, superŝuti la spektaklejojn per malmoralaj filmoj kaj la librejojn per filiteraturaĵoj, ĉar tiuj ĉi alportis multe pli da mono ol la aktivadoj socie utilaj kaj morale sanaj.
Se la civitanoj ne plu luktas por pluvivi, ili tamen plu luktadas por senĉese plibonigi sian vivmanieron, por havigi al si tion, kio estas nun havebla, se eĉ nur iomete ili integriĝas al la Komunumo. Iam la vivo por la plimulto estis nur trapaso, dum kiu la malriĉulo, malamema, senigita de ĉia espero, kiam la bonŝanco preterpasis lin, apudiris la aroganton kaj malhumanon de la riĉuloj. Nun, ĉiu individuo povas esperi eminentiĝi, se li kulturas sian inteligenton. Kaj, por tion fari, li nun disponas ĉiujn rimedojn.

- Tiel kuraĝigante ĉiujn talentojn, plivastigante la instruon kaj kulturon al ĉiuj sociaj tavoloj, ĉu vi

ne havas hodiaŭ tro da filozofoj, tro da pensuloj, tro da rezonemuloj, kiuj, siavice, provas enkonduki novajn solvojn, aŭ starigi malamikajn grupojn ?

- Niaj institucioj ne estas senŝanĝaj. Ili estas malfermitaj al ĉiuj sugestoj, sed neniu pensus kontraŭi la celojn de nia ekonomia revolucio. Ni ne plendas havi tro da pensuloj. Ni plivole kompatas vian epokon, dum kiu oni lasis la senklerecon kaj la intelektan dekadencon disvolviĝi tiel longtempe en la malfavorataj partoj de la socio. Pli agrable estas, certe, esti ĉirkaŭita de kulturitaj kaj instruitaj personoj ol apudiri maldelikatulojn, sengustulojn aŭ analfabetojn. Kaj ni konsideras kiel socian kaj moralan progreson, ke fakte la personoj ĉesis esti tro prenitaj de siaj ĉiutagaj materiaj zorgoj, ke ili povas nun dediĉi pli da tempo ol iam por riĉigi sian spiriton. Ĉu la vivo de la spirito ne estas la plej nobla, la plej fekunda ?

Ĉu ni havas tro da artistoj ? Kiu plendas pro tio Kompreneble, decas distingi el inter la mondo de la artistoj, tiujn, kiuj praktikas sian talenton kiel civitan kaj socian servon, favoro rezervita iam al malmulto, kaj la aliajn, kiuj dediĉas al ĝi siajn libertempojn kial simplan okupeton. Rilate la unuajn, evidente oni konservis iujn elektajn kriteriojn : konservatorioj, ekzamenoj, publika verdikto por malkovri la novajn talentojn.

Almenaŭ, ni estas certaj, ke ĉiuj valoraj kandidatoj sin prezentas kun egalaj ŝancoj. Oni ne plu fabrikas stelulojn per monmiliardaj reklamadoj nefidindaj. Ankaŭ tie, mono ĉesis ludi dekadencan rolon.

## ĈAPITRO XIX

La produktado cele al profito
La emeritoj. La zorgo de l'Homo
Revolucio sen perdantoj
La ekonomiaj fortuloj

- Via mona sistemo, pludiris Chester, riĉigis tiujn, kiuj ekspluattis la malvirton kaj la diboĉon. Neeviteble, la mono, kontentiginte la precipajn bezonojn, estis uzata por aĵoj plej strangaj, sed necesas diri, ke tiaj aĵoj estis ofertataj de komercistoj nur cele al profito. Sendube, tiu subita etigo de la labortempo inklinigis iujn personojn al enuo. Sed kial oni estus mobilizinta la tutan disponeblan laborularon la tutan tempon, dum ĉies bezonoj povas esti kontentigataj nun per malpli da homa laboro ? Ĉu oni devis ne uzi tiujn miliardojn da sklavoj kaj aŭtomatoj konstruitaj de la antaŭaj generacioj per tiom da seniĝoj kaj penoj? Profesoro Galbraith iam disvolvis tiun temon pri senutila produktado, por la profito, sen homa celo, kun ties nekredeblaj malŝparoj, kiuj restis la honto de via civilizacio.
Iom konsternitaj per tia lavango da libertempoj, niaj samcivitanoj rapide aprecis la facilaĵojn proponatajn de la nova ekonomia kadro. Krom kelkaj kazoj, malmultaj pro la foresto de la nekleruloj, oni ne plu trovas laboristojn, kiuj dezirus retrovi la laborritmojn spertitajn de iliaj gepatroj.
Tiel, ĉiu konkeris realan sendependecon, tiel dum siaj libertempoj, kies daŭro superas tiun de la labortempo, kaj ankaŭ kiel dum sia emeriteco, ekde la kvindeka-jaraĝo.

- Ĉu vi ne opinias, ke por multaj estroj, kadroj, kaj eĉ por metiistoj, la laboro konsistigas la salon de la vivo ? Kial, se ili estas ankoraŭ utilaj, trudi al ili ŝanĝon de ilia vivmaniero ?
- Sed, rapide respondis mia amiko, emeritiĝi tute

ne estas devige. Iam estis tiel, ĉar necesis lasi laborlokojn al la gejunuloj. Hodiaŭ, kiuj deziras daŭrigi sian aktivan karieron post sia kvindeka jaro, tiujn, ne dubu pri tio, oni tute zorge atentas, kaj la kolektivo dankas al ili, ĉar tio estigas iom pli da liberaj tempoj por ĉiuj aliaj.
Tamen niaj emeritoj ne estas malagemaj. Por multaj komenciĝas alia vivo, tiel fekunda, sed ofte pli pasiiga, ol la laborvivo je la servo de aliuloj. Multaj emeritoj okupiĝas pri mil aferetoj, por kiuj ili malkovras en si talentojn ĝis nun nekonatajn. Nova fakto : ili povas nun sin dediĉi laŭplaĉe al aktivado en plena materia sendependeco.
La plej sanaj ekmalkovras la mondon. Ili vojaĝas, malfermas sian spiriton, observas kaj revenas kun novaj ideoj, rememoroj, nova sperto. Tial emeritoj el la "nova fluo", kun vigla iniciativo, sagacaj konsiloj, elprovita sperto, multe partoprenas niajn eminentulajn komitatojn.
- Tiel, mi diris, vi plu pagas ilin tiom, kiom dum la epoko, kiam ili laboris ?
- Kial etigi ilian konsumrajton ekde la emeritiĝo ? Ja tiel tiun tagon kiel la sekvantajn tagojn la produktonivelo troviĝas senŝanĝa !
Viaepoke oni multe parolis pri humanismo. Vi konsentu tamen, ke estis bagatele ĉiam diskuti pri noblaj ideoj, kiam milionoj da olduloj, vidvinoj, trafitoj de katastrofoj, familioj de akcidentuloj, maljunaj kadroj, ricevis etan mizeran enspezon, dum oni malŝparis, kun la kunkulpeco de la ŝtato, oficojn, materiojn kaj materialojn por malgravaj aŭ malutilaj aferoj cele al rentabilitato de kapitalo, dum viaj kampuloj akvumis siajn rikoltaĵojn per mazuto, dum la reklamistoj trumpetade klopodis krei oficojn senhonte, per la plej malmoralaj procedoj.
Vi jam havis viajn organizantojn de la jaro 2000, kiuj nur paciencigis la postulemulojn, priskribante al ili la estontecon...por la jaro 2000. Ili havis grandan konsideron por la Homo, por liaj sintenoj, liaj reagoj antaŭ la novigoj. Kaj multaj amatoraj revoluciuloj aŭdis tiun akran riproĉon : "Vi forgesas la homon, lian liberon, lian decidpovon." Tiel naskiĝis multaj organizoj, arigante, sub la gvidado de plej famaj gravuloj, serĉist-skipojn marodantajn en la homa

fako, persvaditajn pri la graveco de sia misio, konvinkitajn, ke al ili estas asignita alpermesi la revoluciulojn, se iliaj konkludoj estas favoraj al tiuj lastaj.
Kion ili faris en via epoko, favore al la homo superŝutita per malhumana burokrataro, anestezita per propagando, kaj daŭre senigita de siaj liberoj : t.e. forlasi siajn domaĉojn, eldiri siajn opiniojn, diskonigi ilin, instrui siajn gefilojn, vojaĝi, elekti alian metion post ia aĝo, sin varmigi, akiri kulturon, sin distri laŭvole, finfine eskapi malsekurecon, timon, mal j u s t e c o n ?
Sed la de viaj organizantoj promesita Ekonomio por la jaro 2000, interesis nur tre iomete la iamajn generaciojn, pli dezirantajn postuli la venontsemajnan Ekonomion, tiun de la venonta monato, tiun de la sekvanta jaro kiel plej lastan.
La bilanco de la politikaj revolucioj, tiu de la ekonomiaj transformoj, tiu de la historiaj ŝanĝegoj estas kalkulitaj laŭ la postlasitaj malbonaĵoj. Ĉiu perturbo tiel eligas sian sekvaĵparton. Militoj mortigis kaj ruinigis, sed ili ankaŭ riĉigis per siaj postlasaĵoj. La revolucioj forĵetis iun intrigantaron profite al alia. La gajntransdonoj per ekonomiaj decidoj ofte malriĉigis la plej malriĉajn, kaj riĉigis la plej riĉajn. Sed la mortintoj silentas ; la bankrotintoj, la ruinigitoj, la malriĉuloj humile, silente sin tenis. Tiel la sekvo eskapis mezuron. Ĉu la homo ne jam multe atestis sian malagemon, sian indiferentecon pri la ŝanĝoj de siaj vivkondiĉoj? Ĉar li estis tro okupita, tro priokupita de siaj tujaj problemoj, tempo ŝajne mankis al li por efike partopreni la ellaboradon de la naciskalaj decidoj. Fine, ĉu la propagandteknikoj ne montris, kiel estas facile realigebla, per bildoj, donoj, la homa kondiĉigo ?
Necesis do pensi, ke multaj el la novigoj realiĝis sen troa zorgo de la instigantoj pri la homaj reagoj, kaj vi tre malpravis konsideri ĉi tiujn kiel gravegajn. Milionoj da homoj, dekope, centope jam transpasis de iu reĝimo al alia, sen taksebla reago, sen sentebla pliigo de la postlasaĵo. Ĉu plejparto el la sociaj malbonaĵoj ne estis ja la rekta konsekvenco de neadaptita kadro ekonomia, en kies interno mizero rekreskis kiel agropiro ?
La homo bezonis nur malpezigon de la ŝarĝego, kiun konsistigis liaj stultaj kaj vanaj taskoj. Li bezonis ĝui iom pli da libertempoj, reakiri pli bonan vivekvili-

bron. Li bezonis moralan progreson, tiom kiom socian progreson. Li bezonis gvidosignon, celon klare difinitan ekster ĉia demagogio, celon pravigantan liajn aktivecojn. Tiukondiĉe ŝajnis mirige, ke li intencus bojkoti la novajn ekonomiajn instituciojn, konceptitajn ĝuste por redoni al li ĉiujn liajn rajtojn kaj ĉiujn liajn liberojn. Hodiaŭ la atingita rezultato atestas kiom pravis viaj "utopiistoj".

Aŭ viaj revoluciuloj estis malbonaj psikologoj, aŭ ili estis simple demagogoj.

- Mi memoras, mi diris, nemalmultajn provojn fare de la politikaj oponantoj por elpreni la povon. Ankaŭ okazis kamparanaj ribeloj. La sindikatoj firme deklaris sian vidpunkton, mobilizis siajn anojn, sed fine de tiu tuta senorda agitado la ekzistanta aŭtoritato refirmiĝis, kaj la popolamasoj, post eŭforiaj mallongaj periodoj refalis en ĝenerale pli malbonan situacion. Tiom da interesoj opiniis sin kontraŭitaj, ke reale ŝajnis neeble ŝanĝi ion ajn kontraŭ la volo de tiuj, kiuj faris la leĝojn, obeigis al ili dank'al sia povo pere de la polico, la armeo kaj la justicaparato. Tial la plej ardaj revoluciuloj ne plu eliris el banala reformismo, fariĝis komplicoj de la konservativuloj, kaj ĉi tiuj, maskitaj en la sino de organizoj kun neprecizaj celoj, ofte alianciĝis kun la revoluciaj gvidantoj.

- Vi ĵus mem malkovris la kialon de tiuj malsukcesoj, diris Katarina. Ĉiuj viaj revolucioj celis proprajn interesojn, kiuj kompreneble provis sin defendi, kontraŭmetante forton aŭ ruzon al la renversemaj entreprenoj. Erare viaj revoluciuloj kredis pri revolucio povanta, eĉ unu semajnon, sen damaĝo al iliaj propraj trupoj, ne havi helpon, kunlaboron de la kutimaj produktanimantoj. Nu, kiun alian perspektivon la rompantoj de la starigita ordo proponis al tiuj lastaj, krom neakceptebla reveno "inter la vicojn" ? En tiaj kondiĉoj, kial miri pri tiu konstanta streĉado kontraŭ la socialistaj agoj fare de la favorantoj al via "libera entrepreno"? La profunda originaleco de nia sistemo sidas en la konservo de la konsumnivelo por la plej dotitaj. Multaj el la posedantoj timis pro senpropriganta socialismo, kiu definitive ruinigus ilin. Sed dumvivaj rentoj anstataŭis la rentumojn iam alportitajn per la kapitallaboro. La altaj oficistoj plej ofte konservis sian postenon. Tre malmulte el la entreprenestroj forlasis la estradon

de sia entrepreno. Se kelkaj faris tion, tio estis pro ilia aĝo aŭ ilia sanstato, pro deziro profiti justan emeritecon. Ĉar la enspezsekureco estis de tiam garantiata, multaj el ili tro laborigitaj, lacegaj, kiuj nur por certigi sian vivsekurecon elĉerpiĝis super sia tasko, konsente retiriĝis. Aliaj direktis senutilajn, malutilajn entreprenojn, detruajn por la kolektivo. Al ĉi tiuj oni proponis ĝis la emerita aĝo anstataŭajn oficojn, honorpostenojn, aŭ enoficigis ilin en la libertempo-industrio, kies vastan disvolviĝon vi povis konstati.

Vi demandis vin, kiel la gravaj financistoj bonvole konsentis perdon de tiu povo donita de la kapitalo? Nu, verdire, se la mono efektive perdis sian diktatorecon, tiuj, kiuj iam posedis ĝiajn fontojn, tamen konservis la povatributojn. Ofte mono fincelis nur doni regadon super aliulo, kaj la povo mem estis nur (kaj tio ĉiam restis) iu el la manifestadoj de bezono superregi komuna al la tuta homa specio, bezono kiu ĉiam komandis ties socian sintenon ! Do la povo estis nur rimedo por alporti honorojn, signojn de konsiderado, de respektego kaj de estimo. Viaj financistoj tiel atribuis al si gradojn, titolojn kaj mil farbojn, provante aliflanke sin dispartigi de la ordinarulo jen per pli okulfrapa elspeziga vivmaniero, jen per luksegaj loĝejoj, jen per brilaj rilatoj, jen per aliaj eksteraj signoj.

Ni lasis al ili ĉion ĉi, iliajn fortajn aŭtojn kun galonitaj ŝoforoj, iliajn titolojn kiel prezidantojn, kiel ĝeneralan direktoron, iliajn rezervitajn klubojn, iliajn brelokojn kaj iliajn orajn kraĉaĵojn. La plej aĝaj rajtis ĝui senzorgan emeritecon, bonvenan libertempon, vivritmon pli taŭgan por la aĝo de iliaj arterioj. Aliaj mem malkovris anstataŭilojn por siaj aktivecoj iam funde malutilaj aŭ neproduktivaj.

De tiam generacia tempodaŭro forpasis, kaj ĉiuj tiuj por vi gravaj problemoj malstariĝis.

## ĈAPITRO XX
La entrepreno.
La investado.

Chester, mi baldaŭ sciis tion, plenumis gravajn funkciojn estre de laborgrupo kuniganta skipojn de konsilantoj-inĝenieroj kaj tial tre bone konis la fakajn problemojn en la entreprenoj.

Agnoskante, ke tiel eksterordinaraj ŝanĝoj en la ekonomiaj moroj ne okazis sen ĝisfunde transformi kelkajn mekanismerojn en la entreprenvivo mem, mi do pridemandis lin.

Mi deziris scii ĉefe pri la maniero reguligi la industriajn kreskojn, kiel la produkto-faktoroj atingis harmonion inter si, fine kiu substituaĵo anstataŭis la investadon de kiu ĝis tiam originis la tuta ekonomia vivo.

- Realiĝas hodiaŭ, li diris, ĉiuj deziroj de viaj iamaj Sansimonistoj, kaj samtempe tiuj de la idealistoj de ĉiuj tendencoj kaj de ĉiuj religioj, ĉar unuj kaj aliaj trovis en nia komunuma sistemo la fandilon de siaj pensoj ĝis tiam diverĝaj kaj la respondon al la problemoj tiklantaj ilian konsciencon.

Iam, la tuta entreprenstrategio artikiĝis cele al la konkerado, la konservado kaj la disvolviĝado de la merkatoj. Ofte do la entreprencelo ne plu estis la utilo, la komuna bonigo ; tio okazis ĉiufoje kiam la neceso ĝin postulis, t.e. kiam la optimuma rentabilitato de la investita kapitalo ŝajnis ne plu garantiata per la tradiciaj merkatoj.

Plej ofte la merkatoj estis celitaj laŭ senskrupula avido, ĉar la konsumelspezo por multaj kategorioj de salajruloj kun stagnantaj gajnoj montriĝis malmulte grandigebla, kaj tial ĉiu entrepreno estis devigata uzi malŝparegajn reklamrimedojn por enkonduki sur la merkaton sian produktoparton.

Niaj monaj teknikoj, kunligitaj al alia maniero starigi la enspezojn kaj la prezojn, ebligas al ni ĉiumomente harmoniigi la ofertfluon kun la tuta uzita enspezaro,

t.e. nature kaj kvazaŭ aŭtomate ampleksigi la merkaton ĝis la fizikaj ofertdimensioj. La aplikado de tiaj strukturoj havis favorajn konsekvencojn por la funkciado de la entreprenoj, unue liberigante ilin de duobla zorgo : traserĉi merkatojn kaj ekvilibrigi sian kontan bilancon.
Tiel ni povis rehavigi por **utilaj** celoj miliardodekojn da horoj iam jare uzataj por neproduktivaj streĉoj serve al la reklamada industrio kaj montransmetoj. La formado de la enspezoj per moncirkulado tra la salajroj, la prezoj kaj la investado, aspektas hodiaŭ kiel la procezo plej komplika, plej malracia, plej malantaŭeniga kaj ankaŭ plej maljusta, iam imagita por doni al la individuo liajn konsumrajton.

Mi kapskuis :
- Fine vi estigis la entreprenestrojn simplaj senrespondecaj oficistoj, ĉar, mi aldiris, mi supozas kiel duan efikon de via komunuma socialismo malgravigon de la rolo plu atribuata al la entreprenestroj, kaj mi demandas min, en kio ĉi tiuj, ricevante dumvivan enspezon, timas sankcion pro malbona prizorgado.

- Via timo estas vana, mia kara, diris Chester. Vi ne konsideris la taskegojn, kiujn entreprenestro helpata de sia stabo devas alfronti. Unue, li devas produkti ĝis maksimuma program-kapablo, kalkulante nur pri la registritaj kadencoj koncerne la provizadon "almonte". Kaj li reguligas la laborhorarojn, ĝustatempe eldiras siajn mendojn de laboristaro laŭ la postulataj kvalifikoj, konstante informiĝas ĉe la almontaj kaj alvalaj entreprenoj por eviti la al- kaj refluojn, li preparas la staĝantan laboristaron, li ĝisdatigas la produktokostojn cele al malkovro de la organizo-mankoj aŭ de la nenormalaj konsumoj en krudmaterialoj, energio aŭ dungado. Li strebas al plibonigo de la produktaĵa aŭ serva kvalito, li konceptas kaj aplikas ĉiujn dispoziciojn kongruantajn unue por malpezigi la neutilajn lacegojn; due por liberigi personaron tiam disponeblan por aliaj entreprenoj. Fine li atentas pri bona socia etoso, kaj li havas "verdan lumon" por ĉio alia! Vi demandas en kio la entreprenestroj, kies enspezoj nun dependas nek de la merkatsituacio nek de

la konta bilanco nek de la ekonomia konjunkturo nek de la veteraj kondiĉoj nek de la bankista bontrovo, ricevas instigon por siaj decidoj, puŝon por siaj faroj? Iam malbona mastrado kaŭzis bankroton, la bankroto ne nur senoficigis la respondeculon, remetis lin en ordinaran lokon, sed ĝi ĉefe neripareble damaĝis al la familia buĝeto de la maldungita laboristaro maljuste punita.
Hodiaŭ malbonan mastradon karakterizas altprocenta malŝparo, malaltiĝo de la kvalito, febra societoso, malbone prizorgata ilaro, sed tamen ne sekvas maldungo de la tuta entrepren-personaro. Okaze de pruvita manko estas punitaj nur la veraj respondeculoj, kies forprenitaj funkcioj iras al pli bonaj sociologoj, al pli bonaj teknikistoj, post interveno de la konsumanto-sindikatoj kaj de la eminentaj komitatoj.
Do daŭre la persona intereso gvidas la farojn de ĉiu, kies kontentigoj povas esti ĉu materialaj ĉu moralaj. Nu, nia komunuma socialismo ĝuste efikas por akordigi la personan intereson de la entreprenestroj kun la celo al ĉies bonstato. Kaj tion oni povis atingi nur en nova ekonomia kadro transformanta la naturon de la "celoj kun malbona konscienco", kiuj iam estis lumturoj en multaj el viaj entreprenoj.
En via ekonomia sistemo la investado okupis grandegan lokon. La bankoj, la publikaj financoj, la asekurkompanioj, la ŝparoj, la variantaj kapitaloj, la deponaĵoj kaj garantiaĵoj, fine la institucia ŝparado drenita tra la prezoj, ĉiuj ĉi tiuj fontoj konsistigis kun la tuto de la netaj profitoj la ĉefajn provizantojn por la investado.
Origine la rolo de la investoj ŝajnis klare kaj sane difinita : plenumi la prizorgadon, la renovigon, la ampleksigon de iloj kaj de la ekipaĵoj, organizi la industrian, agraran kaj minejan fundamentan strukturon, ankaŭ starigi kadron por la socia vivo, t.e. financi konstruadon de lernejoj, urboj, hospitaloj, stratoj, irigaciretoj, akvoduktoj, ktp...
Tamen dum la jardekoj antaŭantaj nian revolucion la investado jam profunde evoluis. Strukturita por roli kiel "mamoj por enspezoj", por plistreĉigi la moncirkuladon, ĝi iom post iom aspektis kiel celo por la ekonomia aktiveco, la ekspansi-kriterio mem. La ekspansio estis ja mezurata laŭ la realigitaj profitoj

kaj en la produktado neniu deziris distingi la parton konsideratan kiel utilan disde tiu malŝparata "por la enspezo".
Kiam aperis la unuaj simptomoj montrantaj la disiĝon de la rentabilitato disde la utileco, la investado povis nur preni la partion de la malplej favorata en la paro. Por viaj investistoj neniel gravis la celeco de la aktivoj postulantaj financadon. Ĉiufoje la rentabilitato superis la utilecon.
Certe la investado rezultigis "gvidadon", planizadon de la laboroferto laŭ la deziro de la kapitalposedantoj, sed, agnosku tion, la uzata rimedo estis nekredeble kaj mirige komplika.
Necesis unue arigi la investotajn kapitalojn helpe de kompleta arsenalo de ruzaĵoj kaj leĝoj, de juristoj kaj kontistoj ; poste redisdoni la tiel starigitan kapitalaron per salajroj kaj entreprenprofitoj, postulante seriozajn garantiojn, laborigi "malplene" stabojn de altrangaj financistoj, de internaciaj firmaoj, de ĉiufakaj teknikistoj kaj ĉio tio por transformi disponeblajn laboron kaj energion en riĉaĵojn, eĉ en falsajn riĉaĵojn, ofte dube utilajn.
Nia ekonomia modelo, konfesu tion, estas tamen pli natura, pli racia, kaj ĝi alportis egajn simpligojn al tiu procezo. Por alvoki, por direkti la laboron, por ĝin transformi en sociajn **utilojn**, nia ekonomio postulas nek uzon de kapitalaro amasigita per montransmetoj, nek konsekvence malaltigon de la enspezo disdonata al la konsumantaro. Ni anstataŭigis la investadon per tre malrigida planizado de la laboroferto reguligata iniciate de la entreprenestroj kaj de la regionaj kolektivoj.

- Mi komprenas, mi diris. La individuo ricevas anstataŭ salajro krediton destinitan por lia konsumado. La strukturo de lia laborenspezo strikte ligita al lia kapablo, al la plenumita ofico kaj al liaj bezonoj, estas pripensita por atingi plej bonajn rendimentojn. La maniero distribui tiun enspezon, sekvante nek la kanalon de la produktadaj operacioj, nek tiun de la profitoj kaj de la investado, jen kio substrekas, ke temas pri absolute nova koncepto pri la monrolo. Ĉu ekzakte ?
- Nia lernanto rimarkinde progresas, diris Chester direkte al Katarina.

Kaj, alparolante min, li daŭrigis :
- Tiel eskapante la pezajn katenojn de la investado, same ni povas organizi la laboron por ties nun facila adaptigo al la individuaj kaj sociaj bezonoj. Ni daŭrigas la produktadon de la ekipaĵaro laŭmezure de la haveblaj konsumproduktoj necesaj por provizumi la disponeblan laborforton, kaj tio je la nivelo mem de ties bezonoj; laŭmezure ankaŭ de la sukceso elspezi por la konsumdestinitaj provizaĵoj nur la minimumon el la disponeblaj homfortoj kaj materialrimedoj. Cetere, tiuj decidoj estas alprenitaj por lasi disponeblecon de la rimedresto cele al la ekipado, daŭre certigante la libertempan parton.
Do ni celis pligrandigon de la rezervoj koncerne la kvalifikitan laboristaron plurkapablan. Paralele ni plene uzas la energidonajn, mekanikajn, elektronikajn rimedojn por havigi, je minimuma homkosto, la diversajn provizadojn destinitajn kontentigi laŭ kreskanta procentaĵo la bezonojn de nia laborforto. Fine la homa laboro estas maksimume domaĝita, ĉiu ŝparita horo, ĉu per forigo de malŝparfonto, ĉu per interveno de aŭtomata ilaro, tiel liberigas horon, kiun profitas aŭ la libertempo, aŭ la esplorado, aŭ la servo por nova ekipaĵo.
Kelkfoje okazas ke, post eraroj en la envojigo de la laboristaro-uzado, kelkaj produktoj montras dumtempajn mankojn, kio altigas kelkajn prezojn. Tiam sufiĉas nur ĉerpi el la kvalifikitaj rezervoj por restarigi normalan situacion, t.e. orientitan al konstanta prezmalaltigo. Jungitaj ĉe la sama ĉaro, entreprenestroj, korporaciaj asembleoj, altrangulaj komitatoj, uzantarsindikatoj, ĉiuj kune nun akordiĝas por organizi la lokan laboron kaj nur tre esceptokaze konsultas centralizitan planiz-aŭtoritaton, kies arbitracia rolo, kiam pridemandita, plenumiĝas ekster ĉia burokrata inkvizicio.

## ĈAPITRO XXI

La planizado de la laboroferto
La atestoj pri utileco
La regulantaj mekanismoj. La agadelektoj
La fikciaj produktoprezoj
La teknokratoj
La produkt- kaj konsumakordigo
La arbitraĝoj

La raporto de mia amiko daŭre vekegis mian intereson. Chester daŭrigis :

- Via teknika mondo devis sin persvadi pri la nepra neceseco sin disciplini, t.e. organizi, direkti siajn produktivajn fortojn, kunagigi la aktivojn por kiel eble plej perfekte atingi la teorian celon asignitan al ĉiu homa socio : kontentigi maksimumon da bezonoj per minimumo da rimedoj kaj streĉoj, tamen sen enkaĝigi la produktantojn kaj iliajn klientojn.

Tiu neceseco sin malkovris iom post iom pro la senĉese pli strikta interdependeco inter la diversaj produkto-sektoroj ĉiugradaj. La agadlibero povis nur estigi egajn malŝparojn. En via epoko, kio restis de libera entrepreno, speciale sine de la agrikulturaj medioj, atestis pri tiu forperdo de potencialaj riĉaĵoj kaj libertempoj, kies interrompo urĝis, se ni dezirus esti pli bone konsiderataj de la popolamaso tiam senigita de la plej nemalhaveblaj riĉaĵoj, se ni dezirus konkeri niajn liberojn.

Viaepoke oni vidis la ekonomian kaj socian kadron sin protekti per malpermesoj, bariloj kaj giĉetoj, kontingentoj kaj kvotoj, propagando kaj reklamo, reguIaroj kaj vizoj.

Sed ĉia trudado naskas reagojn. Tiom da limigoj truditaj al la individuaj liberoj nepre devis esti akompanataj de eksterordinara plifortigo de la politikaj kaj ekonomiaj povoj por tiel garantii ekvilibran funkciadon de la institucioj.

Pli ŝajna ol reala, la atingita ekvilibro estis do la

rezulto de planizaj metodoj karakterizitaj per totalismo aŭ teknokratio, dum la internaciaj firmaoj vetbatalis por la buĝeta aparato kaj la banka kredito, provante influi plejparton el la agadelektoj.
Longtempe oni fidis la merkataŭtomatismojn antaŭ ol sin konvinki pri pli da malavantaĝoj ol da avantaĝoj en ili. Iu ajn ulo, iu ajn frenezetulo fakte povis mendi ekipaĵojn aŭ gravigi sian stokon. La sankcio ĉiam okazis aposteriore post senutilaj malŝparoj kaj punis ankaŭ senresponsajn personojn, viktimojn de la bankrotoj. La ekonomia antaŭkalkulado kompletigita per merkatesploroj, la bankaj ekspertizoj, la investadplanoj ja starigis kelkajn gard-relojn por malpermesi kreditaliron al la homoj plej frenezetaj, sed ne ĉiam ebligante al la individuaj iniciativoj manifestiĝi por utilaj celoj sen rentabilitataj perspektivoj. Kiom da projektoj mortnaskitaj ! Kiom da bonvolaj streĉoj kontraŭitaj! Certe la prospero konsiderata laŭ nur mona vidpunkto estis savkonservata, sed ĉu ne koste de kontraŭrajtaj senigoj, de kvazaŭ krimaj malŝparoj, de kondiĉigo ĉe la plimultaj konsumantoj, viktimoj de la monaj aŭtoritatoj ?
Ni do konceptis aliajn procezojn malpli frenezajn, malpli barbarajn, ol la balasta mekanismo de la financaj elektoj kaj de la investado por reguligi la kreskadojn, adaptiĝi al la bezonoj, findecidi pri la prioritatoj, kunordigi la ekonomian disvolviĝon sen malgrandigi la prerogativojn de la entreprenestroj.
Fakte, la uzado de konsummono ebligas rektan planizadon de la dungado, konsidere al la laboristaro grande kaj konstante disponebla ĉe ĉiuj lokoj. Fine ĉiuj operacioj nun ne plu bezonas la kapitalmovojn, kiuj iam rezultis de la kapital-kolektado kaj redistribuado, ĉefe senŝarĝigitaj de la kontregistrado pri la "ŝuldoj" kaj la "saldoj".
Sed, kvankam nia socialismtipo, organizita cele al la komuna bono, estas strukturita por ekskludi ĉian totalismon, tamen ĝi devas disponi reguligajn organojn kapablajn kontentigi la prioritatajn objektivojn enskribitajn en la programo por la agnoskite utilaj realigadoj, kaj atingi la maksimuman ŝparadon en la uzado de la materialaj kaj homaj rimedoj.
Tiucele, "util- kaj kompetentpermesoj", ĉu fare de eminentul-komitatoj helpataj de teknikaj kaj sociaj

konsilantoj koncerne la lokajn projektojn, ĉu de ekspertokomitatoj respondecaj antaŭ balotitaj asembleoj koncerne la ĝeneralajn projektojn, donas la verdan lumon al la individuaj aŭ kolektivaj iniciativoj, kies manifestiĝo estas ĉiumomenta, kiam ili necesigas gravajn translokojn de laboristaro.

Iam la monperdoj sankciis la malsukcesojn. Ili tramontris la opinion de iu klientaro, ĝian aĉetrifuzon. Sed, ĉar tiu mekanismo ĉesis roli en nia sistemo, en kiu la enartikigo (produkt- kaj konsumakordigo) per la prezoj certigas konstante malfermitan merkaton, nun iu utila entrepreno deziranta disvolvi sian produktadon nur devojiĝas laŭmezure de la risko mobilizi certan laboristaron malfavore al agnoskite prioritataj sektoroj.
Do niaj utilpermesoj anstataŭis viajn bankpermesojn pri rentabilitato. Ĉe la fino de tiu nova procezo la elektoj estas faritaj laŭ kune akceptita opinio de la plej kompetentaj homoj en la produktist- kaj konsumant-medioj. La produktado por la enspezo cedas la lokon al produktado celanta nur la kontentigon de la homaj bezonoj, kaj ĝi speciale celas fabriki libertempojn kaj riĉigi ilin, kiam la primaraj bezonoj estas jam kontentigitaj.
Ĉiu postulanto, individuo aŭ kolektivo, kompreneble konservas ĉian eblecon defendi iun projekton antaŭ la studkomitatoj komisiitaj por konsili la fordonon de la utilpermesoj. Do efektive temas pri kune akceptita planizado, kies fleksebleco faras ĝin ilo profunde malsama de viaj teknokrataj planoj kaj de la peza burokratara direktismo fare de la malnovaj socialismaj skoloj.
Plie, la utilpermesoj ebligas la reenoficigon de multaj maljunaj kadroj multefikaj, fariĝintaj balastaj en la entreprenoj. Akceptite en la ekspertkomitatoj, proksime de sia loĝejo, ili alportas sian sperton kaj siajn konsilojn, kuraĝigite per la scio pri sia daŭra utileco al la komuna laboro.

- Ĉu ne estis risko, mi rimarkigis, ke, liberaj agi sen kontrolo, iuj entreprenoj, kies produkto-kapabloj

superas la tuton de la realaj bezonoj, ekzemple entreprenu findehakadon de la eŭropa arbaro, pretekste ke la ligno estas utila produktaĵo ?

- Via rimarko estas tre ĝusta, respondis Chester. Tamen ĝi ne konsideras gravan elementon. Niaj eminentul-komitatoj, ne forgesu tion, fordonas la utilpermesojn, sed antaŭ ol fari tion ili ne nur formulas opinion pri la memutileco de la produktaĵo. Ĝis kiu grado la reala demando restas malsupre de la ekzistantaj programkapabloj ? Tia estas la unua pridemando de niaj planistoj. Tamen vi komprenas kiom estas tiel multe pli facile respondi tiun demandon, kiam ĉiuj realaj bezonoj estas prikonsiderataj, ol taksi la amplekson kaj la limigojn de la **merkato**, t.e. de la **pagipova** mendo, kiu iam donis al la statistikistoj nur necertajn ciferojn.

Hodiaŭ niaj ekspertoj nur sondas la gravajn uzantojn pri iliaj jaraj bezonoj, por juĝi pri kiu marĝeno disponas iliaj industrioj por sorbi plion da provizadoj.

Viaj iamaj ekonomikistoj povus riproĉi nin pri foresto de konsumantaŭvidoj. Ilia antaŭdira scienco certe alportis iun laborvolumenon,sed konsidere al la malbonaj rezultoj atingitaj, ni agnoskas hodiaŭ, ke ili vane malŝparis sian tempon.

Kiam okulfrape la produktitaj kvantoj superas la realajn bezonojn, kaj tio daŭre, nu ! endas nur malakceli la laborĉenojn, alterne doni libertempojn al la laboristaro, aŭ ankaŭ redukti la laborhorojn.

Kompare kun viaepokaj malŝparoj "instituciigitaj", la niaj aspektas malgravaj. Nur por la eksterordinaraj okazoj la laboristoj estas translokitaj, ne sisteme kiel iam pro ĉiu fermo de laborejo aŭ okaze de loka malakcelo en la ekonomia aktivo. La regulo postulis neniun interrompon en la laboro, ĉar ĉiu familio devis plu manĝi tri fojojn tage kaj neniu povis vivi sen taga okhora partopreno en iu ajn laboro.

- Do, mi rediris, ĉu vi disponas nenian reguligan mekanismon ?

- Reguligaj mekanismoj por reguligi kion ? diris Chester iom akre. Ĉu la klientoj ne estas konstante tro multnombraj ? Ĉu ni timas seninterrompe tro produkti, almenaŭ tiom longe dum niaj entreprenoj respektas siajn utileco-celojn ? La produkt- kaj konsumrilatigo (enartikigo) efektiviĝas per la prezoj kaj fleksebla enspez-direktismo,

per prudenta pago de kromsalajroj kaj monkompensoj, kiuj ofte ebligas orientadon de la konsumado, ĉar ni scias, kiuj produktaĵkategorioj estas plej mendataj laŭ la socirango kaj la propreco de la konsumanto. Iuj produktaĵoj interesas nur la familiojn kaj tute ne la gefraŭlojn, la urbanojn kaj tute ne la kamparanojn. Tial por vendi la "dumtempajn troaĵojn" plej ofte sufiĉas distribui oportune kelkajn monkompensojn, malaltigante samtempe la prezojn de la varoj, kiujn oni deziras rapide forvendi. Tiucele ni salajras taĉmenton de specialistoj pri sociologio kaj psikologio de la amasoj kaj grupoj.
Fakte ni reguligas iujn kreskojn unujn laŭ la aliaj, sed ni faras tion ne kiel la iamaj burokrataroj socialistaj, ne kiel la obstinaj planistoj, sed interne de tre flekseblaj limoj, dezirante lasi maksimumon da iniciativoj al la entreprenestroj. La eraroj, se okazas, ne plu kaŭzas monajn katastrofojn, ili manifestiĝas nur per momentaj fruoj aŭ malfruoj en la produktokadencoj.
Vi grave taksis la elekteblon. Oni povas eĉ aserti, ke tiuj famaj elektebloj plejparte okupis viajn direktorojn, viajn politikistojn kaj viajn ekonomikistojn. Evidentiĝis, ke senigitaj de reale efikaj agadrimedoj por organizi, direkti, naski la mendadon fare de la privatuloj enlime de iliaj pagokapablaj bezonoj, vi devis eviti, ke la produktovolumeno ne eksuperu tiun de tiu ŝanĝiĝema mendado, kaj en la vastega diverseco de la pagokapablaj bezonoj la produkt- kaj konsumakordigo de la varoj ĉiufoje reprezentis akrobataĵon por la entreprenoj senkapabligitaj antaŭe distingi kiome la produktadoj sukcesus enartikiĝi. Kaj ĉiu takseraro estis severe sankciita per monperdoj, bankrotoj, kiuj samgrade atingis la nerespondecan personaron de la entreprenoj. Tial ĉi tiuj zorge evitis la trograndecon de siaj instalaĵoj preferante maltusanismon, kiu limigis iliajn riskojn. Cetere, ni opinias, ke la socialismaj doktrinoj, kiuj naskiĝis en via epoko sub la formo de ŝtatkapitalismo, originis de tiu konstato, ke estas pli facile organizi la ŝtatbezonon ol tiujn de la privatuloj kaj malpli malfacile konsumigi al la ŝtato la entreprenproduktaĵon ol sorbigi ĉi tiun al la familioj. Kaj la ŝtato estis baldaŭ invadita per internaciaj firmaoj, intrigantaj, plaŭdaĉantaj ĉirkaŭ la buĝetaj kapitaloj, zorgantaj

pri klarvida starigo de la impostdispartigado, por ke la prebenduloj ne estu samtempe la plej grandaj impostpagantoj.
Hodiaŭ, dank'al niaj fluktuantaj prezoj, ni kapablas ĉiumomente enŝoviĝi laŭvole en la parton de la ĝis tiam agnoskitaj nepagipovaj bezonoj kaj ne plu ekzistas problemo pri enartikigo. Tiel niaj elektebloj estas multe pli fleksеblaj. Ili fariĝis simplaj prioritato-elektebloj, kiuj plu necesigas nek la ekonomian kalkulon nek la konsum-antaŭvidon, sed nur la plej demokratan konsultadon de la konsumantaro per la kanalo de la eminentulaj komitatoj.
Vi ne povas scii, je kioma grado la forlaso de la financa ekvilibro ebligis simpligi la entreprenvivon, malŝarĝante la direktorojn el la ĉefa kaŭzo de iliaj zorgoj, liberigante ilin por taskoj pli teknikaj kaj ĉefe pli sociaj, pli homaj. Hodiaŭ vi renkontos mastrojn pli proksimajn de siaj oficistoj ; la sociaj konfliktoj tute malaperis.
- Ĉu mi komprenu, mi diris, ke la produkt-alĝustigoj nun okazas sen planinterveno, sen prezsankcio, sen kalkulo de la produktokosto ?
Katarina ekparolis :
- Nu, proksimume estas tiel, kvankam verdire ni tamen konservis la kalkuladon de la produktokostoj, sed temas pri tre simpligita kalkulo, kiel vi tuj konstatos.
Unue, tiu kalkulado celas nur kompari, por eventuale elekti inter ili, la analogajn entreprenojn, tiujn, kiuj produktas la samajn varojn, aŭ ankaŭ observi de iu jaro al la sekvanta la rendimenton ĉe la sama entrepreno por malkovri la nenormalajn malŝparojn kaj ĝiajn lokojn, kontroli la taŭgan utiligon de la personaro.
Due, tiuj produktokostoj estas tute fikciaj, malpezigitaj interalie de ĉiuj transŝovoj, kiuj iam aldoniĝis al la elspezoj por la laboristaro, la krudmaterialoj, la energio : impostoj kaj taksoj, asekuroj, kapitalŝarĝoj, amortizoj, rezervoj, ktp.. La nuraj faktoroj hodiaŭ konsiderataj pri iu produktokosto koncernas la koston de la krudmaterialoj entenataj en la produktaĵo, kosto laŭ interkonsento fikcie nevaria por kompari la elspezon por iu jaro kun tiu por la sekvanta. Kaj ĉiu oficisto ricevas indicon laŭ sia kvalifiko kaj

la okupata posteno, indico ankaŭ fikcia, tute senrilata kun lia enspezindico. Por ĉiu indico respondas fikcia salajro ĉiam rondigita al la cento. Tiam oni starigas la produktokoston farante el ĝi simplan elspezon el personaro, materio kaj energio por ĉiu produktita unuo. Tiel la efikeco de la entrepreno mezuriĝas laŭ la atingita elspezŝparo en homlaboro kaj krudmaterialoj.
Resume ni agas nur per la kluzpordeto, kiu reguligas la fluon de la konsumantoj, t.e. sur la prezoj kaj sur la enspezdistribuado, kaj ni ne plu prizorgas la antaŭdirojn, kiuj iam rilatis al la kapital- kaj provizadtransmovoj interne de la produktadprocezo.
Tiel ni povis formeti la pezan burokratecon en la reĝimoj, kiujn vi nomis "socialismaj". Ĉu iuj sektoroj montras malfruojn ? Kiu graveco ? La plibonigo ŝajnas ĉiam konsiderinda kompare al la malfruoj viaepoke konstatitaj en nekontesteble prioritataj sektoroj, ekzemple la loĝado, la lernejoj, la higieno, la publika sano, sektoroj konsiderataj de viaj bankistoj kiel ne sufiĉe mondonaj kaj naskantaj multekostajn bezonojn. Nun ni konstruas entreprenstrukturon kaj poste ni lasas ĝin disvolviĝi laŭ la iniciativo de ĝiaj mastroj, post certiĝo, ke ĝi produktos nur utilajn valoraĵojn kaj servojn.
En la liberala vidmaniero, la planizado de la investoj respondis antaŭ ĉio al zorgo pri "enartikigo". Prave oni timis misŝanĝojn, stagnadojn, vendomankojn pro mistaksado pri la konsumkapabloj. Rezultis tiu malsaneca bezono senĉese pridemandi la merkatsituacion, la intencojn de la produktistoj, la akrobatajn antaŭdirojn de viaj ekonomikistoj-statistikistoj, kaj la giganta reklammalŝparo destinita kondiĉi la konsumantaron por sorbigi al ĝi tion senregule produktatan.
Nia sistemo estas strukture liberigita el tiu enartikigzorgo, kiu superregis vian tutan epokon. La donitaĵoj tute inversiĝis. Anstataŭ ĉiupreze disvolvi la merkaton, ni pli volonte celas malgrandigi ĝin. Nia Ekonomio, certigita neniam malhavi klientojn, estas sendube pli facile regebla ol la via, kies ĉefa zorgo estis fabriki klientojn kaj Dio scias pri la tiucele manifestata elturniĝemo de viaj regantoj !
Nia nura celo estas etendi la produktadon utilan al la homo ĝis la dimensioj de maksimuma produktiveco,

poste enartikigi per la prezoj kaj per saĝe lokitaj enspezoj. Tiel la planizadprocedoj resumiĝas al la protektado de kelkaj prioritataj sektoroj kaj al la arbitracioj petitaj de la entreprenestroj mem, kiuj plene rericevas la iniciativon por agi konsidere al triobla imperativo : bonkvalito, rimedŝparo, kvanto. De nun la planfaktoroj ne plu estas analizataj laŭ kapitaloj sed laŭ oficoj. Plej ofte la industriaj kreskoj plenumiĝas sen interveno de la centralizitaj organismoj. La regionaj aŭ lokaj aŭtoritatoj fakte disponas larĝan aŭtonomion, kiu permesas al ili ĉerpi, laŭ siaj bezonoj, el la rezervoj de la kvalifikita laboristaro, multe pli abunde provizumitaj ol iam, pro la formeto de la konkursoj kaj de la aĝolimigoj en la lernejoj, pro la akcelita profesipreparado kaj pro la enoficigo de la sociaj sentaŭguloj.
Tiuj iam nomitaj "teknokratoj" fariĝis la rekonitaj konsilantoj de la entreprenestroj, ties informfonto. Ili uzas kiel provilojn eksperimentajn farmobienojn, modelindustriojn. La findecidoj okazas post ekzameno de la fikciaj kostoj uzataj kiel barometro kaj servantaj por mezuri la rendimenton kaj la socian efikecon de la entreprenoj, samtempe kiel ilia komparita produktiveco.
La ekonomia informado havas unuarangan rolon. Ĝi okazas per la peticioj de uzantoj, per la trastudo de la demandaroj, per referendumoj, per la verdikto de la prezoj, kiuj senĉese montras la rilatojn inter la oferto kaj la mendo, fine per la avizoj de la entreprenestroj avertantaj pri atingo de sia produktoplafono kaj petantaj pliajn personaron kaj ekipaĵojn.
Iam ĉiu okupis sin por akiri enspezon kaj tre akcesore por utili al aliulo. Ni nenion ŝanĝis koncerne la egoisman kialon de la aktivoj, sed ni funkciigas nian Ekonomion tiamaniere ke la laborceleco estas ekskluzive direktata por la kolektiva bono, kaj ju pli la socia rezulto atingita montriĝas altvalora, des pli ĉiu vidas kreski sian aĉetpovon.
Per la akumulado de profitoj oni ne plu sekurigas sin kontraŭ la ofte nemeritaj sortbatoj : kataklismoj, konjunkturo, militoj, akcidentoj, malkapableco. Totala enspezgarantio estas strukture atribuata al ĉiu, lige al la sociala kaj homa efikeco de la laboro asociita kun vastegaj energidonaj konsekvencoj.

Al via ĵetkuba Ekonomio favoranta la malmoralecon kaj la maljustaĵojn, oni substituis moraligajn strukturojn formetantajn ĉian intereson al la maltusanismaj operacioj, al la malŝparoj.
Ni alportis al viaj dekadencaj kaj malmoralaj civilizacioj novidealan blovon, entuziasmigan celon, ĉi tiun mem, kiu tiam kruele mankis al via junularo.
- Ĉu mi rajtas konkludi, mi plu diris, ke ĉia aŭtomatismo forestas en via ekonomia sistemo ?

Respondis Chester :
- Koncerne la aŭtomatismojn, agnosku, ke iam ĉi tiuj ekzistis preskaŭ nur en la imago de viaj ekonomikistoj, escepte se oni konsideras tiaj la veterajn akcidentojn, kiuj periode fatale perturbis grave la plej precizajn antaŭdirojn de la planistoj kaj disĵetis la plej profundan malordon en viajn interŝanĝojn, kaj ankaŭ viajn strikojn kaj viajn militojn. Fine, ĉu la pli kaj pli oftaj intervenoj de la ŝtato en la interŝanĝoj, en la doganaj taksadoj, ne rezultigis esceptan misreguligadon en la funkciado de tiuj aŭtomatismoj, ĝuste por ke ĉi tiuj ne risku malfavori la kapitalposedantojn ?
Kontraŭe al via sistemo bazita sur la pludaŭro de la antagonismoj, la nia vivas en kompleta simbiozo kun la homa medio, unu reaganta sur la alia laŭ fleksebleco iam nekonita. La oferto- kaj mendadleĝo tute rolas kaj sen iu ajn baro. La pletoroj mem malaperas, ĉar ili kvazaŭ aŭtomate komandas la malgrandigon de la horaroj, aŭ la translokadon de la laboristaro, ĉi-lasta direktota al la atendlaboroj aŭ al la libertempoj. Koncerne la misstreĉojn okazantajn en la provizadoj, ili same aŭtomate rezultigas alvokon al la disponeblaj laboristaroj en la postulataj kvalifikoj, aŭ malgrandan kreskigon de la devigaj horaroj, aŭ ankaŭ la disvastiĝon, la disvolviĝon de iuj produktokapabloj.
Vi malpravus laŭdi la aŭtomatismojn, kiuj funkciis, kiam la senlaboreco rezultigis dolorajn homajn migradojn por ĉiupreze malkovri iun laboron.
Je la tago T ni heredis ekzistantan strukturon, kiu ebligis tre larĝajn kapablojn al maksimumo. Tiel ni konservis tiun strukturon ĝis la prezvariado alkondukis nin iom post iom modifi ĝin per progresivaj kaj malgravaj tuŝetoj.
Nia komunuma Ekonomio estas la rekta heredanto de via kapitalismo de la jaroj '60, ties fruktuzanto.

Ĝi ne estus naskiĝinta, se antaŭe ne estus realigitaj la necesaj kondiĉoj, por ke ĝi stariĝu sen kolizietoj kaj sen suferoj.
La teknika ilo forĝita de la antaŭaj generacioj estis en bonega stato kaj nekompareble forta. Por plene efikigi ĝin, ni bezonis nur formeti la malnovan financan ilon, kiu al ĝi tranĉis la flugilojn, tiun malmodernan ilon, kiu iĝis nekapabla preni sur sin la taskojn por la komuna bono, hodiaŭ plenumatajn kun vere perfekta facileco per la anstataŭa mona ilo.

## ĈAPITRO XXII

La alĝustigo de la produktofaktoroj
La rentumoj de rareco
Kapitalo kaj enspezo

Certe, kelkfoje okazas, ke ni staras ne plu fronte al iu strangol-elverŝilo paralizanta iujn produktosektorojn, sed antaŭ nenormala akumulado de la sekurstokoj, signo, ke ni preterpasis la sojlon de la absoluta abundo lokalizita ĉe kelkaj produktaĵoj. Iam ĉiu entrepreno, kiu malprudente produktis pli ol la merkatbezonojn, ne havis alian solvon ol maldungi parton de sia personaro, se ne estis bankroto.
Hodiaŭ tiu speco de akcidento okazas ankoraŭ de tempo al tempo, sed ĝi ne plu havas la konsekvencojn iam tiel timitajn de la entreprenestroj kaj de ilia personaro maljuste punita.
Ĉu temas pri konserveblaj produktaĵoj, stokeblaj? Se la prezon nulo oni jam atingis kaj se la mendo daŭre ne sin montras, tutevidente konvenas momente haltigi la fabrikadojn kaj disponigi la personaron fariĝintan senutila kelkatempe ĉu al la atendlaboroj, ĉu al la libertempoj, ĝis nova mendo manifestiĝos. Sed plej ofte sufiĉas redukti la laborhorarojn por revenigi la stokojn ĝis la dezirata nivelo.
Ĉu temas pri pereemaj varoj? Ĉiam eblas frajti kelkajn aerkargojn por provizi la regionojn, kie mankas tiuj varoj, aŭ por profitigi per ili loĝantarojn de najbaraj landoj. Kelkafoje okazas, ke ni malgraŭ ĉio devas konsenti la spektaklon de vardetruado pro neebleco disdoni dum la nepra daŭro de konservado, eĉ je prezo nulo. Kredu tamen, ke ni ne plu faras sistemon el tio, kaj ni konsideras ne inde fieri en tiaj cirkonstancoj. Aliflanke ni uzas pli kaj pli la glaciigadon, la rapidan senakvigon kaj ĉiu komunumo posedas siajn glaciigajn ŝrankojn, en kiujn ĉiu familio deponas siajn varojn, tiel grandigante la stokkapablojn.
Vi do konstatas, ke la foje aperantaj misekvilibroj

inter la oferto kaj la mendado ne havas daŭrajn rezultojn. Ili ne pli efikas koncerne la produktilajn posedaĵojn: ilarojn, ekipaĵojn, anstataŭigaĵojn.
Iam estis kutimo fare de la provizistoj plilongigi siajn limtempojn, samtempe strebante plej bone kontentigi sian klientaron, kiam instaliĝis varmanko. Tiam oni vidis ilin, dank'al nevortigita solidareco kaj propriniciative, dispartigi la kvantojn, kiujn oni antaŭvidis disponeblaj je la liverdatoj. Ĉiu strebis kiel eble plej bone pasigi la malgrasajn jarojn, reduktante siajn horarojn, maldungante iom el sia personaro. Do tiu sama procezo pluiĝis, bazite sur la solidaraj rilatoj starigitaj ĉiutempe inter la liverantoj de la produktilaj posedaĵoj kaj ilia klientaro. Ĉar en nia komunuma sistemo la entreprenoj estas finance sendependaj unuj de la aliaj, montriĝas indiferente por la distribuata enspezo, ke firmao reduktu siajn horarojn aŭ eĉ ke ĝi momente haltigu sian aktivadon. Ĉi tie empiriismo, asociita al solida kaj rapida informado, ebligas anstataŭigi ĉiujn laborojn de la ekonomikistoj.
Via epoko ofte suferis larĝajn manko-makulojn en la nutraĵaj, ferindustriaj aŭ minaj sektoroj, pro la militoj kaj ties postlasaĵoj aŭ pro longdaŭraj strikoj. Nedubeble, tiuj varmankoj ofte montriĝis enspezigaj por favorataj produktistoj kaj por la komercistoj profitantaj el la rarec-rentumoj.
La alproprigo de la rarec-rentumoj fare de personoj, kies nura merito ofte estis profiti de cirkonstancaro tute sendependa de la plenumita laboro (akcidentoj, militoj aŭ grandaj katastrofoj) ĉiam estigis akrajn reagojn ĉe la senigitoj. Certe ĉiu volonte konsentis, ke la prezo altiĝu, kiam estis malmulte por dispartigi, sed kial la rareco riĉigu privilegiularon, kiam ĝi sin trudis al la popolamasoj ?
Konfidante al la ŝtato la zorgon kolekti la rarec-rentumon, ĉu per la enspezimposto, ĉu per la flanka vojo de la naciigoj, la socialismaj skoloj enkondukis nur tre multkostan peranton, kies sola rolo estis fakte redistribui profite al kelkaj elektitaj entreprenoj tiun rentumon, kies malaperon la socialistoj neniam imagis, krom kolektigante ĝin per la ŝtato.
Ĉar la rareco riĉigis ilin, produktistoj kaj komercistoj devis tutnature koalicii kontraŭ ĉion riskantan malgrandigi la per ĝi gajnigajn efikojn. Malkomforte lokitaj,

devigitaj digobari oferton iĝintan iom post iom malfacile regebla, aŭ stimuli la mendadon, ili do de tiam nepre devis, por limigi la aplikkampon de la leĝo, por malhelpi ke ĝi efiku preter la nivelprezoj konsiderataj kiel ne transirebla limo, uzadi mil rimedojn duone fraŭdajn, kiujn vi certe memoras : agrikulturan, industrian kaj minan maltusanismon, profesio-reglamentadon, premojn kontraŭ la enoficigo, interkonsentojn kaj monopolojn, malŝparojn, duonakcepton fronte al la aŭtomatigo, alvokon al la ŝtatigitaj merkatoj, t.e.: stokadoj, armilaroj, kosmoprogramoj, gravegaj laboroj (tuneloj...) kaj mil senutilaj laboraĵoj, luksegaj konstruaĵoj, helpoj al la subevoluintaj nacioj, subvenciataj eksportaĵoj... protektismo, grundbanko, liveradoj al la administracioj kaj al la naciigitaj entreprenoj, bremsado de la kredito, militoj.

Fakte, la leĝo estis bona, nur kondiĉe, ke oni decidu pri la necesaj antaŭzorgoj por formeti de ĝi la okazon agi en ĉiuj kazoj kiam ĝi riskis detrui la rareventumojn. Tio klarigas la severan batalon nepre farendan de la produktistoj por konkeri novajn merkatojn, por konservi kaj defendi la malnovajn. Sed tiuj novaj merkatoj tro larĝparte respondis malmulte al celaro por komuna bono, ĉefe kiam ili devis esti trabatitaj per militoj, ilia preparado kaj iliaj sekvaĉoj, kaj per vastegaj oficmalŝparoj.

La Merkat-ekonomio, kiu faris el la leĝo de oferto kaj mendado la fundamenton mem de sia regularo, devis do agnoski, ke tiu leĝo pli malfavoris ol favoris ĝin, ke ĝi ruinigis multajn produktistojn, paralizante iliajn investojn. Sed kio restis el la pravigo de ekonomiaj institucioj, kiuj tiel rifuzis akcepti la devigojn de tamen agnoskite natura leĝo ?

Do prudento kaj racio komandis adapti la ekonomian kaj monan aparaton al tiuj novaj kondiĉoj. Ni devis kondamni ĉiujn solvojn, kiuj ankoraŭ uzis la interŝanĝojn por pulsigi la monon, kaj la prezojn por formi la enspezojn, de kiam ekmalfortiĝis la tradiciaj mankoj, kiuj ĝis tiam relative sukcesigis tiujn solvojn.

Absolute nepris, ke la prezoj intime akordu daŭre kun la evoluado de la ofertataj kvantoj konsidere mem ŝanĝiĝantan mendadon ! La ĝusta prezo estu tiu, kiu certigos vendkadencon plej najbaran al tiu de la reprovizadoj. Tiel per la prezoj ĉiujn konsumantojn

interesos la produktiveco, kiu ebligos atingi per sama elspezo pli grandan kvanton aŭ diversecon de produktaĵoj aŭ servoj. Do ne plu necesos stimuli la mendon. Ĉi tiu libere manifestiĝos, la prezoj estos des pli malalte fiksitaj ju pli la oferto estos vasta kaj la mendo malgranda.
Ĉar nun vi konas nian situacion, vi pli bone taksas la trairitan vojon. Certe la prezoj perdis sian profitdonan karakteron kaj konsekvence ni uzis aliajn rimedojn por formi la enspezojn. Ni devis nur zorgi fari neniun perdanton. Tiukondiĉe la novaj institucioj povis ĝui favoran akcepton fare de tiuj, kiuj antaŭe inklinis vidi ĉiujn novaĵojn kiel promeson de senposedigo, mankigo, fortranĉado de la enspezo.

- Mi konjektas, mi rimarkigis, ke la operacio, realiganta la senproprigon de la stokoj, nepre naskis fortajn reagojn ? Ĉu vi ne konstatis iun subitan varmankon?
- Okazis nenio tia, vigle diris la kuracisto, pro jena kialo : la tago T ne estis fakte tiu de la granda monŝanĝego. Simple tiu tago signis la ekirigon de giganta inform- kaj dokumentkampanjo celanta informi la publikon pri la atendotaj konsekvencoj de la mona revolucio decidita.
La varoj en magazeno ĉe la komercistoj plej ofte estis nur simplaj deponaĵoj aŭ ankaŭ posedaĵo de la monpruntistoj. Aliflanke, longatempe antaŭ tiu epoko aliaj naciigoj okazis kaj la akciuloj ricevis malavaran monkompenson dum la proprieto de la produktrimedoj, tiu de la stokoj, fariĝis ŝtata.
Same la komerco-naciigo en Kubo kaj en Egiptio okazigis la pagojn de dumvivaj rentoj. Ankaŭ ĉi tie oni pagis dumvivajn rentojn al la maljunuloj, kiuj decidis forlasi sian komercon, sed ilia procento estis multe pli alta ol tiu iam konsentita al la senposedigitoj, ĉar la rajtantoj daŭre ricevis enspezon saman al tiu antaŭe havigata per ilia profesiado.
Por la aliaj nenio ŝanĝiĝis. Oni ne malplenigis sturme iliajn bretarojn. Ĉi-lastaj repleniĝadis kvazaŭ ĉiuj ekskomercistoj konservus la liberan uzadon de siaj kapitaloj kaj ĉiujn rilatojn kun siaj provizistoj. La diferenco estiĝis de la fakto, ke de tiam ili estis malŝarĝitaj de ĉia konta zorgo, de ĉia maltrankvilo pri la merkatoj, devigataj nur daŭrigi sian profesiadon,

sen pli da kontrolo ol antaŭe. Plie, ĉiuj iliaj ŝuldoj malaperis : ni saldis la kontojn je la tago T + X, forstrekante la longdaŭrajn ŝuldojn, dum la kreditoroj ricevis enspezon responde al la engaĝitaj sumoj, laŭ la limoj de sia konsumbezono.
Malaperis la kapitalo, sed la enspezo restis netuŝita. Ni malŝarĝis la kontojn el la kapitalpezo, konservante nur la enspezdisdonadon. Anstataŭ kontregistri posedaĵan kaj bienan kapitalon de kelkaj centoj da dolarmiloj, de tiam sufiĉis distribui laŭ la plej rektaj vojoj enspezojn destinitajn al konsumo kaj, konsidere la senpagecon de multaj servoj, la neutilecon de investado por la individuoj, entute la distribuataj sumoj tiam atingis apenaŭ la centonon de la antaŭe en- kaj forkalkulitaj kaj kontregistritaj sumoj.

## ĈAPITRO XXIII
### La feriantoj
### La pseŭdo-senpagecoj

Tiun tagon Doktoro Harvey anoncis :

- Mi proponas al vi viziti niajn feliĉajn feriantojn.

- Ankaŭ ni havis la niajn, mi replikis.

- Ĉu vi rajtas paroli pri viaj feriantoj ? diris Katarina. Certe viaj leĝfarantoj ebligis tiun liberigan periodon, sed hipokrite forgesante la elspezkreskon truditan al la familioj dezirantaj profiti de tiu liberigo dum kelkaj semajnoj jare.

Tial, por la salajruloj, kiuj ne ricevis ferisubvenciojn, t.e. la plej multaj, la restado ekster la kutima loĝloko antaŭe kaj poste rezultigis aron da devigaj severaj senigoj.

Ĉu tiaj senigoj, juĝitaj finance nepre necesaj, estis pravigeblaj laŭ materiala kaj teknika vidpunktoj ? Alivorte, ĉu aranĝo de la tiam disponeblaj rimedoj por havigi al ĉiu la produktojn kaj servojn responde al liaj bezonoj, ne povis senutiligi tiun absurdan porciumadon truditan al la apetitoj de la malplej riĉaj ?

Same kiel nun, tiam mankis al vi nek plaĝareoj, nek somerumejoj, nek riveroj, nek arbaroj, kaj tamen ties ĝuon vi rezervis al minoritato da privilegiuloj.

Ĉu ni ne pruvis, ke ne estis pli malfacile konstrui motelarojn, velŝipojn, glisilojn, hidroaeroplanojn, helikopterojn, rapidajn motorkanotojn, ekipaĵojn por navigaj sportoj kaj submara esplorado, telferojn, spektaklejojn, instali tegmentitajn banejojn, kampadejojn, etgolfludejojn, fabriki fiŝkaptilarojn, ol ekspedi kosmoŝipojn ĉirkaŭ la terglobon, kiel vi iam faris ?

Aliflanke, konsidere al la amasego de viaj stokoj laŭdire "strategiaj", al la abundaj rezervoj, kiujn nur ungogratis la maltusana ekspluatado en viaj minoj, al la reklama streĉado por ajnakoste vendi la plej strangajn materialojn, al la luksegaj laboroj, kiuj forglutis imponajn materialo-tunarojn, ni hodiaŭ ne

opinias, ke tiam tiel kruele mankis al vi la provizoj en krudmaterialoj kaj en energio postulitaj de la fer-industrio.
La provizado de la somerumejoj per manĝovaroj ne pli starigis teknikajn problemojn, kondiĉe disponi sufiĉan aron de rapidaj transportiloj kapablaj forporti al lokoj riskantaj subitajn konsumalvokojn la kvantojn postulitajn por tiu provizado.
Ĉu vi ankaŭ ne havis ĉiuĝenrajn artistojn, kiuj ŝimis en la agentejoj kaj ardis sin montri por distri la liber-tempojn de la homamasoj ? Fine, viaj teknikistoj, kiuj dum la militoj sukcesis transporti miliondekojn da batalantoj de mondekstremo ĝis la alia, ekipi ilin, nutri ilin, vesti ilin, starigi "aerpontojn", ne povis esti embarasitaj por same disponigi al viaj feriantoj la materialajn rimedojn, kiujn ili bezonis.
Koncerne la laŭokazajn laborojn neprigatajn por bonkon-diĉe plenumi la jaran migradon de viaj feriantoj, hotelpersonaro kaj domservistoj, naĝinstruistoj, infan-gvidantoj,familiaj helpantinoj, riparistoj, poŝtistoj, oficistoj por la distribuado, por la ludsalonoj kaj la spektaklejoj, por la higiena kaj la vartado, ĉu vi opiniis neeble tiucele adapte uzi parton el viaj elementoj tiam socie senutilaj kaj ion ajn farantaj nur por ricevi enspezon ?
Simpla aranĝo de la laboroferto, sen efiko kontraŭ la normala ritmo de la ordinaraj provizadoj, estus ebliginta al la feriantoj ĝui feliĉajn feriojn sen altrudo de la dekonaĵa pago al la spekulantoj tiam embuskantaj la grandajn migradojn.
Sed la vojaĝoj, la luprenoj, la feridistroj iam restis ekster la ebleco de multaj buĝetoj kaj kulpis en tio lama strukturo de la labordonado, kiun la kapitalo, ekskluzive okupata pri rentabilitato, mobilizis sen ajna zorgo pri socia utilo. Kulpis ankaŭ tiu koncepto, ligita al certa maniero de enspezstarigo, laŭ kiu servo estis vendota je sia kosto, kiam logiko postulis, ke la prezoj rolantaj kiel moderigiloj rebrile indiku nur gradon de manko aŭ abundo kaj tial apartiĝu de la enspezoj.
Do iuj prave opiniis, ke la uzado de la somerumejoj pli larĝe malfermiĝus, ĉefe se la kolektivoj organizus la disponeblan dungitaron konsidere al socia utilo. Jam sin montris antaŭe konsternitaj rebatemaj spiritoj,

laŭ kiuj demokratigo de la libertempoj signifis netolereblan atakon kontraŭ la liberoj. Ĉu fakte ili ne konsideris tiun demokratigon sub la perspektivo de severa disciplinado de la feriantoj, al kiuj oni trudus tiajn aŭ tiukategoriajn hotelojn aŭ loĝejojn, striktajn horarojn koncerne la uzadon de la tenisejoj kaj de la navigajilaroj, kaj kiujn feriantojn je fiksita horo oni ŝovus en la trajnojn aŭ la aviadilojn, nombritajn, etikeditajn, gvidatajn al de ili ne elektitaj lokoj ?
Ĉu tiel oni ne starigis la bildon, kiun jam povis priskribi viaepokaj observantoj : vojaĝantoj similaj al ŝafoj, nombritaj ĉe la pordoj de la stacidomoj, esploritaj de la doganistoj, trankvile parkvicigitaj unuope sur la aerodromareoj, stare amasigitaj en la trajnkoridoroj, premitaj en la komunaj transportiloj, je ĉiu etapo pagtruditaj por trinkmonoj, taksoj, "kun vino kaj manĝilaroj almetendaj", porciumitaj per prezoj cirkonstance alĝustigitaj laŭ la diligenteco de la "etikedplantistoj", pensionogastoj devigataj al manĝo-horaroj, vivantaj en lokoj ŝutitaj per malpermesoj ?
Aliflanke, tiel longe kiel la sportaj ekipaĵoj disponigitaj al la uzantoj estus nesufiĉaj por sammomente kontentigi ĉiujn mendojn, limigitaj uztempoj anstataŭ la prezoj devus daŭre reguligi la dispartigon. Koncerne la liberan elekton pri ferirestadejo, hotelo aŭ restoracio, evidentiĝas, ke la plejparto el viaj somerumantoj devis konsideri ne siajn preferojn sed la staton de siaj financoj. Fine, certa disciplinado ŝajnis tre bone akceptita de la personaro apartenanta al iuj publikaj servoj aŭ al la grandaj entreprenoj, al kiuj estis trudita okupkalendaro por la infanferiejoj, la montar- aŭ mardomoj, ĉiu ricevanta laŭ sia grado tian aŭ alian loĝejon el difinita kategorio, ĉio akompanata per inspektadoj, kontroloj kaj inventaroj.
La optimistoj do malbone distingis, kio en la konsiderinda pligrandigo de la rimedoj disponigitaj al la libertempemuloj konsekvence gravigus porciumadon tiam kaŭzitan de la nesufiĉoj en la feriindustrio. Gravis nur la servkvalito ; kaj ĉu la pruvo ne estis jam parte farita, ke la realigoj entreprenitaj sub la egido de la kolektivoj (scienca esplorado, akvobaraĵegoj, sportejoj) en nenio malsuperis la realigojn ŝuldatajn al la privata iniciato ? Tiel la prefero de la veraj amatoroj irus al la senpagaj libertempoj kaj la demokratigo

donis nur riskon ĉesigi la varbadon al iuj kluboj, kiuj kompreneble estu liberaj fariĝi rezervitaj, protektataj kontraŭ la entrudiĝantoj per aliĝkotizo fiksita nenormale alte.
Tamen necesis eviti blinde impeti en tiun pseŭdosenpagecon kutiman en viaj tiamaj socialismemaj reĝimoj, kiuj trompis la uzantojn, fine pagigante al ili la koston de kelkaj servoj sub formo de nerektaj taksoj ŝarĝantaj la aliajn prezojn. Ĉiu sistemo uzanta cirkulantan monon ne povis eskapi tiun kaptilon. Fakte nur la forlaso de tiuj monaj sistemoj ebligis al ni malaperigi la nuran kaŭzon de la plejparto el niaj zorgoj kaj proponi al la feriantoj libertempojn, se ne senpagajn, almenaŭ ne pli multekostajn ol se ili restus hejme.

## ĈAPITRO XXIV

La loĝlokoj
La preparadoj al aliaj oficoj
La migradoj. La atendoficoj
La agrikulturo kaj la kamplaboristoj

Tiu feriloko ĉe la Suda Marbordo, kien ni iris tiun tagon, revenigis al mi malnovajn memorojn el epoko, kiam sur kelkaj etaj konstruterenoj ekstariĝis kelkaj vilaoj, dum jam floris la spekulado. La proksimo tiam disponis pri nenia industrio. Somere alfluis aroj da turistoj, sed la plaĝon frekventis precipe svarmoj da kampadistoj.

Mi do estis surprizita malkovri, nestitan en la pinarbaro, veran urbeton el malgrandaj domoj trietaĝaj kaj el multnombraj beletaj vilaoj.

- Kia stranga materialo! mi ekdiris, kiam la unuaj konstruaĵoj aperis al mi.

- Temas, diris Chester, pri loĝejaroj preskaŭ tute konstruitaj en aŭtomatigitaj uzinoj. Fakte ĉiu regiono posedas la sian, kaj ĉiu el tiuj uzinoj kapablas fabriki ĉiutage la elementojn por ducent ĝis kvincent tutekipitaj loĝĉambroj muntotaj nur laŭ la klientdeziro. En la plimulto el tiuj konstruaĵoj la plasta materialo ludas la esencan rolon, kaj alportas gamon da mirigaj koloroj. Tiel ni ŝparas spezon, transportojn kaj muntadlaboristaron.

Mi rimarkis ankaŭ la nombron da moteloj, kiujn la feriantoj alsturmis :

- Niaj feriperiodoj meze daŭris trimestran tempon, mi diris, kaj ĉiu devis poste reveni sur la laborlokon. Ĉiuj loĝejoj en tiu domaro verŝajne estas loĝataj dum la tuta jaro, ĉu ?

- Ni starigis, diris Katarina, libertempindustrion, kiu ebligas al multnombraj homoj konstante loĝi ĉe la somerumlokoj, daŭre laborante.

Fakte mi baldaŭ konstatis, ke la marproksima regiono

norde estas nun kovrita per laborejoj por la muntado de velŝipoj, glisiloj, akvoskioj, maŝinoj veturantaj sur aerkusenoj. La instalado kaj la ekspluatado de la moteloj same okupis certan laboristaron.

- Mi ĵus intencis demandi, mi konfesis, kiel vi havigis al vi la necesajn kreditojn por realigi tiun instalaĵaron.

- Multo ĝis tiam formetita de viaj financistoj estiĝis ebla, tuj post kiam ni rezignis vian monan sistemon, respondis Chester. Tiam ni ekkonsciis, ke por konstrui, transporti, organizi la libertempojn kaj iliajn industriojn, necesis nur materialoj kaj kvalifikita laboristaro. Kaj se la antaŭaj generacioj konstante suferis kapital-mankon, la nia, post forigo de la malŝparoj kaj de la falsaj oficoj, estis riĉa en ĉiufakaj specialistoj, kies aktivecojn sufiĉis organizi kaj kunordigi cele al la prioritatoj konformaj al la deziroj de la uzantoj. Sendube ni spertis kelkajn malfacilojn por akceptigi tiujn simplaĵojn al tiuj, kiuj antaŭe komercis per mono kaj kredito. Sed ilia maltrankvilo kvietiĝis, kiam ili estis certaj, ke ne malgrandiĝos iliaj konsum-elspezoj. Pro tio la plejparto ricevis malpezigon de siaj profesiaj zorgoj, pli molajn arteriojn kaj la kvazaŭ miraklan resaniĝon de siaj stomakulceroj.

Unu el la ĉefaj kialoj, kiuj tiel facile adoptigis nian skemon, estis la tiel donita plena garantio, ne nur al la posedantoj de la produktrimedoj, sed ankaŭ al ĉiuj riĉe provizitaj, malgraŭ la alpreno de la merkatoj, de la mono, de la enspezoj kaj de la prezoj fare de la kolektivoj.

Vi vane serĉus retrovi hodiaŭ la bildon multfoje montritan de viaj konservativuloj koncerne tiun kolektivigadon tiam konsideratan antaŭĉambro de la infero.

Je la tago T ni lasis ĉiun estron ekspluati sian entreprenon kiel en la pasinteco, ligi la samajn kontraktojn almonte kun siaj liverantoj kaj alvale kun sia klientaro, konservi la kontrolon de sia personaro. Estus kredeble, ke nenio ŝanĝiĝis, ĉar nek la prezoj validaj antaŭ la tago T, nek la valoro de la individuaj enspezoj estis modifitaj. Ŝanĝiĝis nur la monnaturo kaj konsekvence la maniero formi la enspezojn.

La unuaj kontraŭfluoj manifestiĝis, kiam la eminentul-komitatoj decidis la forigon de iuj aktivecoj konsiderataj kiel bagatelaj, senutilaj aŭ malutilaj. Iuj kondamnitaj entreprenoj maltrankviliĝis, sed la timo de iliaj direk-

toroj kaj de iliaj akciuloj malaperis, kiam ili konstatis neŝanĝon en siaj enspezoj. La plej maljunaj pensiuliĝis je aĝo kiam ili sopiris al ripozo pro ekmalfortiĝo. La reenoficigo de la pli junaj ne estis malfacila konsidere la nombron de la atendlaboroj proponataj al ilia elekto, kaj dum la mallonga intertempo, kiam iuj estis senlaboraj, plena enspezo estis tamen certigita al ĉiu. Ĝis tiam la utila produktado okazis sen iliaj oficoj, estis normale, ke ĝi plu provizumu ilin, ĉar neniun oni povis konsideri respondeca pro la maldungdecidoj de la eminentulaj komitatoj.

Necesis ankaŭ atingi certan moveblecon de la laboristaro. Pro la kvazaŭ deviga atingo al la proprieto viaj registaroj sukcesis nur fiksi tiun laboristaron tie, de kie poste fariĝis malfacile deloki ĝin de ĝia posedaĵaro. Vi konstatas, ke hodiaŭ plejparto el niaj grandaj centroj disponas pri konstanta suplemento de loĝejoj pretaj akcepti la "migrantojn".

- Sed, mi demandis, ĉu ili pagas neniun luprezon ?

- Tiu luprezo reprezentas nur simplan moderigilon, kies valoro neniam superas 8 % el la enspezo. La difektigoj estas dekalkulitaj sur la kreditslipo de la kulpanto. Iam viaj proprietuloj nealimaniere agis kontraŭ siaj luprenantoj, efektivigante tiujn deprenojn el la garantisumo pagita je la eniro en la lokon.

- Ĉu por la laboristaro, kiu pensiuliĝas, mi daŭrigis, ne eblas okupi tiam propre posedatan loĝejon ?

- Mi ĵus deziris precizigi, intervenis Katarina, ke la emerito elektas laŭvole la lokon, kien li deziras retiriĝi. Li tamen devas uzi sian ŝparaĵon, se li volas personecigi la ĉiesan loĝejaron tiumomente disponigitan al li fare de la kolektivo.

Ĉe ni la aferoj pli plena dungiĝado, kiuj okupis tiel grandan lokon en la prizorgoj de viaj registaroj, starigas neniun problemon. Fakte ni povas disponi pri klavaro de decidoj kapablaj distribui la utilajn taskojn en la tuton de la disponebla aktiva loĝantaro, ĉu plilongigante la daŭron de la jara libertempo, ĉu mallongigante la tagajn aŭ semajnajn horarojn, ĉu daŭrigante la lerntempon de la gejunuloj, ĉu fine intervenante ĉe la nombro de la laborpostenoj. Ni atentas nur al uzo de la maŝinoj kaj de la energio laŭ rendimento-optimumo, kio por iuj aktivecoj implicas devigan disponon de kvar aŭ kelkfoje eĉ kvin skipoj interŝanĝeblaj,

cele certigi seninterrompan funkciadon de la ekipaĵoj dudek kvar horojn en diurno.

Iuj profesioj rigardataj kiel penigaj skipe praktikiĝas en tre mallongaj tagoj, dum aliaj juĝataj pli ripozigaj uzas pli longajn horarojn. Tiuj donitaĵoj estas ofte decidigaj okaze de profesielekto.

- Sed, mi diris, ĉu tiu duonanarkio ne malutilas al la produkt-kvalito ? Aliflanke mi malbone distingas la mekanismojn sekvatajn por la oficŝanĝoj.

- Tiuj mekanismoj, diris Chester, estas tiuj uzataj dum la lasta jarcento. Ĉiam la persona intereso direktas tiun aŭ tiun ĉi al tiu aŭ ĉi tiu entrepreno, al tiu aŭ tiu ĉi profesio. Iam la laborperdo estis timegata, ĉar preskaŭ ĉiam ĝi kaŭzis enspezperdon. Kiam pro bankroto iu firmao fermis siajn pordojn, ĝia personaro ofte travivis tre tragikajn mizeregojn. Tial, iu posedanta oficon, strebis konservi ĝin. La migradoj okazis post maldungoj, sed kelkfoje ankaŭ rezultis el superproponoj de konkurencaj entreprenoj, al kiuj mankis personaro. Hodiaŭ ni proponas kromsalajrojn, monkompensojn, loĝadfacilecon, pli longajn libertempojn, malpli ŝarĝitajn horarojn kaj mil aliajn avantaĝojn, kiam ni sentas la necesecon altiri kvalifikitan personaron al tiu aŭ tiu ĉi fako, kies laboristnombro montriĝas notinde nesufiĉa.

Tiufake ni ekspluatas niajn laboristaro-sliparojn, kiel faras ankoraŭ hodiaŭ por varbi siajn ekspertojn la internaciaj organizoj por teknika helpo. Tiuj sliparoj ĝisdatigataj ĉe la komunuma kaj regiona ŝtupoj signalas al la atento de la labordonantoj la ecaron, la specialiĝojn kaj la dezirojn de la interesatoj. Ili montras la "laboristaro-stokon" laŭ specialaĵo, kun ĝiaj eniroj, ĝiaj eliroj kaj ĝia disponeblaĵo.

- Kion vi faras, mi nepre demandis, el tiuj, kiuj forlasas sian mastron pro simpla kaprico ?

- Tiu okazo estas malpli ofta ol vi emas imagi tion, respondis mia amiko. Ĉiu komunumo havas siajn nigrajn listojn, kie estas registritaj la ŝanĝemuloj, la grumblemuloj, la profesiaj mallaboremuloj. Iam vi malhumane traktis tiujn elementojn, forprenante al ili ĉian enspezon: "Kiu ne laboras, tiu ne manĝas". Hodiaŭ ĉiu laborkapabla individuo, kiu rifuzas la socian laboron, ricevas la porcion atribuitan de vi al viaj personoj plej malmulte enspezantaj. Sufiĉas monato laŭ tiu reĝimo por revenigi

lin ĉe la dungoficejon. Iuj komunumoj traktas ilin kiel dizertintojn el la civitana kaj socia servo, kaj asignas al ili laborojn elektitajn inter la plej mallogaj. Sed tiuj, kiuj ne povas sin pravigi per laborkarto, estas praktike kvarantenigitaj fare de la loĝantaroresto, kaj tiu puno decidigas ilin ĉesigi sian socian senutilecon.
- Vi ankoraŭ ne klarigis al mi, al kio respondas viaj atendoficoj ?
- Ili estas, daŭrigis Chester, la "ĉieskonvenaj" oficoj, tiuj, kiuj ne postulas apartan kvalifikon kaj de ĉiu plenumeblaj sen speciala preparado. Tiaj oficoj utilas por provizore enoficigi tiujn, kiuj ial momente estas senlaboraj, ĉar ili ankoraŭ ne malkovris alian al ili konvenan laboron. Tiel ĉiu komunumo posedas tiujn specojn de "transitcentroj", kie fiktive restadas la personoj atendantaj oficon, kiuj tamen devas esti utile okupataj.
Tiu rezervo de personaro disponas pri vasta elektebleco por utiligi siajn uzeblajn fortojn : provizado de la distribuiloj, helpo por la rikoltadoj, monŝanĝado, liverado ĝis la loĝejoj, transloĝiĝoj, plibeligado de la fasadoj, prizorgado de la publikaj monumentoj, de la ĝardenoj kaj de la tombejoj, klerigogvidado de la gejunuloj, purigado de la parkoj kaj de la plaĝoj, pesado kaj nombrado en la ĉiovendejoj, rubaĵkolektado de la reuzeblaĵoj, reforstumado, domservado, personaro en la memservaj restoracioj, razentondado, transportado de la lernantoj, paŝtado ktp...

Mi ridetis :
- Tamen vi ne povas peti de leĝhomo paŝti ŝafojn?
- Sed, replikis mia amiko, multnombraj konkretaj kazoj estis studitaj. Malnovaj juristoj tiel iĝis akompanantoj de junulkaravanoj, aktoroj, arkeologoj, privataj konsilantoj. La akceptcentroj, la direkcio de la kulturaj asocioj ofte vokas ilin por la internaciaj kontaktoj. Aliaj estas komentistoj ĉe la radioelsendo, gvidistoj por la vizitoj de uzinoj aŭ laborejoj. Iuj eksnotarioj transformiĝas en brilajn redaktorojn de kapartikoloj, en romanverkistojn, montargvidistojn, ludgvidantojn, interpretistojn, organizantojn de diskutkunvenoj kaj seminarioj. Iuj advokatoj fariĝis psikanalizistoj, prezidantoj aŭ sekretarioj de asocioj, profesoroj pri deklamado aŭ kantado, oficistoj en la publikinformejoj, en la turismoficejoj. Necesas nur iom da imago por malkovrigi

al ĉiu la anstataŭan okupon, kiu konvenus al li.
Sed Katarina dezirus nun diri al vi kiel ni solvis la kamparanan kazon.

- La agrikulturistoj, ekdiris Katarina, alportis al vi multe da zorgo. Enfermitaj en sia tradiciismo, ĵaluzfieraj pri sia sendependeco-mito, kvankam oni striktkuratore gardis ilin pro ilia ŝuldaro, ili sin prezentis kiel muro ne allasebla al ĉia nova sugesto.
Neniu pensis nei la malfacilan, eĉ tragikan situacion de la malgrandaj kaj mezgrandaj grundekspluatantoj, kies sorto same estis ligita al la laŭesence kaprica varkurzo. Ĉu ili pravis lasi la hazardon tiel direkti ilian vivon kaj postmeti ilian laboron, iliajn strečojn, ĉe la vera lastan rangon ? Ĉu oni ne vidis ilin tre pasive konsenti la konstaton, ke iliaj enspezoj plu dependu, samkiel dum la pli antaŭaj tempoj, de la meteokondiĉoj, de subita ventego, de gelo, de fulmotondro kaj, nova fakto, de nun konstati la minacon kontraŭ tiuj samaj enspezoj pro tro belaj rikoltoj, kiuj kontraŭe devus ĝojigi la konsumantaron severe porciumatan per la prezoj kaj la monmanko ?
Kiel estus reagintaj la industriistoj kaj iliaj salajruloj, se tiel stulta, tiel absurda regulo estus trudita al ili, se sufiĉus malaltiĝo de la termometro ĝis sub nulo aŭ alorienta ventŝanĝo por senaverta forperdo de triono aŭ duono de ilia enspezo ?
Ni deziris nur, ke la depostuloj de la ekspluatantoj ne plu tiel stulte realiĝu per simplaj montransmetoj farendaj malprofite al la konsumantoj kun nevariaj enspezoj, kiuj devis elporti la koston de la subvencioj por la eksportado, de la stokadoj, de la monkompensoj, de la detaksadoj, de la postulata egaleco.
Multaj familiaj buĝetoj estis strukturitaj tiel, ke ĉiu nova ŝarĝo devigus revizii la **elektojn**, redukti la konsumatajn **kvantojn**. Certe la agrikulturaj prezoj malfruiĝis de ĉirkaŭ dek jaroj kompare al la industriaj prezoj, sed intertempe novaj bezonoj estis kreitaj kaj favorataj. Por kontentigi ilin, ekipaĵoj estis konstruitaj kaj ne decis senposedigi ilin de ilia klientaro.
La agrikulturo estis viktimo de ekonomiaj strukturoj, kiuj donis la unuan lokon al la ekonomie forta. Malforte staranta kontraŭ la industrio pli bone defendata per ties internaciaj firmaoj kaj ties reklamado, la agrikulturo ekiris certe perdonta al la klientĉasado, kun

la ŝtato kiel unuegrava inter tiuj klientoj. Ne plu estis elirejo por la malgrandaj kaj mezgrandaj ekspluatantoj neklarigeble ligitaj al la konservatismo, kiu senespere ruinigis ilin. Ilia "Silenta Revolucio" estis nur karikaturo de revolucio, ĉar ĝi ne atakis la tiamajn strukturojn ekonomiajn kaj monajn.
Certe, oni diris tie kaj tie ĉi, la agrikulturo perdis pli kaj pli sian gravecon, kaj kompreneble viaj Sansimonistoj estis la unuaj disvastigantoj de tiaj ideoj.
Anstataŭ resti liveranto, la agrikulturo iĝis kliento de la industrio, sed kliento konstante ŝuldanta, ĉiam minacata per bankroto. Inter la ekonomikistoj, la planistoj kaj la teknikistoj diligentaj por doni lecionojn al la agrikulturistoj, kiom da agnoskis la gravegan sumon de scioj necesaj al la ĝisdate informita agrikulturisto ? Por direkti ties farmobienon laŭ la lasta progreso de la tekniko necesus minimume cento da specialistoj. Nu! kiu sintezus iliajn opiniojn kaj konsilojn asociitajn al la multo de nekonataj kaj ofte neimageblaj faktoroj en la produktado, faktoroj plej ofte restantaj en la nedeterminita fako ?
La maksimuman progreson sine de la malriĉeco kaj de la senscio, jen do resume kion oni tiam proponis al viaj agrikulturistoj premegataj sub la ŝarĝo de la misdiversa feraĉo, kiu tre malbone respondis iliajn bezonojn. Oni proponis al ili nur rimedojn, kiuj riĉigis la industrion kaj la bankon.
Por eliri el sia enmarĉiĝo, por eviti la malriĉiĝon, la agrikulturisto fakte antaŭvidis la revenon al la komunumoj, al la grupagrikulturo, solvo, kiu ebligus al ĉiu familio resti ĉe la grundo, dispartigante la laborojn kun la najbaraj familioj.
Bedaŭrinde, la merkatekonomio, malmolkora, malkompatema, ligis la vivon de la farmbienoj al la profitdonaj prezoj, kaj, konsidere la mondan konkuradon al la pagipovaj merkatoj, oni ne povis atingi tiajn prezojn, nur organizante la rarecon, sanigante la merkatojn, malplenigante ilin de iliaj embarasaj troaĵoj.
Sekve, por la plimulto de la agrikulturistoj, escepte de la proprietuloj ekspluatantaj grandajn bienojn, la agrikulturaj problemoj montriĝis senelirejaj en la tiama ekonomia kadro. Pri tio fine persvaditaj, la agrikulturistoj kuniĝis al la agado de la konsumantosindikatoj, kaj ilia premgrupo, la plej fortega,

la plej kohera, la plej bone organizita, per konsiderinda pezo influis la publikan opinion.

Alia demando priokupis vian epokon. Ĉu necesis konservi la multegon de la etaj farmbienoj ? Ĉu la produktataj kvantoj grandiĝus per kultura grupigado, kiu igus pli produktivaj farmbienojn malpli malŝparajn en homa materialo, kaj donus pli da libertempoj al ĉiu ?

Certe ne sub tiu rendimentperspektivo laŭ kvantoj oni tiam traktis tiujn problemojn pri grupigado kaj parcelokunigo, sed konsidere al la nura kontado, ĉar sole la financa bilanco tiam karakterizis la administradon de farmbienoj.

Tiam vi komprenas la ŝanĝon de vidpunkto kaŭzitan de la fakto disigi la enspezojn disde la prezoj. Sen merkatproblemoj la agrikulturo povis tutlibere esplori la plej bonan vojon kapablan rezultigi altkvalitan kaj pli abundan produktadon.

Al la parcelokunigo de la proprietaĵo, panaceo de viaj planistoj, oni do preferis la agraran kunigon, multe pli efikan. Tiel estis evititaj mil senutilaj transportadoj, kaj ŝparitaj kelkcentoj da milionoj da horoj, antaŭe malŝparitaj pro la ir-revenoj de parcelo al alia. Ĉar oni organizis la kamparanan vivon, ĉi tiu profunde transformiĝis. Reorganizis la farmbienon ne la planistoj sed la agrikulturistoj mem, kiuj, grupigitaj en komunumoj, fiksis la optimumajn dimensiojn de siaj farmbienoj, tie grupiĝantaj po tri aŭ kvar familioj, kaj ĉi tie po dek kvin familioj aŭ pli, kaj ĉiu el ili vidis sian laboron ege malpezigita.

En tiu komuneca kadro la agrikulturisto restis libera kultivi tion, kio plej konvenas por lia grundo, organizi siajn libertempojn kaj la kalendaron de siaj kultivaĵoj. Hodiaŭ, ne devigate mem pagi sian laboristaron, nek sian materialon, nek siajn semojn, nek sian energion, nek siajn sterkojn, nek siajn transportojn, la agrikulturisto fine devas pagi nur siajn elspezojn por la familia konsumado. La agrikultura ekspluatanto nur proponas la interŝanĝe deziritan sumon al la organismo, kiu venas por forporti liajn rikoltaĵojn. Tiel multe da agrikulturistoj kredas ricevi la justan prezon de sia laboro, dum fakte temas nur pri simpla parto de la socia rento ŝuldata al ĉiu konsumanto. Tiufake la pago estas dispartigita ne laŭ egalaj monatpagoj, sed laŭ la liverdatoj, kontentigante la kutimajn bezonojn

de la agrikulturisto laù kreskanta grando.

Poste plu restas al la komunumoj nur lasi al la distribuaj servoj, kies personaro ankaù ricevas la socian renton, la zorgon disvendi la tuton de la provizoj tiel amasigitaj, manipulante la prezojn tiel ke la mendo fariĝu plej proksima de la disponebla oferto. Tiel ne plu estas troaj produktaĵoj, nek troa klientaro. Fine ni alĝustigis procedon, kiu, lasante la agrikulturiston laùvole produkti ion ajn, kiel eble plej multe, tamen instigas lin produkti, en tiu io ajn, la nemalhaveblajn bazproviantojn : la tritikon, la buteron, la lakton, la terpomojn, la rizon, la verdajn legomojn, la viandaĵon.

Ni jam praktikis tiun procedon cele reguligi la profesiojn, por kiuj la rekrutado ŝajnis malfacila. Ĝi konsistis hierarkiigi la socian renton, tiel ke ĉi lasta altiru per la logo de pli altaj gajnoj la kandidatojn necesajn por la pli postulemaj metioj. Ĉar tia monpremidono ne influas la prezojn, ĝi do same ebligis la reguladon de la kultivaĵoj, garantiante sufiĉan provizadon por la bazproviantoj.

Nia sistemo proponas al la agrikulturisto intencanta kunlabori en ĝi serion da avantaĝoj, kiujn povis havigi al li neniu alia sistemo : materiala sekureco dumvive garantiata, enspezo sendependa de la meteo- kaj klimatkondiĉoj, sendependa de lia individua produktado, kaj kies aĉetpovo evoluas laù la tuta produktado naciskala.

Ĝi ankoraù alportas al li la malplipezigon de lia taga laboro, plej larĝan iniciativon, pasiigajn eksperimentojn pri agrikultura produktiveco, la rapidan vendon de rikoltaĵtuto kiom ajn abunda ĝi estas. De nun la agrikulturisto havas libertempojn kaj pension. Liberigite de sia ŝuldaro, de siaj kontaj zorgoj, helpate kiam tion li deziras, li ne plu estas la predo de la uzuristoj. Li ne plu bezonas esperi la venton aù la pluvon por aùguri pri sia gajno aù sia perdo. Li ne plu estas la sklavo de la vetero nek de siaj bestoj. De nun li vivas libera, pli sendependa ol li iam estis dum la antaùaj jarcentoj.

- Mi bone komprenas, mi diris, sed kion opinias pri tiu ŝtatenoficigo la ekspluatantoj, kiuj iam larĝe pergajnis sian vivon, tiuj, kiuj posedis sufiĉan hektarnombron, kaj kiuj sin financis mem sen helpvoko

al la kredito ?

Katarina respondis :

- Oni malpravis konsideris la agrikulturiston kiel malamikon de ĉia socialismigo. Ĉu li ne alkutimiĝis siavice ĉerpi el la ŝtatkasoj : teknika helpo, subvencioj, instal-monpremioj, pruntedonoj kontraŭ eta interezo, sentaksadoj, malpezega impostado ? Ĉu li ne fariĝis fakte kvazaŭ prebendulo de la publikaj financoj dank'al la avantaĝoj, el kiuj li profitis, damaĝe al la aliaj impostpagantoj kolektive senigitaj ?
Plie ne multe ŝajnis, ke li paŭtos antaŭ la kooperativoj, unua etapo al la socialismo. Tamen vi bone komprenas, ke tiuj atencoj kontraŭ lia individueco, la rezigno al la kontrolo, estis konsentitaj nur kondiĉe ke li ricevu personan profiton el tio.
Certe oni rakontis viaepoke la historion de tiu pakistana kamparano, kiu, pasiginte kelkajn jarojn serve en kolektiva farmbieno, kie ŝajnis certigita lia materiala sekureco, reiris proprakonte kultivi kelkajn grundareojn aĉetitajn per lia ŝparaĵo. "Tie, li konfesis, mi havis neniun stimulon. Certe mi estis pli bone pagata, pli bone nutrata, nenio mankis al mi. Sed ĉi tie mi estas hejme. Mi estas libera."
La anekdoto, vi ne dubas, multfoje servis al la fervoraj defendantoj de via libera entrepreno. Ĝi estis bela Epinal-bildo celanta pruvi, ke pro sia individueca naturo la homo malproksimas de la komunumaj solvoj. Kaj per kolorario kaj reciprokeco viaj samtempuloj konkludis, ke la socialismo devas esti kondamnita kaj proskribita, ĉar ĝi atencas al la homa naturo. Kontraŭ tio aliaj refutis, ke en viaj tiamaj civilizacioj svarmis ekzemploj ne malpli konvinkaj pri gregismo kaj pura kolektivismo mirige elportita : familia vivo, religiaj komunumoj, kibucoj, publikaj servoj, armeo, polico, hoteloj kaj famili-pensionoj, restoracioj kaj kantinoj, oficirrestoracioj, publikaj transportoj, teamsportoj, asocioj, kiuj tiam kalkuliĝis laŭ milcentoj. Same, interne de ĉiu libera entrepreno, ĉu ne estis komunaj al ĉiuj salajruloj la iloj, la servoj ? Laborante por la plenumado de iu celo, ĉu ĉiu simpla laboristo, ĉiu kadro, ĉe ĉiu grado de la hierarkio, ne diligentis sin meti akorde en tiun streĉkomunumon, en tiun abelujan spiriton ? Ĉu ĉiu ne estis kontenta vidi ellaboriĝi, formiĝi la frukto de la kolektiva laboro, kiu tamen

multfoje fariĝis posedaĵo de aliulo, kaj pli malofte de tiuj laboristoj ?

Se ĉiuj, kiuj tiam laboris por mastro aŭ entrepreno, estus decidintaj imiti la ekzemplon de nia pakistana kamparano, se ili pretendus siavice fariĝi proprietuloj de ilaro, laborejo, kiel ne antaŭsenti la kriegojn de viaj produktistoj, kiuj tiam pasiiĝis nur pri kunfandiĝoj, koncentradoj, konvertadoj, fronte al tiu metiistreveno, fronte al tiu defio kontraŭ jarcenta progreso ?

Tiel tiu pledo favore al via libera entrepreno reale estis nur pledo "pro domo" fare de pli kaj pli malgranda nombro de entreprenestroj, kiuj tutevidente sin aliancis cele defendi kontraŭ ventoj kaj tajdoj eksterordinarajn privilegiojn.

Ĉu la agrikulturisto-kazo estis tiel malsama ? Ĉu oni devis konsenti kiel postulaton, ke la komunigo de ilaroj, la koncentrado de la rimedoj, konvena pligrandigo de la farmareoj produktus en la agrikultura fako efektojn kontraŭajn al tiuj registritaj en la industrio, kiam la produktiveco disvolviĝis en ĉi-lasta? Alidirite, la grundparceligo, la metiistaro koncerne la agrikulturon, la malnoveco de la transportoj kaj de la metodoj, unuvorte la kamparana individuismo, ĉu ĉio tio devis esti konsiderata kiel progresfaktoro aŭ faktoro pri malprospero, pri dekadenco ?

En la agrikultura fako, Sinjoro Chester konfirmos tion al vi, daŭrigis Katarina, la nocio pri progreso malsimilas sufiĉe notinde tiun, kiun oni kutime ligas al la rendimentkresko. La agrikulturisto antaŭvidis sian rikolton rilate al la atenditaj enspezoj, kaj ne multe zorgis pri la realaj bezonoj de la konsumanto. Ĉe la nordafrikaj teritorioj ĉu oni ne vidis lin kultivi viton, rizon aŭ linon, prefere al hordeo kaj tritiko? Ĉu aliloke ne estis kutima praktiko elradikigi la vitojn kaj la fruktarbojn, redukti la semareojn, konservi "en naftaleno" la plej bonajn agrojn por ricevi la ŝtatsubvenciojn ?

La rigideco de la enspez- kaj prezinterrilatoj iam en la regulo instigis la agrikulturiston ĝoji pri la malbona sorto de la najbaro, ĉar ĝenerale ĝi kaŭzis plivalorigon de la aliaj rikoltaĵoj. Sed kiam en la tiama mondo unu miliardo kaj duono da malsatantoj malrapide ekkonsciis la absurdan maljustecon, kies viktimoj ili estis, estis ĝuste dum la jaroj kun superabundo

konsiderataj kiel la plej katastrofaj por la prospero de la produktantoj.

Hodiaŭ ĉio reordiĝis. La mono ne plu estas celo; ĉies plena sekureco estas certigita ĝis nivelo des pli alta ju pli granda estas la suma produktado, ne laŭ valoro sed en fizika volumeno, kaj la agrikulturista individuismo cedis antaŭ fortega solidareco-sento. La kampara loĝejaro moderniĝis. Ĉiuj farmbienoj nun posedas fluantan akvon varman kaj malvarman. La agrikulturisto pagas nek asekurkotizojn, nek impostojn, nek moninterezojn, nek havas jarrepagojn al la bankoj.

La vivo ĉe la kamparoj ĉesis esti tiu sklaveco, tiu pario-vivo, iam travivita de viaj samtempuloj subjugitaj por la mono. Neniu agrikulturisto hodiaŭ konsentus reveni al la pasinteco, denove dependi de la produktperantoj, de la meteostato, de la merkatsituacio kaj de la bankaj ukazoj. Fine la agrikulturisto sentas la kontenton labori por nutri siajn samspecianojn, dum iam li ofte devis malsatigi ilin por konservi sian propran enspezon.

- Do, mi diris, neniam plu troaĵoj ?

- Ho, jes, de tempo al tempo, respondis Katarina, ridetante pro mia disreviĝo. Sed, ŝi aldiris, tiuj troaĵoj ne plu havas la katastrofan karakteron iam imputitan al ili, ĉar la prezfalego nun ne tuŝas la produktistojn, kies enspezo ne plu dependas de la proviantvaloro. Ankoraŭ pli bone, estas ne plu la prezaltiĝo, sed la malaltiĝo sur la podetalaj merkatoj, kiu plibonigas ilian aĉetpovon same kiel tiun de ĉiuj konsumantoj. Kelkfoje okazas, ke iuj lokaj merkatoj estas plenplenaj. Fakte ni ne volis trudi al la agrikulturistoj harfendeman direktismon, kaj ni fidas al ili por decidi pri siaj kultivaĵoj kaj pri la produktotaj kvantoj. Multaj sin dokumentas ĉe la agronomiaj konsilantoj al ili disponigitaj.

La forta industriigo de la agrikulturaj produktadoj, la grandega disvolviĝo de la transportoj sub glaciigo, la aretoj de kargaviadiloj, la frostoĉenoj, ĉio tio ebligas ĝenerale eviti la perdojn en deponejoj, kiam iu liveraĵo ne estas tute vendita. Konservaĵoj, fruktosukoj, superglaciigo, konfitaĵuzinoj, ĉiuj tiuj procedoj almetiĝas al la multobligo de la konsumataj kvantoj dank'al ofte gravaj prezmalaltigoj kaj ebligas neniam rifuzi

rikoltojn. Niaj junulskipoj organizas rikoltgrupojn en la fruktoĝardenoj, kaj helpas al la rikoltado. La produktoj estas tuj transportataj el la komunumoj aù el la individuaj farmbienoj ĝis la lokoj por esti preparitaj, pakitaj, markitaj, kontrolitaj kaj distribuitaj.
- Ĉu la nombro de la farmbienoj ne multe regresis?
- Certe, respondis Katarina. Dum la lastaj tridek jaroj, ĉi tiu nombro de 800 000 venis al 120 000. Anstataù viaj 5 milionoj da agrikulturistoj, apenaù 1 miliono hodiaù sufiĉas por provizi niajn 40 000 komunumojn.

Revenis en mian memoron la kontraùmovoj iam estigitaj pro la decidoj celantaj malgrandigi la nombron de la agrikulturistoj, parcelokunigi, eksproprietigi pro nesufiĉa profitdono.

Responde al mia demando Katarina daùrigis :
- La tagon, kiam ni emeritigis kun plena enspezo la personojn atingintajn la kvindekan jaron, du milionoj da agrikulturistoj lasis siajn ilojn kaj disponigis siajn agrojn al la komunumoj, kiuj ekuzis ilin cele al agrikultura rekunigo. Tiel oni povis organizi la agrikulturon laù pli racia maniero laùskale de grandaj farmbienoj samtempe familiaj kaj komunumaj sub la egido de la ekzistantaj kooperativoj.
Niaj komunumaj farmbienoj multe disvolviĝis kopiante la ekspluatmanierojn ĝis tiam praktikatajn de la lernejoj, la hospitaloj, la punestabloj kaj de multnombraj malgrandaj kolektivoj, ankaù de la bienoj apartenantaj al la grandaj firmaoj, kiuj, de longe, laborigis salajratan laboristaron kaj administrantojn.
Entute la nova reĝimo nur ĝeneraligis la avantaĝojn tiritajn el ĉiuj tiuj komunumaj farmbienoj, kies produktoj estis samkvalitaj kiel la varoj produktataj en la malgrandaj individuaj farmbienoj.
Decidinte finkonduki tiun renovigon de profesio, en kiu la malŝparo de laboristaro kaj de rimedoj nepre aperis, la eminentulkomitatoj proponis al la troaj agrikulturistoj pli enspezigajn oficojn, kun transportfaciligoj, mallongaj horaroj kaj larĝaj jaraj libertempoj.
- Do, mi diris rigarde al Chester, neniu restus el la riproĉoj iam formulitaj de niaj agrikulturistoj kontraù la vasta komunuma farmbieno ?
- Verdire, li diris, ne tute temas pri komunuma farm-

bieno laŭ la koncepto de viaj socialistoj kaj komunistoj. Pli ĝuste estus konsideri, ke la malgranda familia farmbieno transformiĝis, post emeritigo de du milionoj da maljunaj agrikulturistoj kaj dank'al la el tio rezultinta parcelokunigo, en grandajn farmbienojn same familiajn.
Estis "komunumigitaj" - malbelega vorto, ĉu ne? - nur la rimedoj por ekspluati pli vastajn parcelojn kun ega tempoŝparo. Plie, ni utiligas kiel agrojn plurajn centmilojn da hektaroj da heĝoj kaj vojetoj, kiuj iam ĉirkaŭbaris multnombrajn etajn parcelojn, aŭ kondukis ĝis ili.
Ni reale socialigis nur la produktojn sen atenci al la rajto libere disponi kaj okupi la kamparan proprietaĵon. Ni ne forĵetis la agrikulturiston ekster lian agron, ni nur elektis la plej bonajn, la plej efikajn, kaj instigis la aliajn sin okupi pli utile, kun pligrandigita socia rendimento, kun espero pri pli grava gajno kaj pri vivkondiĉoj tre rimarkeble plibonigitaj.
- Ĉu vi kredas, mi insistis, ke estas progreso altiri al urboj jam hiperloĝataj kamparanojn kutimantajn al tamen pli sana vivo ?
- Sed, ekkriis Katarina, kiu diras al vi, ke ni faris tion ? Ĉu vi ne miros ekscii, ke la plimulto de la tiel reenoficigitaj agrikulturistoj ne bezonis forlasi sian loĝlokon ? La intensa disvolviĝo de la utilaj laboroj proksime de ĉiu kampara komunumo fakte ebligis al preskaŭ ĉiuj konservi sian revenpunkton kaj siajn kutimojn. Malgrandaj individuaj helikopteroj faciligas, kiam la vetero konvenas, ilian veturadon al la komunumoj 50 kilometrojn ĉirkaŭe. Ni ne plu bezonas sendi niajn laboristojn laŭ miloj aŭ centoj da kilometroj por doni laboron al ili. Liberigite de la laboroj sur la agroj, ili povas helpi ekzemple al la modernigo de sia propra loĝejaro, alkonduki akvon kaj gason en ĝin, ĉirkaŭigi ĝin per plezurĝardeno. Niaj kamparoj similas tiujn de Nederlando. La tie travivata vivo proponas al ĉiu la samajn distrojn, la saman libertempkvaliton kiel tiu de la urbanoj, kiuj pli kaj pli fiksiĝas sur la kamparo. Pro tio la virina ekzistado transformiĝis. Por ekipi la farmbienojn, por malpezigi la senutile penigan laboron, necesis ne kreditoj sed nur organizado de la enoficigo. Tiu organizado ebligis do al ni ellabori la bezonatajn

ilarojn, kaj krei tiun agrikulturan internan strukturon, dank'al kiu niaj agrikulturistoj povas finfine sin konsideri kiel plenrajtajn civitanojn.
En niaj lernejoj hodiaŭ ni preparas agrikulturistojn spertigitajn al la modernismo, kaj kiel teknikistoj vivas niaj kamplaboristoj fariĝintaj instruitaj, kulturitaj, disponantaj feriojn, libertempojn kaj realan sekurecon, helpataj en siaj laboregoj, konstante strebantaj plibonigi siajn labormetodojn, elimini la neutilajn laciĝojn kaj produkti belajn rikoltojn kun plej bona kvalito.
- Sed fine, mi ne povis deteni min rimarkigi, ĉu tiu idilia vivo promesita al viaj agrikulturistoj ne estigis ĝeneralan alfluon al la grundo de la uzinlaboristoj enfermitaj en la bruo, en poluita atmosfero? Kion vi faras fronte al la ir-revenoj de tiu "laboristarkargo", kiu, laŭ la vetero, la lokoj, la cirkonstancoj, mi antaŭvidas, nepre preterpasas de unu flanko al la alia en la ekonomia ŝipo ?
Mia amiko respondis :
- Vi metas demandon, kiu priokupis nin, kiam ni nesciis la reagmanieron de la laboristaro al la influoj de tiu tamen tre fleksebla planizado de la laboro gvidata per monpremioj.
Sufiĉe rapide tamen ni konstatis, ke fakte necesas fortegaj motivoj por elradikigi iun familion de la loko, kie ĝi estis fiksita, dum, male, la migradoj de junuloj, de fraŭloj, ne multe starigas akceptproblemon. Sed neniam venis al ni la ideo, ke necesus antaŭvidi, laŭ la valoro de la proponitaj monpremioj, la nombron de personoj, kiuj, posedantaj la determinitajn kvalifikojn, konsentus ŝanĝi la loĝlokon aŭ la laboron. Tio ĉi estis nur teoriumado fare de viaj teknokratoj.
Empirie ni alĝustigas la sumon de la monpremioj, kaj la homskala administrado de niaj komunumoj facile ebligas la rektajn homajn kontaktojn. Ni uzas la persvadon kaj ankaŭ kompreneble la personan profitemon, tiun neanstataŭeblan instigilon, sed neniam policajn trudojn por alvoki la laboristaron, kie ĝi ŝajnas la plej necesa.
Via merkatekonomio, ŝajne libera, uzis altrudojn multe pli barbarajn por **direkti** la laboristaro-movadojn laŭvole de la investistoj, kiuj senĉese serĉadis la

plej bonan produktivecon de siaj kapitaloj kaj neniam estis embarasataj pro humanaj konsideroj. Lerte okazigitaj senlaborigoj ĵetis kun bagatela monprovizo la laboristaron sur la vojojn por serĉi alian laboron kelkfoje respondantan nur malmulte al la kvalifikeco de la koncernato, ĉar oni ne povis vivi sen ĉiutage plenumi almenaŭ okhoran laboron. Certe tiu procedo, amputante la enspezon por instigi la koncernaton elmigri, evitis alvokon al la policisto aŭ al la ĝendarmo, sed la trudo fine estis same brutala, same malhumana. Tiu zorgo sekurigi al la kapitalo la plej bonan profiton iam daŭrigis imponan **karavanismon** destinitan teni vian ekonomian ŝipon sur ĝia floslinio.
Hodiaŭ la individuigo de la monpremioj ebligas al ni distribui la enoficigon laŭ la tuta dezirata fleksebleco, reguligi plejeble bone tiujn "karg-balanĉiĝojn".
Iam la entreprenoj ne dungis pli ol la personaron deziratan per sia planizado. Nun okazas same. La agraro mobilizas nur la kontingentojn, kiujn ĝi strikte bezonas por esti kulturata kun plej bona rendimento, kaj tio antaŭ ĉio dependas de la grundnaturo kaj de la adaptebla kultivaĵo.
La grupagrikulturo nature kondukis al redukto de la laboristaro, kvankam iuloke la laboroj estas farataj de pluraj skipoj por al ĉiu el ili malgrandigi la labordaŭron. Tamen monpremioj estas plu proponataj dum la krizaj epokoj aŭ okaze de esceptaj cirkonstancoj. Ĝenerale la komunumoj aŭ la entreprenoj, kiuj postulas laboristaro-suplementon, avizas pri tio la ĉirkaŭan loĝantaron, kaj haltigas la rekrutadon, kiam la necesa personar-nombro estas atingita. Cetere tiuj "anoncetoj" ofte okazas per la radio-ĉenaroj.
Tamen vi rimarkos, ke la laboristar-movoj estas multe malpli ampleksaj ol iam pro, unuflanke, forigo de amaso da aktivadoj, pro la fakto, aliflanke, ke ĉiu vilaĝo de nun kapablas **utile** laborigi la plej grandan parton el sia disponebla laboristaro proksime de ĝia kutima loĝloko, fine kaj ĉefe ĉar la enspezoj ne plu ligiĝas al la labordaŭro, nia Ekonomio povas toleri ian ajn gradon de senlaboreco sen pro tio vidi la **utilan** produktaron stulte restadi malantaŭ la magazenaj montrofenestroj, atendante aĉetontojn, kiuj iam havigis al si tiun titolon nur je la nepra kondiĉo plenumi plentempan laboron.

## ĈAPITRO XXV
Transirado al la komunuma ekonomio

Iun matenon, estis feliĉiga surprizo por ĉiu konstati gravajn prezmalaltiĝojn, dum la komercistoj ne ŝajnis maltrankviliĝi pro tio, dum ne temis malgrandigi la enspezojn de iuj aŭ de aliaj.
Tio estis nekredebla sciigo, kaj multaj personoj antaŭvidis aperadon de la simptomoj anoncantaj grandajn krizojn. Oni ne plu diris : "Haltigu la superproduktadon!" sed "Produktu utile sen zorgi pri la merkatoj. De nun ni havas pli da klientoj ol ni povas kontentigi!" Ne plu temis pri profitdono, sed nur pri individua utileco, kolektiva utileco.
- Ĉu vi diru al mi, mi alparolis, la rimedojn, kiujn vi uzis por realigi vian mirigan revolucion ?
Katarina rigardis al Chester :
- Ni petu de nia amiko rakonti tiun longan historion bone konatan de li.
- Mi ne scias, diris Chester rigarde al Katarina, ĉu mi faros tion kun pli da talento ol vi. Fakte miaj gepatroj kaj mi streĉe batalis tiuepoke, kiam la ĝenerala indiferenteco estis la plej forta bremso al ĉia reformprovo. La kondiĉigo de la individuoj atingis tiel grandan perfektgradon, ke viaj samtempuloj interesiĝis preskaŭ nur pri sportoj, kanzonetoj kaj tamtamo, nutrante sian spiriton per plorinde nebonaj literaturo kaj spektakloj, envolvitaj de mateno ĝis vespero en la reklamada tumulto, kaj la histeria vivo travivita de la plimulto el ili senkapabligis ilin pripensi siajn proprajn problemojn La socialistaj skoloj kun siaj troigoj fine fuŝis siajn ŝancojn. Tamen tiuj, kiuj sin pretendis socialistoj, reale ne plu estis revoluciuloj. Ili deziris nur forpreni de la privatuloj la iniciaton kaj la respondecojn, anstataŭigi la privatan mastraron per burokrata ŝtato, kaj parolante pri naciigo de la bankoj kaj de la kredito, ili tute ne antaŭvidis la forlason de la monaj strukturoj. Certe, ili agnoske intencis utiligi ilin por celoj provizore

sociaj, sed poste nenio malhelpus la malnovajn bankgrupojn denove kolonii la ŝtaton per siaj fideikomisuloj. Cetere, ĉu ne estis rimarkinda la nekaŝita simpatio de la bankmedioj por la socialistaj respondeculoj, al kiuj tiuj medioj permesis aliron al altaj postenoj en la ŝtato, eniron en multajn administradkonsiliojn, aŭ belajn sinekurojn en la internaciaj organizoj.
Ĉar la socialismo tamen estis laŭmoda, akordo tiel estis trovita inter la socialismo kaj la kapitalismo. Estis speco de socialisma kapitalismo, kiu uzis la ŝtaton kiel kason oportune provizatan de la impostpagantoj, kontentigante ambaŭ fakojn : la planoj rezervis kelkajn avantaĝojn al la malfavoratoj, oni konstruis lernejojn, oni entreprenis grandajn realigojn, kiuj donis profiton unue al la entreprenoj kontraktintaj kun la ŝtato. Same ĉiu ardiĝis por la helpo al la subevoluintaj nacioj, kio sekrete kontentigis la grandajn societojn elektitajn por provizi la helpon, kaj kiuj laboris aliance kun la banka kredito kaj la ŝtatgarantio. Granda prospero ŝajne regis, la enoficigo estis certigita kaj la neceso pri ekonomia transformado ne prezentis urĝecon tiel gravan kiel dum la epokoj de la grandaj krizoj, kiuj senigis la familiojn de ties enspezoj. La tuta banka taktiko do konsistis vivigi la ekonomian aktivecon, t.e. la interŝanĝojn, tiel teni la enoficigon sur nivelo ne danĝera por la mono.
Iom poste, pro la teknika progreso, la produktalfluoj fariĝis pli oftaj kaj alarmis la produktistojn kaj ties pruntedonantojn. Tiuj produktalfluoj jam atingis la agrikulturon, malmulte protektatan kontraŭ tiu danĝero. Kelktempe oni vidis esprimiĝi la plej stultajn ideojn cele jugi la nedezirindan abundon. La agrikulturistoj miskonsilataj, atakis la rezultojn, vole ne akuzante la kaŭzojn de siaj zorgoj, ŝajne ne ekvidante, ke nur la maniero starigi la enspezojn estas la fonto de tiu strangega situacio, kiun ili devas alfronti. Ju pli ili produktis, des pli ili malriĉiĝis, dum al milionoj da konsumantoj konstante mankis nemalhaveblaĵoj.
Imitante Usonon, oni eĉ kreis "grundbankon", sed necesis rapide forlasi tiun maltusanan solvon, kiam la informado sciigis, ke oni propravole senkulturigis la plej bonajn agrojn, dum multegaj popolanoj restis turmentataj per malsato. Gravis nur doni pagrimedojn al la amasoj da nekontentigitaj konsumantoj kaj starigi

la taŭgajn rimedojn por transporti laŭ la plej bonaj kondiĉoj de rapideco kaj higieno la nekonserveblajn proviantojn proksime de la lokoj, kie ili povas esti konsumataj.
Tiu duobla agado levis financan problemon praktike nesolveblan, almenaŭ tiel longe dum la strukturoj restus neŝanĝitaj.
Paralele al la kamparana agitado, la malkontento kreskis preskaŭ ĉie, dum ĉiu fine ekvidis, ke la partaj kontentigoj konsentitaj de la publikaj instancoj ŝanĝis nur la polusojn de la malkontenteco. Tiel okazis kontinua superproponado sub la egido de la politikaj partioj, sen unuapaŝa plenumado en la serĉado al daŭraj solvoj.
Tiun paralizon de la revoluciuloj kaŭzis precipe la divido de iliaj trupoj en partioj kaj sindikatoj konkurencaj aŭ malamikaj, disigo dank'al kiu plu daŭris la kuratoreco de la ekonomia povo super la politika agado.
Dum la sindikatoj eluzis siajn fortojn por postuli mikroaltigojn de salajroj, sen praktikaj rezultoj ĉe la vivniveloj, ĉesis varbiĝi iliaj aktivuloj malkuraĝigitaj pro vana batalo. Kaj, ĉar tiuepoke neniu konsideris kiel eblaj solvojn marĝene de la tiama ekonomia kadro, la etaj plipagoj forprenitaj dank'al la sindikata agado montriĝis rapidege sorbitaj pro la prezaltiĝoj. La mastraro, sekurigita per la merkatoj proponitaj de la ŝtato, neniel konsentis preni sur sin tiun malavarecon.
Siaflanke ĉiuj politikaj partioj ludis la konservatismo-karton, eĉ via kompartio, kiu preterlasis ĉiujn agad-okazojn, volante agi, diris ĝiaj gvidantoj, nur kondiĉe kunigi 100 % da sukceso-ŝancoj, ĉar fiasko signifus senkapigon de la movado kaj ĝian duonaktivecon dum kvindek jaroj, kio devigus ĝiajn respondeculojn al malfacilaj reenoficigoj. Cetere, dum la lastaj jaroj de via reĝimo la agado de tiu partio fariĝis preskaŭ kvieta, ne multe revolucia. La komunismo servis nur kiel timigilon por akceptigi la kapitalismon kiel plej malgrandan malbonaĵon.
Do necesis al ni trovi komunan denominatoron kapablan kunigi vastajn amasojn ĉirkaŭ celoj facile kompreneblaj. Certe ĉiu agnoskis la mankojn kaj la neperfektaĵojn de la kapitalismo kaj de la socialismo. Tamen ĉiu

sistemo fanfaronis pri sia feliĉo-marko. Se la kapitalismo alprenis la entreprenliberecon - libereco ja formala, ĉar ĝi plenumiĝis sub la gardema gvidado de la bankieroj, estroj de la kredito - siaflanke la socialismo notinde malgrandigis la sociajn maljustaĵojn, alportis la amaskulturon, permesis aliron al vivnecesa minimumo por ĉiuj. Sed ĝia burokrata diktaturo restis peza, baranta multajn iniciatojn. La ekspansio plu disvolviĝis dank'al la disvastiĝo de la eksterlandaj merkatoj, kiuj kun la armiloj certigis al la entreprenoj esperojn liberigitajn de la abundeco-minaco.
Tamen en la okcidentaj landoj la entreprenlibereco estis pli kaj pli uzata por amasigi la enspeznaskajn investojn, sed malpli kaj malpli por servi vere **utile** al la kolektivo kaj al la individuoj. Kun sia hipertrofia buĝeto la ŝtato ne tiam servis kiel ĉefa kunlaboranto al la privataj entreprenoj. Temis pri efektiva socialigo de la merkatoj, kies manko devigus multajn entreprenojn bankroti kaj maldungi sian personaron. La tiuspeca kapitalismo evoluis al socialismo sun banka kuratoreco, tamen daŭre konsentante al la privataj societoj la privilegion decidi mem pri la enspezo de siaj administrantoj. Kvankam, verdire, ne plu estis risko en entreprenado, plu estis supozite, ke la profito kompensis riskon, kies malaperon oni agnoskis.
Dume la revoluciuloj serĉadis agadmanieron, pri kiu konsentus la popolamasoj. Post multnombraj fiaskaj provoj, ni konservis la postuladon pri konsumado, kaj fakte estis ĝi, kiu sufiĉe rapide aliigis la malkontentecojn, kiuj ĝis tiam manifestiĝis tra misformantaj vitroj. Kaj oni ekvidis kiom fulme efika riveliĝis la agado de la konsumantoj organizitaj en sindikatoj. La revolucioj plu celis nur redistribui la riĉaĵaron sen videble modifi la normalan procentaĵon koncerne la kreskon de la riĉeco mem, de ĝia konsumebla parto. Por la plejparto el la revoluciuloj, la konkero de la ŝtato reprezentis la unuajn kaj ofte eĉ la nuran celon. Poste oni elturniĝis, oni improvizis, aŭ oni tutsimple reprenis la jungilaron de ekonomia povo, kies postvivado firmiĝis tra la faritaj ŝanĝoj.
Taŭga rearanĝo de la impostado, buĝeta ĝisdatigo, anstataŭigo de la politika personaro, postenŝanĝo de la altaj ŝtatoficistoj, maldungo de la kontraŭuloj, distribuado de rubandoj kaj rozetoj, de tabakvendejoj,

de etkostaj luloĝejoj al la protektatoj de la duagradaj voĉdonantoj, de eksterlandaj misioj, de postenoj por administrantoj kaj konsilantoj, de sinekuroj por la filoj, bofiloj kaj nevoj de la jam surpostenigitaj amikoj, tiel aspektis la klasika bilanco de la revolucioj kun politika celo, ĝenerale instigitaj el la interno aŭ el la ekstero, kun la financa helpo de la antaŭviditaj profitontoj, de tiuj, kiuj atendis el la nova reĝimo doganan protekton, avantaĝajn tarifojn, malgrandigojn de la taksoj, subvenciojn aŭ ege profitdonajn merkatojn. La konkero de la ŝtato tiel restis la ŝlosiloperacio destinita rompi la oponojn neeviteblajn en la tendaro de la senigitoj. Sed nek la parlamentisma vojo, nek tiu de la perforto povis alporti al ni la plej etan helpon por ŝanceli la ekonomian povon, en niaj tiamaj duone-burĝiĝintaj respublikoj, fortege policigitaj, destinitaj al la internaj malakordoj, kaj en kiuj la mono estis ĉiam la lasta parolanto.
La originaleco de la "komunumeca" modelo sidis en la malapero de la antagonismoj, de la profitrivalecoj. Tiel sufiĉis konigi al ĉiu ĝiajn dispoziciojn koncerne lian propran situacion, por ke la modelo estu akceptita de ĉiuj, je kosto de nur malgrandaj modifoj. La konkero de la ŝtato do fariĝis tie superflua operacio, ĉefe se la posedantoj de la ekonomia kaj politika povo instal-itaj ĉe la "decidcentroj" siavice ekvidos, ke la anstataŭ-iga modelo minacas nek ilian nunan vivnivelon, nek iun ajn el iliaj atributoj, tiujn ŝuldatajn al la povtenado. Gravis do, ke la decidcentroj estu informitaj, kaj tiucele, ke opiniŝanĝo kaptu ilian atenton por direkti ĝin al **reala** konstruado etskala, reproduktanta ĉiujn karakteriz-aĵojn de la "modelo".
Kion fari por ekkomenci tiun opinimovadon, por komuniki al ĝi sufiĉan amplekson ? Tie temis malpli renversi la ekonomian povon ol asigni al ĝi aliajn celojn, postuli de ĝi novajn metodojn por administri la produktaparaton liberigitan de la financa strangolringo, ree dediĉitan al utilaj celoj respondantaj al la homaj bezonoj, pripense kaj inteligente uzatan por la plej bona rendimento, fine ebligi la libertempdaŭrojn sen enspezperdo.
Kompreneble, tiel esceptaj celoj staris ekster la deca skizo kolorigita de reformismo, sur kiu plu krajonis politikaj partioj kaj laboristaj sindikatoj. Tial por atingi tiujn celojn estis riske, krom kelkaj esceptoj, kalkuli

pri kunlaboro de la staboj estrantaj grupojn malpli priokupitajn unuigi ol dividi la amason de la senigitoj.

*

Kontraŭe al la regulo, kvankam ĝi komence enhavis nur kelkajn personojn, la unua grupo de konsumantoj kaj uzantoj aperis sub la formo de federacio.
Kiam la statutoj estis deponitaj, la movado perdis sian tempon nek por kolekti kotizojn, nek por streĉiĝi en publikaj kunvenoj. Ĝi disdonis neniun flugfolion, ĝi provis nur akiri, unue, la aniĝon, tutsimbolan kaj kompreneble senpagan, de kelkaj grupoj de izolitaj uzantoj, kies agado ĝis tiam montriĝis senefika : misloĝataj personoj, emeritoj kaj vidvinoj de modestaj pensiuloj, enkaĝigitaj luantoj de etkostaj loĝejoj, familiaj asocioj, asekuruzantoj. Kaj la movada komitato kunvokis unu post la alia la estrojn de la ĉefaj organizoj jam havantaj pinjonon sur strato, cele ekscii pri iliaj reagoj.
Ĉar la Federacio, helpata de bone elprovita organizo forte strukturita kaj kovranta la tutan landon, interalie sukcesis varbi unu el la laboristaj sindikatcentraloj, ĝi de tiam povis etendi sian rekrutadon en la medioj ĝis tiam rifuzantaj ĉian sindikatismon, rekrutadon, kiun same profitis la priparolita Laborista Centralo tiel fariĝinta rapide la plej grava el la premgrupoj. Ĉar ĝi per tiu vojo krome ricevis la mandaton de deko da aliaj grupoj, eblis al la Federacio postuli lokon sine de la grandaj komisionoj, regione kaj nacie, kaj la nepraj intervenoj de ĝiaj reprezentantoj tre rapide altiris la atenton de la publiko, ĉar la gazetaro devis ripeti kaj disvastigi la tie faritajn deklarojn. Poste la federacio estis invitita partopreni kelkajn kolokvojn, el kiuj iuj okazis antaŭ la televiziaj kameraoj, aliaj ĉe la radioelsendado ; tiel plilarĝiĝis ĝia famo en la publiko.
La regionaj ĵurnaloj volonte fariĝis la komunikilo de ĝiaj anoncoj. Tiel estis publikigita alvoko al la municipoj limigitaj koncerne la kreditojn, cele partoprenigi ilin al absolute neŭtrala eksperimento agnoskanta la uzadon de "paralela mono".
Tiucirkonstance temis atingi de la organizoj stokantaj la "troaĵojn" liveri al la elektita komunumo certan kvanton da nutrovaroj destinitaj por la transvendado

je la kurantaj prezoj en la komerco, al iuj rajtigitoj: municipaj salajruloj, parte senlaboraj personoj, maljunuloj, bezonantaj familioj, lernejaj kantinoj, emeritoj kun pensieto. Kiel pagrimedojn oni donis al tiuj profitantoj personajn kreditkartojn 50-, 100- aŭ 200-frankajn, starigitajn de la komunuma aŭtoritato mem, disdonitajn je la momento de la aĉetoj kaj konsideratajn kiel salajro- aŭ krompagosuplementon. La elektado de la profitantoj, la taksado kaj se necese la kontrolo de iliaj rajtoj devis okazi laŭ la iniciato de eminentulkomitato tiuokaze starigita.
En varianto de la klarigita metodo, la komunumoj povis ankaŭ sin turni rekte al la lokaj produktistoj, aĉeti iliajn "troaĵojn" je la produktokostoj, tiucele uzante frakcion de la kreditoj normale dediĉitaj al la komunumaj laboroj. Poste ili kreis kreditmason el paralela mono, enskribita sur kreditkartoj laŭ sumo respondanta **proksimume** al la entuta valoro de la varoj vendataj je la prezo ĉe la pomalgranda komerco, en specialaj ejoj administrataj de ŝtatoficistoj aŭ de emeritoj.
Tiel la komunumoj retrovis en salajro- kaj krompagosumoj kreditvolumenon tre superan al tiu dediĉita por aĉeti la troajn proviantojn ; tiucirkonstance ili rolis kiel aĉet- kaj vendkontoron. Se je iuj epokoj kelkaj proviantoj vendiĝis tro malrapide, la prezoj tiukaze povis sen malavantaĝo malaltiĝi por serĉi la konsumonton ĝis la romplimo de la reprovizadoj. Estis evidenta la helpo alportita per mono de tipo "kreditkarto" garantiata per la produkto-troaĵoj ; la komunumoj, kiuj uzis ĝin, tiam povis fari utilajn laborojn, kies realigon la manko de monenspezoj antaŭe malebligis.
La unuaj komunikaĵoj publikigitaj en la loka gazetaro bone reklamis por la iniciatintoj de la operacio "paralela mono", kaj nepre vekis intereson ĉe la najbaraj komunumoj aŭ regionoj.
Dume oni streĉe laboris sine de la lokaj sindikatoj kreitaj sub la federacia egido. Skizoj estis ellaboritaj. Okazis diskutkunvenoj. Ĉu la ekonomia revolucio efektiviĝu desupre aŭ desube, per la teknokrata vojo aŭ sekvante la demokratan vojon ?
Organizita kiel premgrupo, la Federacio tiam kunordigis serion da manifestacioj post atingo de siaj

unuaj sukcesoj okaze de magistrataj balotoj, kiuj ebligis konkeri tribunon al kelkaj el ĝiaj membroj: prezentado de postulkajeroj, peticioj kontraŭ la malŝparaĵoj, enketoj pri la prezoj, aĉetstrikoj.
Koncerne la aĉetstrikojn, anoncitajn al la loĝantaro per la elsendoj de "periferia" radiostacio, ĉi tiuj origine estis nur tute simbola ago. Antaŭviditaj por atentigi la Publikajn Instancojn, por trudi al ili la dialogon, ili manifestiĝis sub la formo de ĝenerala ĉesigo de la aĉetadoj, dum daŭro de kvaronhoro ĝis horo, je la fiksita tago. Dum tiu plilongigita "silentminuto" la konsumantoj konsciis sian solidarecon kaj la nerezisteblan fortegon potencialan de tiu absoluta armilo, la aĉetstriko, de la tago kiam ĝi lokiĝus, kiam ĝi fariĝus "alterna".
Flankite de ekspertoj, de juristoj, konsultate pri la programenhavoj, la enspezpolitiko, la statistikaj indicoj, la tarifado, la Federacio baldaŭ stariĝis kiel la premgrupo plej kohera, plej fortega, tiel ke ĝia influo montriĝos decidiga dum la prezidentbalotoj okazontaj kelkajn monatojn poste.
Tiu agitadfazo, ni vidis tion, neniel celis malbonigi daŭre la rilatojn inter senigitaj konsumantoj kaj provizitaj konsumantoj, sed ĝi volis nur atingi, ke decidcentro kunvenigu studkomisionon por alĝustigi novajn strukturojn, kies unua "modelo" jam estis ellaborita sine de la Federacio.
Pli rekta agado paralele estis daŭrigata ĉe organizoj frekventitaj de inteligenta kaj sincera elito ligita al la "decidcentroj", organizoj starantaj ĉe la ĉarniro de la Povo, de la teknokrataj medioj kaj de la produktadanimantoj : bankieroj, industriestroj kaj altaj ŝtatoficistoj.
Spontane logite de la modelo al ĝi proponita, iu el tiuj organizoj entreprenis alproksimiĝon de la "efikeculoj" sur la supra rango, kies nombro ne superis du dekduojn. Estis malmulte kosta agado, interesa, ĉar ĝi ebligis preterpasi la etapojn, evitante al ni helpalvokon al la amasorganizoj.
Necesis nur, ke tiuj "efikeculoj" akiru tiun certecon: la nura maniero konservi siajn privilegiojn estas preni en siajn manojn, de la komenco, la gvidrimenojn de la nova ekonomia organizado.
Se tio okazus, ni povis supozi, ke ilia propra intereso

kompreneble komandus al ili fari ĉion eblan por **konservi** la novan sistemon. Same, kiel ili sciis ĝis tiam defendi kontraŭ ventoj kaj tajdoj, meze de mil danĝeroj, siajn privilegiajn poziciojn kaj la enspezojn de siaj prokurdonantoj, verŝajne ili plu agus same sine de la novaj institucioj, se ties ŝlosilojn oni konfidus al ili.

Kompreneble, la ekstremismaj partioj kaj movadoj mokis tiajn vidpunktojn, dirante ke la akirita sperto atestas favore al amasagado bazita sur klasbatalo, kvankam tio estis stranga maniero koncepti la ekfunkciigon de interhelpa Ekonomio.

Tiu malsameco de vidpunktoj tamen efikis, fortigante ĉe la decidcentroj la konvinkon, ke ili devas preterlukti la ekstremistojn, kies nekaŝitaj intencoj super ĉiu ŝvebigis gravan minacon de nesekureco. Kaj tiel je la dekunua horo ni disponis pri la propagandaparato mobilizita dank'al la sperto de tiu "inteligenta kaj sincera" elito.

Okaze de malsukceso, la sindikatoj antaŭvidis ankaŭ provigi la "modelon" en najbara socialisma lando, kie ĝia funkciigo starigis absolute neniun problemon. Intertempe okazis, ke la kandidato elektita de la Federacio por la prezidentbalotado atingis la postulatajn voĉdonojn. De tiam la batalo estis virtuale gajnita.

Al la voĉoj de la senigitaj konsumantoj almetiĝis tiuj de la bonkonsciencaj katolikaj medioj, tiuj de la kamparanoj kaj, nekredebla fakto, de la milionoj da komunistaj voĉoj, plus grava voĉnombro de ĝis tiam kutimaj sindetenantoj en la balotadoj.

Verdire tiuj balotadoj ne okazis sen incidentoj. Iu "konservativa" opozicio, ĉion riskante, uzis en la turniro la tutan arsenalon de la balotadruzoj, tiel klasikaj en viaj tiamaj pseŭdodemokratioj. Ĉar ili konsideris la gravecon de la rezulto, la revoluciaj fortoj nepre devis uzi similajn ruzojn por lukti kontraŭ la nelojalaj manovroj, kiuj riskis falsaranĝi la balotadon, misŝanĝi ĝian sincerecon.

Al la propagandaj radioelsendoj eĥis "pirataj" elsendoj; nokte la muroj, la ŝoseoj, la trotuaroj kovriĝis per sloganoj, desegnoj, signoj, direktivoj.

Dum la kunvenoj, porteblaj radioelsendiloj animataj de ekstere, ligitaj al fortegaj laŭtparoliloj lokitaj

en la kunvenĉambroj surkovris la voĉon de la oratoroj, aŭ alparolis ilin meze de iliaj diskursoj, aŭ ankaŭ igis tiujn diskursojn neaŭdeblaj, kaj kompreneble la ridantoj estis niaflanke. Aroj da veturiloj tutĉirkaŭitaj per banderoloj ĉiuhore cirkulis sur plej frekventataj arterioj de la urboj, promenigante la sloganojn de la Federacio. Necesis **ĉiapreze** gajni la batalon profitante de la konstituciaj dispozicioj, kiuj eble ne ekzistus poste.
Al tiu agado, je la limo de la leĝeco, kuniĝis tiu de la ekstremismaj movadoj, agado malaprobata de la niaj, sed kiu eble kontribuis al la fina rezulto. Gazetpresejoj kaj televiziaj reelsendiloj estis sabotitaj, antenmastoj estis segitaj kun sia stajaro, urnoj bruligitaj. Ĉar nia celo estis konvinki, ne timigi, ni ne povis aprobi tiajn detruojn, kaj la demando restas, en kia mezuro ĉi-lastaj kontribuis al la misorganizado de la kontraŭbatalanta propagando.

## ĈAPITRO XXVI

### La Tago T.

### Eksperimentado de paralela mono

La komisiono starigita ekde la balotadmorgaŭo interalie enhavis kvin inĝenierojn membrojn de la Federacio. Ĉar ili estis spertigitaj per la praktiko, ĉiutage alfrontante problemojn multe pli malfacilajn, tiuj inĝenieroj, helpataj de sociologoj, de psikoteknikistoj, de specialistoj pri homaj sciencoj, rapide familiariĝis kun la ekonomiaj donitaĵoj.
La ellaborita "modelo" montriĝis nekompareble pli logika kaj ĉefe pli simpla ol la komplikaj planoj, kiuj ĝis tiam konsistigis la panon de tiom da reformistoj. Restis elprovi ĝin, poluri ĝin, "fini" ĝin, ĝin adapti al la specialaj kazoj.
Tiucele iu el la unuaj laboroj de la komisiono estis determini la "homologajn grupojn", t.e. la kategoriojn de individuoj posedantaj ĉu la saman socialan kondiĉon, ĉu la saman vivmanieron, ĉu la samajn interesojn. Tiu nova apartigo distingis ekzemple la hejme restantajn virinojn en modesta situacio, la patrinojn kun multana familio, kies apartaj problemoj notinde ne similis al tiuj de la fraŭlinoj, la malaltrangajn ŝtatoficistojn, la altajn ŝtatoficistojn, la fiŝistojn, la agrikulturistojn posedantajn sian grundon, ties sezonajn laboristojn, la oficistojn ĉe la notarioj, la ĵurnalistojn, la kuracistojn ktp. Tiuj kategorioj estis sufiĉe multaj, ĉar el iu ĉion akceptanta fako konstante ekaperis kelkaj unuoj, kiuj malkovris inter si samajn interesojn.
Temis, vi divenis tion, studi la manieron harmoniigi ĉiujn tiujn interesojn ĝis tiam diversdirektajn. La konsultadoj okazis sub formo de skribitaj konferencoj, Datlimo de dek-kvin tagoj estis lasita al la grupdelegitoj, kiuj poste prezentis siajn kritikojn kaj sugestojn pri la projekto al ili submetita, koncerne la skempunktojn, kiuj pli speciale interesis iliajn komisiintojn. Kiam obstaklo aspektis malfacile venkebla, la komisiono

laùvice kunvokis iun aû alian inter la grupdelegitoj, petante de li pozitivan sintenon.

- Kion vi subkomprenas, mi diris, per pozitiva sinteno?

- Mi komprenas per tio, respondis Chester, ke oni interdiskutis ne por refuti iun principon, sed por studi kiel ĝi povas akcepti apartan kazon precizan.

- Tiel, mi insistis, la principoj estis starigitaj, neniam plu temis ŝanĝi ilin. Sed kiuj estis la principoj tiel starigitaj ?

- La unua el tiuj principoj koncernis la urĝan neceson finpretigi novan ekonomistrukturon. Multegaj problemoj koncernantaj pli kaj pli densajn socitavolojn ne estis solvitaj, kaj la atenta analizo de iliaj donitaĵoj finkondukis al formeto de la hipotezo, ke ties solvo estas trovebla en la tiama strukturkadro.

La procentaĵo da nekontento por la plimulta konsumantaro ne nur senĉese altiĝis, sed la disvendado de iuj bienoj daùre montriĝis nekredeble malrapida fronte al multego da urĝaj bezonoj. Kvankam la detalistoj konsentis rabatojn, la t.n. "merkatprezoj" situis, koncerne tro da produktoj, sur niveloj ĉiam tro altaj por la plejparto el la familiaj buĝetoj altiritaj per multegaj novaj bezonoj. Tiel la produktaparato funkciis nur laù relative malgranda parto de sia maksimuma kapablo.

Konsekvence necesis senhezite prikonsideri la forlason de tiuj strukturoj, kiuj estis preterpasitaj, kaj kiuj funkciis por la utileco, por la komuna bono, nur je la epoko kiam la merkatoj samtempe utilaj kaj profitdonaj restis larĝe malfermitaj. Tiuj strukturoj nun postvivis nur dank'al la maltusanismo, la reklamindustrio, la intervenoj de la ŝtato, grandegaj malŝparoj, kaj ĉefe dank'al la militoj, ties preparado kaj sekvaĉoj. Do fariĝis necese kaj urĝe organizi alian manieron por formi la enspezojn, manieron, kiu ebligu al la prezoj libere varii por ekvilibri, sen teknike pravigita malfruo, kun ĉio, kiu ŝajnas laù materiala ebleco produktota por la individua kaj kolektiva utileco. Post akcepto de tiu unua principo, oni devis prikonsideri duan : la respekton, kiun ni hodiaù atingis, de la de vi konataj celoj : la uzadon de la teknika progreso por plilongigi la libertempon, la malpliigon de la sociaj maljustaĵoj, la starigon de hierarkia rango bazita sur aliaj kriterioj ol tiuj de profito, kriterioj, kiuj

tamen certigas la bazojn por sana konkuremo en la laboro serve al abunda kaj bonkvalita produktado. Post ses monatoj, dum kiuj la delegitoj de la soci-ekonomiaj grupoj estis unu post la alia aŭskultitaj, la novaj institucioj estis referendume akceptitaj. Tamen restis **provi** la skemon kiel por nova ŝuo, kaj la komisiono, antaŭ ol sen reveneblеco meti la nacion en la aventuron, deziris, ke oni kelkloke eksperimentu laŭ eta skalo. La iniciatintoj opiniis, ke tiaj eksperimentoj utilos kiel testoj por samtempe pulsopalpi la publikon kaj alĝustigi iujn detalpunktojn neeviteble stariĝintajn dum la unuaj aplikoj de la nova sistemo.
Ĵus mi rimarkigis al vi, ke dum la monatoj antaŭ la prezidenta balotado, iuj uzantosindikatoj, anoj de la Federacio, uzis similajn testeksperimentojn por altiri la atenton de la publiko. Por la registaro temis fari tiujn eksperimentojn vastigante ilin al geografiaj unuoj pli kaj pli grandaj.
- Mi memoras nur la principon de tiuj operacioj bazitaj sur "paralela mono", mi diris. Ĉu vi ne povus pli bone precizigi la manieron, laŭ kiu oni praktike kondukis ilin ?
- Mi intencis fari tion, diris Chester. Jen do kiel agis la sindikato de nia komunumo.
Tiuepoke ekzistis oficiala organizo nomita F.O.R.M.A. (Fonduso por Orienti kaj Reguligi la Merkatojn Agrikulturajn), kies rolo estis financi la stokadon de iuj nutrovaroj por subteni ties prezojn en la interna merkato.
Por ne ĝeni la malnovajn mekanismojn, kiuj devis daŭrigi la aliajn interŝanĝojn, la sindikato atingis, ke tiu organizo disponigu al la magistrato unuan proviantstokon konsistantan el tri tunoj da butero, kvar tunoj da glaciigita viandaĵo, dum la produktistoj de lakto, fruktoj, terpomoj, florbrasikoj, artiŝokoj kaj aliaj nutrovaroj tiam konsiderataj kiel troaj, kaj monkompensataj de FORMA, liveris al nia provkomunumo ankaŭ troaĵojn disponeblajn proksime de nia regiono. Bretoniaj fiŝistoj konsentis sendi freŝan fiŝon transportitan per armea kargaviadilo. La eksperimento povis komenciĝi.
Ĝis tiam por elĉerpi la troaĵojn, oni sciis uzi nur senefikajn elturnaĵojn : buter- aŭ sukerkuponojn,

kiujn uzis nur eta parto de la "socialaj helpatoj", al kiuj tiuj kuponoj estis ekskluzive distribuataj ; aŭ ankaŭ krompagojn, kiuj estis dis- kaj misuzataj por aĉeti vinon, sukeraĵojn aŭ transistorojn ; aŭ reklamadon, kies efiko estis nur momente direkti la monon de la familioj al iuj varoj, dum aliaj aĉetoj fariĝis pli malmultaj.
La problemon de la subkonsumado oni malbone starigis, ĉar oni malprave lokalizis ĉi tiun ĉe la medioj kun malgrandaj vivrimedoj, kiam milionoj da familioj severe porciumataj pro la prezoj kaj devigataj daŭre limigi la enhavon de la "bazarkorbo", volonte estus duobligintaj aŭ eĉ triobligintaj iujn el siaj porcioj, se oni estus doninta al ili la necesajn rimedojn.
Do tiudirekten necesis atribui suplementajn enspezojn, je la aldona kondiĉo distribui ilin sub la formo de "paralela mono", kaj ne sub la formo de ordinara mono neeviteble destinita al disuzado.
Por la transportado de la proviantoj oni uzis la rimedojn de la armeo. Oni staplis la varojn en ejo aranĝita kiel memserva magazeno kaj provizita per frid-ŝrankegoj. La armekontingento, propravolaj personoj, emeritoj, studentoj konsistigis la necesan personaron por funkciigi tiun komunuman magazenon. En la armeo estis multe da ĉiuspecaj profesiuloj. La mararmeo havigis du bonegajn restoracimastrojn. La celita rolo de ĉi-lastaj estis prepari tutpretajn pladojn por la maljunaj personoj kun malgrandaj enspezoj kaj por la dommastrinoj, kiuj, pro deviga laboro eksterhejme, malŝatis prepari malbonkvalitajn viandaĵojn.
Sed la sindikato flegis la ideon profitigi per tiuj distribuadoj ankaŭ la laboristaron dungitan por la tiuokaze entreprenitaj laboroj sur la komunuma teritorio ; tiujn distribuadojn oni konsideris aparta salajro.
Koncerne ĉi tion, do temis transŝanĝi en salajro-kapitalon la de FORMA jam reakiritajn disponeblajn troaĵojn. La originaleco de la operacio estis konfidi al la komunuma aŭtoritato la taskon mem fabriki la konsummonon respondantan al la valoro de la troaĵoj, valoro kalkulita konforme al la prezoj praktikataj en la loka komerco. La unuan tagon oni disdonis la kreditslipojn al la rajtantoj, klarigante al ili, ke neniel temas pri almozo, sed pri laborpago pro nedeviga partopreno en eksperimento, kies konsekvencoj povos montriĝi gravegaj.

Kontentaj esti utilaj, kaj samtempe profitantaj de la komunumaj malavaraĵoj, la maljunuloj senprokraste alfluis al la distribuejo, portante siajn slipojn, kaj ili sentis sin fariĝintaj plenrajtaj konsumantoj. Ĉar ili povis konsumelekti, iuj montris elektkapablon en siaj aĉetoj, ili vidis la pesadon de la varo, entute sintenis kiel la sampatrianoj pli bone sortfavorataj. La sekvantajn tagojn oni alvokis la laboristojn, kiuj konsideris siajn salajrojn nesufiĉaj, kaj devige limigis sian konsumadon. Ĉu ilia apetito estis vere satigita, aŭ ĉu ili kapablis sorbi novajn nutraĵkvantojn ? La alfluo de volontuloj dezirantaj siavice posedi kreditslipon rapide atestis pri la ĝusteco de tiu dua hipotezo, kaj ebliĝis disvendi ĉiutage grandiĝantajn nutraĵkvantojn. Fine estis la vico de la repatriigitoj ĝis nun nutrataj helpe de monsubtenoj, kiuj, ĉar tiritaj el la buĝeto, tondis la parton atribuatan al la aliaj rajtantoj.
La operacio "paralela mono" atingis trioblan rezulton:
- Ĝi demonstris, ke la malelasteco de la mendo de nutraĵvaroj estis nur fabelo elpensita de la ekonomiistoj por doni bonan konsciencon al la obstinaj maltusanoj, plie, ke la troproduktado fakte naskis nur subkonsumado-fenomenon pro nesufiĉeco de aĉetpovo.
- Ĝi alportis realan malpezigon al la komunumaj buĝetoj, pligrandigante ilian kreditmason per sumo egala al la diferenco inter la prezoj pagitaj al FORMA kaj la vendoprezoj, kiuj estis tiuj de la loka komerco. Tiuj kreditoj manifestiĝis, ĉu per laboroj efektivigitaj profite al la komunumo, ĉu per buĝetaj ŝparoj.
- Fine ĝi konsistigis la komencon de tute nova sistemo por distribuado de enspezoj garantiataj per produkto-volumeno, kiu uzis konsumadmonon nek transdoneblan nek ŝpareblan.

Mi tre atente aŭskultis mian amikon.
- Mi supozas, mi diris, ke la de tiu sindikato entreprenita eksperimento povis interesi nur la konsumantkategoriojn ĝis tiam nekonatajn de la loka komerco, ĉar la damaĝo kaŭzata al la tradiciaj komercoĉenoj nepre maltrankviligus la etkomercon ?

- Fakte, daŭrigis Chester, kiam ni volis etendi nian eksperimenton al aliaj salajruloj, proponante al ili forlasi parton de sia normala salajro kaj anstataŭigi ĝin per kreditslipo, la komercistoj reagis, timante

malgrandiĝon de siaj vendoj.
Tamen estis facile respondi iliajn dirojn. Kaj la urbestro tion nepre faris. Li diris al ili :
- Kiam iu el viaj kolegoj, kiu plenumas la profesion de drogisto aŭ de senfulgigisto, fariĝas posedanto de kampardomo kaj tie plantas fruktarbojn, bredas kokinojn kaj kuniklojn, ĉu vi protestas, ĉar vi perdas klienton ? Kial ne same rezoni koncerne la loterigajnantojn, la ĉasantojn, la fiŝkaptantojn ? Ĉu vi ne emas al libera entrepreno, al libera konkurenco ? Kial vi dezirus, ke oni limigu la aŭtonomion de la nuraj ĝardenposedantoj, kiam per mona artifiko fariĝas eble por aliaj civitankategorioj sin provizadi ĉe aliaj fontoj, ol tiuj de la etkomerco ? Kial oni permesus al unuj tion, kio estas rifuzata al aliaj ?

Tamen la rezulto ne montriĝis tiu antaŭvidita de la plej pesimistaj, konsidere la kreskantan nombron de la personoj ricevantaj la konsummonon. Kun sia eteta enspezo la maljunuloj kaj la senlaboruloj estis klientoj ne multe konataj en la loka komerco. Ili plu elspezis sian tutan antaŭan enspezon ĉe la podetalaj komercistoj, sed ilia konsumadnivelo pliboniĝis dank'al al ili atribuita kreditslipo.
Koncerne la salajrulojn pagatajn trione per kreditslipoj kaj dutrione per kuranta mono, la komercistoj konstatis, ke iliaj vendoj ne malgrandiĝis. La komunumo uzis la troaĵojn ne por malgrandigi sian tutan elspezon sed por ampleksigi, kun sama kredito, la volumenon de siaj laboroj. Al la kreditoj atribuataj de la regiona aŭtoritato almetiĝis kredito per konsummono. Kaj iuj senlaboruloj, de aliloke venintaj, nun alkuris, ĉar ili eksciis pri distribuado de laboro kaj de interesaj kromsalajroj.
Daŭrigo de la eksperimento povus senfine okazi, ĉefe se la stokoj estus restarigitaj dank'al financado fare de la ĝenerala buĝeto. Kelkiuj intencis antaŭvidi la enskribon de sufiĉaj kreditoj por realigi la reaĉeton, rekte ĉe la agrikulturistoj, de pli gravaj nutraĵkvantoj. Ĉar ili revendis laŭ la podetalaj kurantaj prezoj la varojn ceditajn de FORMA je la produktkostoj, la profitantaj komunumoj realigis interesan profitmarĝenon tuj reinvestitan en utilajn laborojn. Sed oni povus same uzi la kreditojn atribuatajn al la komunumaj

laboroj por aĉeti nutraĵvarojn ĉe la produktistoj, valorigante varojn ĝis tiam konsideratajn troaj, aŭ ankaŭ por repagi al FORMA ĝiajn reguligajn aĉetojn. Sed ne en tio kuŝis la celo de la iniciatintoj, kiuj ne entreprenis tiun eksperimenton por montri la eblecon samtempe funkciigi du distribuadvojojn, ĉiun kun propra mono.
La sindikato volis nur pruvi, ke la sistemo kun konsummono estas multege pli simple regebla ol la alia, ke ĝi finas la malŝparojn, ke ĝi restarigas pli da justeco tie, kie la maljusteco, la ŝanco kaj la hazardo antaŭe decidis en la enspezformado. Fakte eblis **disdoni** enspezojn per konsummono, t.e. formeti la cirkuladon de la mono kaj ĉiujn ĝiajn malĝojigajn sekvaĉojn. Eksciis la plej nekredemaj, ke oni povas produkti kaj distribui sen uzi la bankajn monon kaj krediton.
De ĉie oni venis por zorgege ekzameni la sub la sindikat-egido realigatan eksperimenton. Multnombraj artikoloj estis publikigitaj, kiuj kontribuis vulgarigi la formulon. Kaj tiel la eksperimento neĝbuliĝis. Post tri monatoj pluraj centoj da komunumoj estis elektintaj eminentul-komitatojn, kiuj vizis la kreditslipojn kaj atribuis ilin al la rajtantoj. Iuj mendadis rekte al la agrikulturaj kooperativoj, senhezite formetante la komercistojn, ĉar la komunumaj aŭtoritatoj opiniis tre oportune mem fabriki sian mononkaj libere distribui ĝin al iu ajn, konsidere ke la tuta organizo estis administrata de unu ekstremo al la alia fare de komunumaj oficistoj, delegitaj armeanoj kaj emeritoj.
Oni retrovis la famajn senperajn komercoĉenojn ege ŝatatajn de la kooperantoj, sed la elekthoro baldaŭ alvenos. Fakte la konsekvenco de la senperaj komercoĉenoj estis la malprospero de la perantoj, kaj tiu malprospero maldungigis iliajn personarojn : kontistojn, manipulistojn, tajpistinojn, transportistojn ktp... Ĉu do necesis reveni al la iamaj agaderaroj ? Denove praktiki la maltusanismon, la detruojn ? Je la nomo de la konta ekvilibro ? De la mona sano ?
Sed dum tiu provtempo ĉiu povis taksi la meritojn de sistemo kun konsummono, kaj en la konkurado tiu sistemo nekontesteble gajnis. La sindikatoj konstatis progreson de sia anonombro, kaj ilia politika influo fariĝis konsiderinda, ĉar iliaj delegitoj partoprenis en la asembleoj, la konsilioj, en ĉiuj lokaj kaj regionaj

komisionoj.

La landoj, kiuj poste imitis nian ekzemplon, adoptis preskaŭ saman procezon. Oni vidis konsumant- kaj uzantosindikatojn stariĝi en premgrupojn kaj adoptigi leĝproponon konfidantan al komisiono, kies membroj estis kooptitaj, la taskon studadi kaj alĝustigi, en kelkmonata limtempo, kompleton da ekonomiaj kaj monaj strukturoj adaptitaj al la akcelo de la teknikaj progresoj, kaj tielaj por obeigi al pli morala, pli justa, pli humana kodo koncerne la manieron produkti kaj distribui.

La balotado intervenis pro la enlanda agitado kreita per la kune aranĝita agado de la sindikatoj, agado, kiu samtempe malorganizis la malnovan sistemon, kaj konstruis la novan epokon.

## ĈAPITRO XXVII

Reveno al la jaroj '60

La fino de inkubsonĝo

Mi retiriĝis en la malgrandan salonon, kie ni kutimis pasigi niajn vesperojn, kaj baldaŭ Katarina venis al mi. Ŝi aspektis pli seriozmiena ol ordinare. Ŝi proksimiĝis al mi :

- Mia patro kaj mi ne sciis, ĉu ni montru tion al vi antaŭ ol vi estos vere adaptita al nia vivo.

Zorge ŝi eltiris foton el koverto ŝajne malfreŝigita de la tempo.

- Jen kion oni trovis sur vi, la tagon kiam vi estis tiel proksima de la morto.

Kaj gvatante ĉe miaj trajtoj la efikon de siaj paroloj, ŝi hezite daŭrigis :

- La bildo estas malnova, sed nun vi scias...

Mi prenis la foton. Miaj manoj tremis. Mi apenaŭ ekrigardis, kaj mi sentis min ŝanceliĝi...
Denove mi estis la Martin Edders de la jaroj '60. Nenio ŝanĝiĝis. Mia filino estis tie, apud mi, kaj sur la tablo la matenĵurnaloj larĝe montris siajn titolojn :

- Tri cent milionoj da homoj suferas dieton, kiu ne postvivigus ratojn pli ol kvin semajnojn. - Revolucia projekto en Usono : senkultivigo de tutaj farmbienoj. - Tri homoj el kvin ne kontentigas sian malsaton, konstatas la konferenco de F.A.O. (Organizo por la Nutrado kaj la Agrikulturo) - La usonaj grentroaĵoj ebligus nutri ĉiujn malsatantojn en la mondo. - Iu ĉevalhufo gajnigis 100 milionojn. - Iu papago heredas 20 000 dolarojn. - Juna virino dronigis siajn tri gefilojn en banujon : "Mi faris tiun murdon, ĉar mi ne plu scias kiel alfronti la vivon". - La agrikulturistoj surverŝas siajn florbrasikojn per gasojlo. - La fiŝistoj reĵetis en la maron plurajn tuncentojn da fiŝoj, kaj alborde kaptis marokan ŝipon. La fiŝbredistoj ĵetas siajn fiŝkaptaĵojn en la riverojn. - Kaptite de mizero maljunulparo

sin mortigis. - Superproduktado de viando. - Usono malembarasiĝis el du milionoj da tunoj de terpomoj, ŝutante ilin sur la aerodromajn kurejojn. - Serio da grandskalaj perarmilaj ŝteloj. - Skandaloj en la domkonstruado kaj komercado. - Sinsekvaj bankrotoj. - Plia altigo de la impostoj. - 450 miliardoj da centimoj por Pierrelatte (franca atomenergia centralo). - Germanio elspezos 5 000 miliardojn da centimoj por la armilaro. - Usonaj kosmoprogramoj : 100 miliardoj da dolaroj estas elspezotaj en dek jaroj. - Loĝeja krizo. - Lernejaj lokaloj nesufiĉaj. - Dimanĉon oni monkolektos por la maljunuloj surstrate...

(*) ...Inter ĉiuj kiuj ĉi-matene malfermis la ĵurnalon, eble nur mi indignis pro tiu montrado de cinikeco. Ĝis hieraŭ mi ne estus konstatinta tion pli ol la aliaj. Tiu stranga sonĝo modifis miajn opiniojn. Mi ne povus diri kiom da tempo mi restis sub ĝia influo, enpense revivanta en tiu fiktiva mondo, en tiu belega urbo kun la komforto de ĝiaj privataj domoj kaj la pompo de ĝiaj publikaj konstruaĵoj. Antaŭ mi ankoraŭ staris tiuj vizaĝoj, kiujn stampis nek aroganteco, nek servemaĉo, kiuj esprimis nek avidon, nek maltrankvilon, nek febran ambicion.
Ĝis hieraŭ mi agnoskis normale, ke unuj estu bone vestitaj kaj la aliaj ĉifonvestitaj, ke tiuj aspektu sataj kaj ĉi tiuj malsataj. Kontraŭe, hodiaŭ ĉiupaŝe ŝokis min la okulfrapaj mikskonsistoj en la vestado kaj la sociaj vivkondiĉoj ĉe la diversaj personoj sin preterpasantaj sur la trotuaro. Ankoraŭ pli ŝokis min la absoluta indiferenteco de la riĉulo antaŭ la senigiteco de la mizeruloj. Ĉu ili estis humanaj estuloj tiuj homoj, kiuj povis observi la mizeron de siaj samuloj sen montri kompaton eĉ sur unu trajto de l'vizaĝo ? Kaj tamen mi ja konstatis, ke ŝanĝiĝis ne miaj samtempuloj sed mi mem. Mi sonĝis pri urbo, kies homoj ĉiuj vivas kun komunaj interesoj kiel la gefiloj de sama familio, kaj sin protektas unu la alian.
Alia trajto de la urba fizionomio, kiu mirigis min kiel faras la kutimaĵoj vidataj sub nova lumo, estis la regado de la afiŝoj kaj anoncoj. En la urbo de mia sonĝo tio ne ekzistis, ĉar nenecesa. Sed ĉi tie la

(*)Noto de la aŭtoro: La ĉi-sekvaj paĝoj estas ĉerpitaj el "Looking Backward" de Edward Bellamy. NDLT : ...kun kelkaj etaj modifoj, kompare al la franca traduko.

konstruaĵmuroj, la fenestroj, la gazetpaĝoj, eĉ la pavimeroj, ĉio, escepte de la ĉielo, estis tegita per logparolaĉoj de individuoj, kiuj elcerbumis inĝeniajn rimedojn por siaprofite elpagigi la publikon. Nura temo reaperis sur ĉiuj tiuj diversaj formoj : "Helpu al John Jones! Ne gravas la aliaj! Ili estas ŝtelistoj. Mi, John Jones, estas la nura honestulo. Venu al mi. Aĉetu ĉe mi. Aŭdu min. Nedubeble. John Jones estas via homo. La aliaj malsatmortaĉu, sed je la ĉielnomo, memoru pri John Jones!"
Tiu abomena tumulto el senhonta aroganto kaj reciproka misfamigo, tiu surdiga bruego per kontraŭstaraj fanfaronadoj, alvokoj, ĵurpetoj, tiu kurioza sistemo de provoka almozpetado, ĉu tio estis nenio alia ol la nepra rezulto de socia organizado, en kiu la permeson servi la homaron laŭ sia kapablo oni akiras nur koste de pena luktado anstataŭ ol ricevi ĝin kiel ĉies esencan rajton ?
Mi atingis la plej komercan lokon de strato Vaŝingtono kaj mi subite haltis, ridegante je la granda skandalo de la pasantoj ; nenio en la mondo povus haltigi min, tiel ridinda aspektis al mi tiu senfina vico da provizaĵoj ofte samaj, sin montrantaj ĝis oni povas vidi, ambaŭflanke de la strato. Magazenoj, senfinaj vicoj da magazenoj por distribui la varojn necesajn al la loĝantoj de urbo, kiu en mia sonĝo ricevis ĉiujn el ununura stokejo laŭmezure de mendo fare de granda kvartalfilio, kie sen tempoperdo kaj peno la aĉetanto trovis sub unu sola tegmento sortimenton da ĉiuj mondproduktoj!
Mi pasis milfoje tra tiu strato Vaŝingtono, mi observis la morojn kaj la kutimojn de la komercistoj ; sed hodiaŭ, pro la de ili naskita nova scivolemo, estis kvazaŭ mi pasus tie unuan fojon. Mire mi rimarkis la montrofenestrojn de la magazenoj plenigitajn per varoj aranĝitaj laŭ la plej rafinita gusto, la plej pridetala zorgemo, por logi la okulon de la preterpasanto. Mi vidis tiun amason da virinoj haltantaj por rigardi kaj la mastroj anksie ŝtelrigardi, atendante la allogefikon. Mi eniris magazenon : mi vidis la falkokulan inspektoron, kiu gvatas la aĉetanton, observas la komizojn, certiĝante, ĉu ili aplikas la donitan instrukcion, kaj tiu instrukcio estis aĉetigi, ĉiam, ĉiam, ĉiam, kontraŭ kontanta mono, se la kliento ĝin posedas, kredite, se li ne posedas ĝin, eĉ se li devus aĉeti

kion li ne bezonas, pli ol li bezonas, kaj pli ol li povas pagi. Tiu spektaklo mirkonsternis min. Kial tiu dezirego instigi la homojn al konsumado ? Kio komuna inter tiu klientĉasado kaj la justa komerco, kiu konsistas distribui la varojn al tiuj, kiuj deziras ilin ? Ĉu ne estas la kulmino de malŝparo trudi al iuj la troon kaj senigi la aliajn de la bezonaĵoj ? Pri kio do pensas tiuj komizoj ? Tiam mi memoris, ke ili agas ne kiel distribuantoj similaj al tiuj de mi sonĝe viditaj en urbmagazenoj. Ili ne servas la publikan intereson; por ili ne gravas la lasta efiko de siaj agoj sur la ĝenerala prospero, kondiĉe ke ili grandigu sian propran sekretan kapitalon ; ĉar tiuj varoj apartenas al ili, kaj ju pli ili vendas, des pli ili gajnas. Instigi al malŝparo, tio estas la celo nepre atingenda por la 10000 butikistoj de tiu urbo. Tamen tiuj komercistoj kaj tiuj komizoj ne estas pli malbonaj ol la ceteraj samcivitanoj. Ĉar ili estas devigataj pergajni sian vivon kaj vivigi siajn familiojn, kie ili malkovrus metion ne devigantan ilin loki sian personan intereson super ĉiun alian ? Oni ne povis postuli de ili malsatmorti, atendante organizon saman al tiu vidita en mia sonĝo, en kiu la persona intereso kongruas kun ĉies intereso.

Ne longe poste, mi veturis al la suda kvartalo, kie troviĝas la industrioj. Plurajn centfojojn mi vizitis tiun kvartalon samkiel straton Vaŝingtono ; tamen ĉi tie, kiel tie, por la unua fojo mi komprenis la veran signifon de tio, kion mi vidis. Iam mi fieregis scii, ke la lando posedas, laŭ la diroj de la statistikistoj, plurajn centmilojn da sendependaj entreprenoj. Hodiaŭ, ĝuste tiu multeco de sendependaj entreprenoj malkovrigis al mi la sekreton de la senvaloreco de nia tuta industrio, ĉar ne nur tiuj miloj da entreprenoj ne akorde laboris kaj tial laboris laŭ ege malvantaĝaj kondiĉoj, sed kvazaŭ tio ne jam implicus sufiĉas povperdon, ili uzis sian tutan lertecon por reciproke sin senpovigi, nokte preĝante, tage laborante, cele al la detruo de la konkurencaj entreprenoj.

La bruego de la radoj kaj de la marteloj, kiuj ĉiuflanke sonoris, ne estis la zumado de paca industrio, sed la tintado de glavoj agitataj de malamikaj brakoj. Tiuj uzinoj, tiuj magazenoj, ĉiuj estis fortresoj, ĉiu kun sia flago, siaj kanonoj celdirektitaj al la kontraŭaj magazenoj kaj uzinoj, kun siaj fosistoj provizitaj

per subteraj minoj por eksplode pereigi ilin.

En ĉiu el tiuj fuortoj, oni aplikigis la plej severan disciplinon industrian. La diversaj batalionoj obeis al ununura centra direkcio. Oni toleris nek superfluan oficon nek neokupatajn manojn. Do per kia logikmanko klarigi la neobservadon de tiu sama principo en la organizado de la naciaj entreprenoj konsiderataj en sia tuto ? Se la organizmanko povas endanĝerigi la prosperon por unu sola entrepreno, kial oni ne komprenas, ke tiu manko nedubeble efikas multe pli malbonege, kiam temas pri la ĝenerala industrisistemo ? Kiom oni mokus armeon, kiu havus nek batalionon, nek regimenton, nek brigadon, nek korpuson, unuvorte neniun trupunuon pli grandan ol la kaporalplotono, nek oficirojn pli altgradajn ol la kaporalo, kaj en kiu ĉiuj kaporaloj ĝuus egalan aùtoritaton! Tamen en la lando la industrioj konsistigis similan armeon. Estis armeo el centmiloj da sendependaj subsekcioj komandataj de centmiloj da sendependaj kaporaloj, kiuj havas sian propran malsaman kampanjplanon.

Tie kaj ĉi tie oni vidis senokupajn grupojn, nelaborantajn, unuj ĉar ili ne trovis laboron, la aliaj ĉar ili ne sukcesis ricevi la laborpagon, kiun ili opiniis meriti.

Reirante al la duoninsula parto de la urbo, mi atingis, ĉirkaù la tria horo, la bankkvartalon. Grandege mi malfermis la okulojn al la oficejoj de la bankieroj, de la makleristoj, kaj de aliaj financaj establoj, kies eĉ plej malgrandan postrestaĵon mi ne renkontis en mia vizio. Aferistoj, fidindaj oficistoj, spezokomizoj ire-revene kruciĝis en la oficejoj, ĉar proksimiĝis la fermhoro. Mi staris fronte al la banko, kies kliento mi estas ; mi trairis la straton kaj sekvante la puŝon de la homamaso, mi kaŝis min en angulon, de kie mi observis la armeon de la komizoj manipulantaj la monon, kaj antaù la giĉetoj la atendvicon de la deponantoj. Maljuna sinjoro, kiun mi konis, iu el la bankdirektoroj, ekvidante min en tiu observema sinteno, momente haltis.

- Kia interesa spektaklo, li diris, ĉu ne, Sinjoro ? Kia mirinda maŝino ! Pri tio mi opinias same kiel vi. Kelkfoje mi haltas por admiri tion. Estas poemo, Sinjoro, vera poemo. Ĉu vi ja scias, Sinjoro, ke la banko estas kvazaù la koro de la industrisistemo ?

Al tiu koro aŭ el tiu koro ja fluas, laŭ la senĉesaj flusoj kaj malflusoj, la viviga sango. Jen la tiuvespera fluso, ĝis morgaŭ matene la malfluso.

Ĝis hieraŭ mi estus opiniinta la komparon sufiĉe ekzakta. Sed de tiam mi vizitis mondon multege pli riĉan ol ĉi tiu, mondon en kiu tamen la mono havis tute alian rolon ; mi lernis, ke en la nuntempa mondo la moncirkulado estas pravigita nur ĉar la laboro produktanta la nacian konsumaĵaron anstataŭ esti konsiderata kiel ĉies intereso kaj plej grava, kaj pro tio prizorgata de la nacio, estas forlasita al la hazardaj strečoj de disaj individuoj. Tiu origina eraro necesigas serion da senfinaj interŝanĝoj, por ĉiapreze finveni al la distribuado de la produktoj. La mono ebligas tiujn interŝanĝojn, sed kun kia justeco ! Ĝi ebligas ilian plenumadon helpe de armeo da individuoj forprenitaj el la produktivaj okupoj, tra senĉesaj forfaloj kaj je la prezo de senkuraĝiga influo kontraŭ la homaro. Kompatinda maljuna direktoro, kiu konsideris febrajn palpitaciojn de absceso kiel korbatojn ! Tio, kion li nomis mirinda maŝino estis nebona artifiko imagita por kontraŭstari facile eviteblan malperfektaĵon, peza lambastono por memvola kriplulo.

Post la fermiĝo de la oficejoj, mi sencele vagis unu-du horojn en la aferkvartalo ; poste mi sidiĝis sur iun el la publikaj benkoj, kiel vojaĝanto studanta la popolaĉon de fremda lando, tiel de hieraŭ fremdiĝis al mi miaj samnacianoj kaj iliaj moroj. Mi travivis kvardek jarojn inter ili, kaj mi ankoraŭ ne rimarkis kiel por ĉiuj, riĉuloj kaj malriĉuloj, la vizaĝoj estas lacaj kaj trajtotiritaj. Kaj nepre tiel devus esti ; ĉar hodiaŭ, pli klare ol antaŭe, mi vidis, ke ĉiu, marŝante sin deturnis por aŭskulti la fantomon de la necerteco, kiu murmuras ĉe lia orelo :
"Mia amiko, laboru tiom kiom ci povas, frumatene ellitiĝu, kaj ripozu nur kiam noktiĝos ; ĉu lerte ŝtelante, ĉu fidele servante, neniam ci ĝuos sekurecon. Hodiaŭ riĉa, morgaŭ ci povos esti malriĉa. Eĉ heredigante milionojn al ciaj gefiloj, neniam ci certos, ke cia filo ne iĝos la servisto de cia servisto, aŭ ke cia filino ne vendos sian korpon por pano."

Viro, kiu tiumomente preterpasis, ŝovis en mian manon flugfolion, kiu rekomendas novan manieron

por asekuri sian vivon. Tiu incidento pripensigis min pri la sola rimedo donanta al tiuj virinoj kaj al tiuj lacegaj viroj partan ŝirmilon kontraŭ la necerteco de l' sorto. Per tiu rimedo la bonhavaj personoj povus akiri la necertan esperon, ke post ilia morto la amataj estuloj ne estos tretitaj de la aliaj. Sed nur tio, kaj por tiuj sufiĉe monhavaj, kaj nur profite al ĉi tiuj. Ho! kiel mizera tiu asekurŝajno, kiu kontentigis la dezertinfanojn, aspektis al mi, kompare al tio, kion mi vidis en tiu ideala lando, kie ĉiu membro de la nacia familio estis ŝirmata kontraŭ la bezono dank'al poliso subskribita de pli ol 100 milionoj da samcivitanoj!

Frenezo de la homoj, ne malmoleco de ilia koro, mi diris al mi, plej grave okazigas la mondmizeron. Nek la homo nek iu ajn homklaso kulpas pri tiu vivo de la homa raso en nesekureco. Mi povis demonstri al ili kiel la kvar kvinonoj de la homa laboro estas senutile elspezitaj pro tiu milito inter ĉiuj, pro la manko de organizo kaj interkonsento ĉe la laboristoj.

Dum mi monologis, kelkaj pasantoj haltis kaj ekĉirkaŭis min. Por estigi la aferon pli komprenebla al ili, mi prenis kiel ekzemplon malfekundan terenon, kies grundo donas rikoltojn nur dank'al bone pripensita uzado de la riveroj. Mi montris al ili, ke en tiaj landoj la plej grava funkcio de la registaro estas, por eviti malsategon, malhelpi la malŝparon de la akvo fare de la egoismo kaj de la malklero de la individuoj. Tial ties uzado estas severe kaj sisteme reguligata, kaj neniu rajtas ŝanĝi la akvokuron, nek digi nek trouzi la akvojn laŭ nura kaprico, ajnamaniere.

La homa laboro, mi daŭrigis, estas la sola fekundiga fonto, kiu igas la teron loĝebla. Ĝi estas nur malforta rivero kaj necesas reguligi ties uzadon per sistemo, kiu distribuas laŭ la plej avantaĝa maniero ĉiun guton, se oni volas, ke la tuta mondo vivu en la abundeco. Sed kiom la nuna agadmaniero situas antipode de ĉia sana metodo ! Ĉiu pretendas laŭvole uzi la valoregan likvaĵon nur zorgante sekurigi sian rikolton kaj malhelpi al tiu de la najbaro, cele vendi la sian pli altpreze. Iuj kampoj estas inunditaj pro venĝemo kaj malico ; aliaj senakviĝas kaj duono de la akvo senutile perdiĝas. Sub tia reĝimo, kvankam kelkaj povas konkeri la lukson dank'al persistaj ardo kaj ruzo, la sorto por la plimultaj estas nepre la malriĉeco ; tiu de la malfortuloj kaj

de la malkleruloj estas la nigra mizero kaj la ĉiama malsatego. La malsatigita nacio prenu en manojn la de ĝi neglektitajn funkciojn, kaj por ĉies bono reglamentu la fluon de la riverego, kiu nutras la vivon, tiam la tero ekfloros kiel ĝardeno, kaj al neniu el ĝiaj infanoj mankos io.

Mi priskribis la materialan feliĉon, la intelektan lumon, la moralan elstarecon, kiuj tiam ĉirkaŭus la homekzistadon, ĉies ekzistadon ; mi fervore parolis pri tiu nova mondo benita de la abundeco, purigita de la justeco, mildigita de la frateco, de tiu mondo, pri kiu mi sonĝis, sed kiu tiel facile povus fariĝi realaĵo. Mi atendis, ke la ĉirkaŭaj vizaĝoj iluminiĝu pro emocio sama al la mia. Kontraŭe, ili fariĝis pli malhelaj, pli koleraj, pli malŝatemaj.

Anstataŭ entuziasmo la virinoj manifestis nur malinklinon kaj teruron, dum la viroj interrompis min per malaprobaj kaj malestimaj krioj :

- Frenezulo, maldignulo, fanatikulo, malamiko de la socio! ili kriegis. Li diras, ke ni povas ne havi malriĉulojn. Ha! kia bona historio!

Kaj tiuj viroj sin ĵetegis kontraŭ min, dum mi defendis min. Sed mi ne malamis tiujn, kiuj tiel perforte traktis min ; mi nur kompatis ilin kaj la mondon.

Do tiu mirinda historio, kiun mi ĵus travivis, estis nur sonĝo...

*

- Li rekonsciiĝas.

Denove estis la voĉo de Katarina. Malfermante la okulojn, mi vidis ŝian vizaĝon kaj tiun de la kuracisto klinitaj al mia lito.

- Kio okazis ? mi demandis. Kie mi estas ? Ha! nun mi memoras... tiu foto... kaj vi... kaj ci... Katarina... kiel eblas ?

- Jes, ŝi diris, malfacile bridante sian emocion, temas ĝuste pri via filino, tie ĉi sur tiu ŝi bildo. Dum tutaj tiuj kvardek jaroj, ŝi vivis kun via memoro. Kaj poste... antaŭ nur kelkaj monatoj... ŝi mortis... ŝi ripozas... Ni multe similis unu al la alia.

Kaj tre mallaŭte ŝi aldiris :

- Ŝi estis mia patrino.

FINO

**SAT-Broŝurservo** * Directeur de publication & imprimeur
Christian Baudé * F 47340 Laroque Timbaut